

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SENPAĜA POR LA ĜEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONA-HISPANUJO

AVIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezone la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.

ENHAVO: Datreveno. — En nova jaro... — Aforismaro. — Spritaĵoj. — Studkomisio pri ĉiulanda verkaro. — Elĉerpitaj sciigoj. — Enlanda Movado. — Eksterlanda Movado. — Bibliografio. — Oficiala Parto.

La Estraro de «K. E. F.» kaj la Redakcio de «Kataluna Esperantisto», deziras al ĉiuj gelegantoj plej feliĉan kaj prosperan novan jaron

DATREVENO

LA 15^{an} Decembron 1859^a, Dro. Zamenhof, la Majstro venis en la mondon, ĉe Bjelostok (Rusa Polujo). En la datreveno de lia naskiĝotago ni esperantistoj devas ĝoji, pro tio, ke tiu eminenta homo kiu dediĉis sian tutan vivon al fratigo de la homaro, estas ankoraŭ vivanta. Ne multaj homoj, ne ĉiuj humanistoj, ne ĉiuj homoj sindonantaj al homaro por lin perfektigi, plibonigi kaj liberigi, konstatas en vivo la frukton de iliaj penadoj kaj memoferoj; tion povas konstati nia Majstro, kaj li meze de tiu mondo kiu en ĉiuj epokoj

sciis premii la profetojn kaj predikantojn per krucumo, radias kiel la Vero mem, kiel la Amo mem.

Lia trairado en la mondon faris bonon; li ja plenumis sian taskon kiel homo. Ni homoj kiel li, sciu lin imiti, kaj ĉefe lin kunhelpi per tuta nia abnegacio. La estontuloj nin benos kiel ni estantuloj benas la Majstron. Sed ni meritu la benon!

Longedaŭran vivon al Dro. Zamenhof!

K. E.



EN NOVA JARO...

KATALUNA proverbo diras: «En jaro nova, vivo nova». Jen proverbo kiu enhavas senton tute esperoplena, kiu estas optimisma, kiu sentigas en ni, fortan inklinon antaŭeniri en perfektigo, en fortikeco, en memvoleco.

Kiam en nova jaro ni al ni ripetas ĉi tiun proverbon, ŝajnas al ni ke ĝi taŭgas kvazaŭ alparolo de militestro al armeoj antaŭ la ekkomenco de batalo. Kaj ĝi enŝovigas en nin la tutan necesan kuraĝon kaj decidon por reentrepreni nian antaŭsignitan vojon en la vivado. Ni ĉiujare, en la komenco de la jaro, promesas al ni plenumi novajn taskojn pri novaj aspektoj kaj flankoj de la vivo. Kaj la proponoj de ni difinitaj estas efektivigitaj dum la jaro, danko al akiro de novaj entuziasmoj, agemeco kaj kuraĝo kiujn al ni liveras la antaŭ citita proverbo.



«En jaro nova, vivo nova», estas nia persona devizo, ĉe ĉiu komenco de jaro. Keĵ en ĉi tiu jaro, ĉe la atingo de la dua jaro de K. E. F. ni juĝis ke la proverbo ankaŭ povus taŭgi por ni katalunaj esperantistoj, rilate al nia organizado. Se ni ĉiuj sen escepte, sciis plenumi la decidon kiun ĝi enhavas; se ni katalunoj sciis akiri la necesan entuziasmon kaj decidon liveri al nia societo plej prosperan vivon, plej efikan povon, ni estu certaj ke en la fino de la nuna jaro ni estos tre malproksime sur nia vojo.

Tute ne taŭgas ke ĉiu redakciano aŭ estrarano persone prenu sur sin tian devizon rilate al nia Federacio. Kio plene taŭgas al unu sola homo, tio plej ofte ne efikas al multaj homoj se ĉiuj ne estas persone

tion preninte sur sin. Spite nia deziro, spite nia decido kaj memvoleco kaj entrepreno nek nian Federacion, ni apartaj homoj prosperigos, nek nian K. E. ni riĉigos nek igos plene interesan. Certe ni per nia memvaloro kaj agemeco povos atingi pli malpli altan rangon en la esperanta asocio kaj en la esperantaj gazetoj, sed ne tiel ĉefan kiel ni atingos por la ĉies konstanta kaj multenombra kunhelpado, ĉar estas per la adicio de multaj unuoj ke la nombroj valoras kaj riĉiĝas.

Ni aparte, en la plenumo de nia devo kiel redakcianoj celis efektiviĝi la de ni mem antaŭe prezentitajn proponojn, sed kvankam ni ne restis solaj, ni ne estis sufiĉaj por ĉion entrepreni kaj realigi. Vi ne kredu, tamen, ke ni ne atingis la plej ĉefan parton de niaj proponoj, sed ni estas malkvietemaj, ni estas perfektigemaj, progresemaj kaj ne plaĉas al ni sidi sur la vojo, pro tio ke la vojoj estas por marŝi sur ĝi, kaj ju pli ni antaŭeniras des pli ni vivos kun novaj pli multvaloraj fortoj kaj ecoj.

Ni estas ja kontentaj de nia kuna laboro, sed ni juĝas ke tiu sama farita laboro postulas de ni, de ĉiuj, novajn plej riĉigajn aferojn. Ni devas ĉiame celi perfektigon en niaj agadoj kaj faroj pro tio ke ni estas homoj. Ni perfektigu ankaŭ nian esperantan agadon.

Por tio atingi estas du peroj. Iuj povas la perfektigon kunhelpi per mono kaj verkoj: aliaj per mono. Ĉiu donu kion li povas, sed ĉiu donu, ĉiuj estu sindonemaj, memoferaj, pro tio ke pro la ĉies memoferoj ni prosperos.

* * *

Antaŭ unu jaro, kiam ni naskiĝis, ni certe ne sciis ĉu ni vivos aŭ mortos tuje. Tiam estis vintro en la kataluna esperantista kampo; sed ni flamiĝemaj, agis kiel la mikdalarboj; ni floris spite la vintra sezono, la malvarmo kaj la minacanta frosto. Ni kuraĝe floris kaj plej kuraĝe ni fruktis, ĉar nian floron ne mortigis la vintro, sed ĝi deŝirigis tute nature antaŭ frukti por vidigi kaj montriĝi al skeptikuloj la vojon sur kiu ili iros kaj sur kiu ni estis irantaj tute sindonaj kiel la floroj mem.

Sur nia vojo ni kolektiĝis pli ol tricent; ni pli kolektiĝos en tiu ĉi jaro, ĝis ne restos unu sola for de nia kampo. Kaj ni ankaŭ fruktos!

* * *

Sed ni devigu al ni alvarbi novajn geanojn, novajn kunlaborantojn, ĝis neniu mankos en nia rondo. Ni fervore tion devas celi, pro

tio, ke K. E. F. fariĝis la riprezentanto de Esperantismo en Katalunlando. Male al la opinio de kelkaj sinjoroj kiuj pretendas ke nia Federacio estas plia societo, ajna societo, kvazaŭ loka grupo, ni devas aserti ke ĝi estas nek aparta, nek persona, nek izola. Ĉirkaŭ ĝi ne estas muro ĝin apartigante de la mondo, nek de la fremdaj aŭ amikaj rigardoj, kiel volas esprimi tiuj sinjoroj per ilia diraĵo. Nia pordo estas de post ĉiam malfermita al kvar flankoj kaj al ĉiuj homoj. Sur ĝi estas nenia avizo malpermesante la eniron. Ĉu okaze, nur estos sur ĝi la antaŭjuĝoj kiujn ili mem surskribis ĉu pense ĉu intence, tiuj sinjoroj. Ni celis fari nian domon komfortan taŭgan por ĉiuj. Plej bone ol niaj vortoj tion montrigas niaj faroj. Se ni en tute ne sukcesis, venu al ni la pli ol ni lertaj, agemaj, memvolaj, amemaj kamaŝadoj; venu al ni se ili estas tiele, kaj ni ĝoje ilin akceptos kaj ĉirkaŭbrakos. Ĉio por Esperanto!

* * *

Rilate al nia gazeto, ni volus ke ĝi estu luksa, bela, valora, interesa, alloga kiel eble. Ni volus ke ĝi estu reflekso de la memvaloro kaj inteligenteco de nia samideanaro en ĉiuj rilatoj koncernantaj al Arto kaj Beletristiko, kaj ĉefe al Esperanto, por ke la neesperantistoj konvinkiĝu ke ni ne estas ajna amaso, al kiu mankas la sento pri la Belo kaj Estetiko. Sed, kiel ni antaŭe diris ne nur ni solaj ĉion povas efektiviĝi. Ĉiuj nin kunhelpu, kaj la cetero venos per siaj propraj paŝoj.

Kaj tiel en atingo de nova jaro, ni plej fervore ripetos «En jaro nova, vivo nova», ĉu?

★ ★ ★

AFORISMARO

Katalune verkis, F. de P. Bedós

Ĉiuj birdoj ne estas egalaj: unuj *sidas sur tero* altiras siajn flugilojn por manĝi kaj nur ree suprenflugas post satiĝo; la aglo iras *sur la ebenaĵon*, flugilsvingante ungokaptas kaj ree altenflugas: eĉ manĝante ĝi *ne forlasas la altecojn*.

— La amasoestroj en la momento de la agado antaŭeniras sen priokupiĝi pri la nombro kaj ecoj de la sekvantaro: la homoenkon-

dukantoj antaŭmetas la amason, kaj en la atingo de la celo, per vipbatoj forigas la ŝafidojn por *malfermi la pordon*.

— Inter la bonuloj, la homo malbona estas malsanulo : inter la malbonuloj, la homo bona estas senutilulo.

— La priokupo pri la peroj multan fojon perdigas la *konscion de la celo*. Zorgu ŝciigi ke *ekzistas unu celo*, kaj ĉiam klopodu por *la sama celo*.

— Atentu mia amiko; ne fidi al la ceteraj povas esti elmonro de la malmulto kiun oni povas fidi al si mem.

— Vi ne vin elliveru al celo kiun vi celas, ĝis kiam vi estos rigardinte ĝin en la *lumo de la tago*; la lumo de la sento estas lumo de luno, kiu poetigas eĉ la malvivaĵojn.

— Mi vere vin diras, ke, kiam vi disdonos la ĝuadojn vi *havos* geamikojn, kaj la suferojn disdonante vi *konstatos* la geamikojn.

— Multaj homoj akceptas la konsolesprimojn por havi motivojn eligi la konsolon kiun ili interne entenias.

— La vivo estas ŝtuparo tra kiu la homoj devas fatale suriri, kaj pro iliaj agoj iuj suriras tre rapide, aliaj malrapide, kaj aliaj malsupren falas. Sed kion mi ja diras estas, ke, neniu rajtas sidiĝi sur la ŝtupoj.

— La grandaj jesoj de la homaro determinantaj la progresadon de la popoloj, estis faritaj pro tri demandoj : — kiel? — kiam? — kial?

— La religioj metas ilian celon *super* ni; la scienco *antaŭe*... Nuntempe ni marŝas...

— Estas ideoj kiuj ne estas grandaj en la momento de la naskiĝo : ilin grandigas kaj fortigas la kuniĝado de pensmanieroj, same kiel la riveroj kiuj fariĝas multakvoportaj per la multaj alfluantoj ilin nutrantaj.

— La torentdebordiĝoj *ĉiam malutilas*; la superakviĝo de la

riveroj vastaj kaj largobordaj, kiel la Nilo, *ĉiam utilas*. Le politikaj agitistoj estas la torentoj; la patricioj grandaj, kiuj predikas la humanajn idealojn, estas la Niloj de la popoloj.

— Vi ne lasu vin surprizi. Se en via travivado vi renkontas *grandhomon*, antaŭ lin respektigi vidu ĉu li *staras* sur la tero.

— Tiu ĉi devas esti via unua penso je la vekigo : *fari bonagon*. Tiu ĉi devas esti via unua faro : *praktiki bonagon*. Viaj faroj kaj pensoj postaj : *ripetadi kiel plej ofte eble vian unuan penson kaj vian anuan faron*.

— Ĉu vi volus antaŭeniri kaj la malhelpaĵoj vin haltigas? Vi ne *rajtas* antaŭeniri.

— Kiam mi renkontas mallongigantan vojon mi pensas : *jen vojo ekkomencita de volulo*.

— Ni estu kiel la apudvojaj arboj : la brakoj ĉiam kompateme etenditaj; senfoliĝintaj en vintro por lasi libere trairi la radiojn de la bonfaranta suno; sin kovrinte per verda foliaro en somero, por liveri fortikigantan ombron al bedaŭrindaj gevojirantoj.

— Kiam oni petos al vi, kiu vi estas? klopodu *povi* respondi : *mi estas rekta linio kiu iras celon*.

— Se vi volas alteniri, la enviduloj vin perforte tenos por tion malebligi; se vi triumfas, ili vin puŝos por pli altenirigi vin, dirante ke, estas ili kiuj vin altenirigis, sed kaŝe por vidi ĉu vi kapturniĝas kaj falas.

— Vi estu plimultiganto de via propra unueco; ĉar mi vere vin diras, ke, estas multaj homoj, kiuj *valoron* ne havas per si mem, sed per la nuloj ilin sekvantaj.

— La historiistoj de alcentrigantaj ŝtatoj skribante siajn verkojn agas kiel Apeles kiam li portretis la reĝon Antigon'on; li lin profilportretis, por ke oni ne vidos ke li estis unuokula. La tuta historio kiun oni instruas en Universitatoj, estas profilfarita.

— Supren, supren, se vi soifas! Vi trovos malpli da fontanoj sed la fluoj estas pli puraj.

— Li estas granda filozofo? Mi ĝin ne dubas, sed hieraŭ li blovis glaciaĵon pro timo sin vundbruligi.

— Vi juĝas vin *bona* tial ke vi *sentas ĝojon* kiam vi renkontas mizerulon al kiu almozdoni? Mi plu ŝatos *malbonulon*, kiu pro malamo al mizeruloj riĉigos ĉiujn.

— Vi ne sciafektu neniam pro la povo de viaj prapatroj, ĉar tiu ĉi sciafekto nur taŭgus por elmontri vian propran senfortecon.

Esperantigis,

D. SERDÁ



SPRITAĴOJ

Ju vojaĝiranto renkontis hindon meze de dezerto. Ambaŭ rajdiras sur sia ĉevalo. La vojaĝiranto, kiu rimarkis ke lia ĉevalo ne plu povis lin surporti kaj ke tiu de la hindo estis potenca, petegis de li la ĉevalon por povi tiamaniere daŭrigi la marŝadon; la hindo, kompreneble, tute malcedis tian ŝanĝon, ĉar nenion gajnis sed kontraŭe malgajnis, kaj ili finis per varmiĝa disputo; sed, ĉar la vojaĝiranto estis armita, la hindo perforte cedis kaj sin lasis rabi sian belan ĉevalon. La hindo renkontebaris sian ŝtelinton kaj tuj, kiam alvenis en la urbo prezentis sin tuje al la juĝisto denunci tiun, kiu tiele al li rabis la ĉevalon. La vojaĝiranto estis devigita alveni antaŭ la juĝisto kaj tie li subtenis kontraŭ la kulpiginto, ke la ĉevalo apartenas al li kaj ke ĝi estis nutrita de li de antaŭ siaj unuaj jaroj. Ne estis tie alestintoj de la fakto, nek ia pruvo kontraŭ tio, kion ĉiu certigas, kaj ŝanceliĝanta la juĝisto volis forlasi tiun aferon, kiun nesciis kiele decidi, kiam la hindo ekkriis; la ĉevalo apartenas al mi kaj mi havas pruvojn pri tio.

Li elpoŝis naktukon kaj kovris subite la kapon de la besto, kaj sin turnante al la juĝisto diris: «ĉar tiu ĉi homo certigas ke tiu ĉi ĉevalo apartenas al li, ke li diru, kiun okulon ĝi havas blinda».

La vojaĝiranto sentime ekrespondis: «mi tre bone scias tion; ja ĝi havas blinda naskiĝe la dekstran okulon».

Tiam la hindo elmontrante la kapon de la ĉevalo, rediris: «nu,

ja mi vin kaptis; nek ĝi havas blinda la dekstran okulon nek la maldekstran».

La juĝisto, plene konvinkita per pruvo tiel sprita, kiel taŭga, li veris al li la ĉevalon, restante la vojaĝiranto plene surprizita.

Esperantigis,

JOZEFO PI

PATRO KAJ FILO

— Komediiŝto!... kantanto!... Tion vi deziras profesie fari?

— Ho jes, jam de longe mi tion revas.

— Do, mi ne permesas al vi tion fari, ĉar mi ne deziras ke vi malhonoru mian nomon sur la scenejoj.

— Pro tio ne timu, ĉar kiel aktoro mi uzados pseŭdonimon.

— Nu, kaj tiam se vi sukcesas kaj fariĝas fama aktoro, neniu scios ke mi estas via patro.

MALFELIĈULO

Sinjoro riĉega, sed pli malbela ol riĉa, demandas al bela fraŭlino.

— Ĉu vi bonvolus esti mia edzino?

— Mi pli dezirus esti via vidvino, — sincere respondis ŝi.

EN BARBIREJO

La kliento : — Ŝajnas al mi ke vi raziltranĉis min.

La razisto : — Ne ankoraŭ, sinjoro.

IRI POR LANO

Alveninte kamparano en Madridon en festa epoko dediĉis sian tempon vizitante butikojn kaj vendejojn, por sin amuzi. Enirinte en bankoficejon kaj vidinte nenion vendeblan, demandis junulon kiu staris post la kontoro. — Ĉu vi bonvolus diri al mi kion oni vendas ĉi tie? — Azenajn kapojn, — diris tiu dezirante moki la kamparanon. — Nu: kredeble vi vendadis multajn ĉar nun restas nur unu vendeblan.

* * *

Malriĉulo estis sidanta sur sojla preĝejo. Pasas antaŭ li sinjorino, haltas kaj serĉadas en siaj poŝojn; fine diras :

Senkulpigu min, bona viro, mi kredis esti kunportante centimojn kaj nur mi trovis durojn en miajn poŝojn.

La malriĉulo ne koleriĝinte — Estas same sinjorino, mi estas preskaŭ blindulo.

INFANAĴO

Kvar aŭ kvin infanoj post ludado decidis iri sablaron por padeli kaj eĉ por sin bani, sed sciigante pri tio nenion al siaj gepatroj.

Inter ili estis iu nomata Peĉjo kiu fanfaronante, eniris en maron. Tamen, apenaŭ sublasis la sablon, ektimis, vokis kaj glitiĝis maren, kaj kvazaŭ englutita de la maro li malaperis.

Neniu el la aliaj kuraĝis lin eltiri. Fine alvenis fiŝkaptisto kaj ĵetinte sin maren prosperis kapti Peĉjon tute senmovan. La fiŝkaptisto elirigis la tutan akvon de li englutitan kaj tiam li ekmontris iom da vivo.

Post kelkaj minutoj li estis kiel antaŭe kaj ekĝemis malĝoje: — Se mi estus droninta... kia batado mia patrino?

* * *

Du viroj renkontiĝas sur sama vojo. Unu demandas la alian:

Bonvolu diri, kiom da tempo mankas al mi por atingi la vilaĝon X?

— Marŝu, respondas la alia.

— Diru al mi kiom mankas?

— Marŝu, li ripetas. — Mi vojaĝadis multe kaj neniam mi renkontis malafablan viron kiel vi, — kaj dirinte tion kolere marŝas pli rapide. — Per tiu ĉi marŝado, — diras la demandito, — post duono da horo vi alvenos tie.

* * *

Promenejo trairas aŭtomobilo kuregante. Samtempe trapiediras sprita infaneto kun sia patro kaj vidinte ĝin ekkrias. — Rigardu, paĉjo veturilon kies ĉevaloj forkuris, kaj ĝi nun kuregas por ilin atingi.

T. P.

★ ★ ★

STUDKOMISIO PRI ĈIULANDA VERKARO

(Sekvo)¹

POVU

Sab. — Estas neniu, kiu povu suferi tion! (74)

Orig. — *Això no hi ha qui ho aguantí!*

Rap. — Tion, neniu povus elporti aŭ surporti (aŭ : tio ĉi ja ne estas surportebla!)

PRENU anstataŭ JEN. (Kataluna, *tenir* = havi, preni, teni, jen, nu!)

Sab. — Prenu! Rigardu tuin ĉi dezegnaĵon. (10)

Orig. — *Teniu! Mireu aquest dibuix!*

Rap. — Jen! Rigardu tiu ĉi dezegnaĵon!

PROPA (eble PROPRA) kun la senco PERSONA KARAKTERIZA DE IU...

Sab. — ... sed ke vi faras pentraĵojn... tiel... propajn, tiel personajn, tiel malsamajn de ĉiuj aliaj... (68)

Orig. — ... *però que fas una pintura... tant... leva, tant personal, tant diferenta de la de tothom.*

Rap. — ... sed ke vi havas pentromanieron... tiel... vian, tiel personan, tiel malsaman de tiu de ĉiuj aliaj... (Laŭvorte kaj laŭsence.)

PROPE (eble PROPRE) kun la senco TIEL, *tiel, ĝuste*

Sab. — beleco propre nomita : kaj kiel li sekvis la prope kiun mi enradikigis al li. (12)

Orig. — «*belleza propiamente dicha*» (la frazo estas en hispana lingvo) *I com que ha seguit la «propiamente» que jo li vaig inculcar... (propiamente ankaŭ estas hispana adverbo, uzita kiel substantivo, en la originalo).*

Rap. — beleco tiel, (ĝuste aŭ simple) nomita kaj ĉar li sekvis (eble, pli bone : elektis, aŭ adeptiĝis al) tiun ĉi lastan (aŭ : la simplan aŭ puran) kiun mi enradikis en lin... (Rimarko pri : «kiel li sekvis»)

1) Mallongigoj. — Sab: Teksto de Sro. A. Sabadell. — Orig: Teksto originala. — Rap. Ĝusta traduko laŭ opinio de la Raportinto. — La numeroj montras la paĝojn. (Vidu la numerojn 4^a, 5^a, 6^a, 7^a, 8^a kaj 9^a.)

REBRILI

Sab. — kaj tiel rebrilis, liaj vestaĵoj. = ... se la vestaĵoj ne rebrilis al mi. (115)

Orig. — *i li lluia tant la roba...* = *Si a mi no m'ha lluit la roba...*

Rap. — kaj liaj vestaĵoj estis tiel riĉaj, (aŭ elegantaj) = ... se miaj vestaĵoj ne estis riĉaj (aŭ elegantaj, bongustaj).

RILATI, kun la senco ALUDI, PAROLI aŭ io simila (eble ĉar katalune *relacio* signifas raporto'n, rakonto'n, krom rilato)

Sab. — Mi jam scias pri kio ci rilatas. (14)

Orig. — *Això, ja se lo que vols dir!* (Estas manko de sintakso)

Rap. — Mi scias, kion vi volas diri per tio.

Sab. — La vivo, kiun oni devas fari, laŭ mi aŭdis rilati, kiam oni sekvas tiun ĉi metion,.. (21)

Orig. — *la vida, qu'he sentit dir qu'han de dur els qu'emprenen aquest ofici...*

Rap. — ... la vivo, kiun laŭ tio kion mi aŭdis, devas fari tiuj, kiuj entreprenas (alprenas) tiun ĉi metion.

Sab. — La aŭtoro rilatas la malriĉajn vidvinojn, kiuj ne povas... (54)
(Noto de la tradukinto por klarigi ke la aŭtoro parolas pri, aŭ aludas...).

(*Daŭrigos.*)



ELĈERPITAJ SCIIGOJ

Post balotado de la Lingvaj Komitatanoj estis elektitaj anoj de la «Akademio» Sroj. Lengyel kaj Inglada.

«Kataluna Studkomisio». — La anoj de tiu ĉi komisio estas : Sroj. Pujulà i Vallés, Codorniu, Serdà, Torent kaj Bremón i Masgrau.

La artikolo «Originalaj temoj» kiun ni publikigis en nia n^o 6^a 7^a subskribita de nia kora amiko S. Pubill, Skolpiulo, estis transkribita de *Le Monde Espérantiste*.



ENLANDA MOVADO

BARCELONO

Propaganda esperantista ekspozicio. — Tiu ĉi ekspozicio, organizita de la grupo «Ĉiam antaŭen» estis vere vizitinda. En ĝi ni vidis esperantajn revuojn — kelkaj el ili tute nekonitaj ĉe ni — poŝtkartojn, firmajn katalogojn, foto-grafajojn, dokumentojn de la Internaciaj Kongresoj, gvidlibrojn de la ĉefaj urboj, orignalajn kaj tradukitajn verkojn k. t. p.; bela portreto de Dro. Zamenhof kaj granda verda stelo sub la plafono prezidis tian amason da esperantajj.

Dum la daŭro de la ekspozicio oni organizis la jenajn festojn :

Koncerto. — La 4^{ma} de Decembro okazis bela koncerto en kiu partoprenis la «Orfeo Canigó» kiun direktas Sro. J. B. Espadaler kun la helpo de Finoj. Maria Davalillo kaj Adela Cots kaj Sroj. Agustí Pereña kaj Josep Martorell. Krom aliaj kantoj, estis kantataj esperante la melodiojn *Mi rakontis*, *Mi amis vin* kaj nian himnon *La Espero*'n.

Sro. J. Albiñana ludis tre bone la monologon *Okaza Artisto*'n de Sro. F. Pujulá i Vallés.

Ĉiuj la partoprenintoj ricevis aplaŭdadojn de la multenombra ĉeestantaro.

Teatra festo. — La festo komenciĝis per *Aida* ludita de la muzikistaro «L'Harmónica». Geanoj de la «Atenco Obrero Martinense», societo kie okazis tiu festo, ludis *Juventut*, ricevinte justajn aplaŭdojn pro ilia laŭdinda ludmaniero.

Vivu Esperanto duakta komedio de Sro. M. Cases, estis ludita de la teatra fako de «Universala Frateco». La laboro de Finoj. Grau, Puig kaj Fontanellas kaj Sroj. Grau, Fernández, Nicolau kaj Puig juste sukcesis.

Per bela voĉo Sro. Batlle kantis diversajn kantojn kaj poste oni kantis unuafoje la himnon *Ĉiam Antaŭen!* kiun ni publikigis en la lasta numero de «K. E.». Tiu ĉi himno estis kantata de la geanaro de «Ĉ. A.» kiuj ricevis bruegan aplaŭdadon, pro kio ili estis devigataj ĝin rekanti.

Per «La Espero» kaj fortaj kriegoj vivu Esperanto! kaj vivu Zamenhof! la festo bele finiĝis.

Balo. — Nokte, la saman tagon, la «Atenco Obrero Martinense» organizis balon kiun ĝi dediĉis al la esperantistaj grupoj kaj societoj. Dum ĝi oni dancis «La Rondo'n».

Festeno. — Tiu grava ekspozicio estis malfermata per festeno, okazinta la 18^{ma} de Decembro, en kiu partoprenis la gesamgrupoj kaj gelernantoj de la diversaj kursoj kiujn klarigas «Ĉiam Antaŭen».

Niajn gratulojn ol la organizintoj.

— Pro klopodoj de Sroj. J. Astell, D. Dalmau kaj E. Rey, la Direktanto de «Los Tranvías de Barcelona», Sro. Foronda, donis permeson por ke la tramveturilaj kondukistoj kaj enspezistoj sciantaj nian lingvon kunportu la verdan stelon sur la brusto, same kiel ĝis nun faris por la naciaj lingvoj.

Festoj. — La festo okazinta en la grupo «Barcelona Stelo» plene sukcesis. La lernantoj de tiu ĉi grupo bone elparolas Esperanton kaj tion pruvis per la poezioj kiujn ili legis. Paroladoj pro Esperanto estis ankaŭ faritaj, ricevinte ĉiuj merititajn aplaŭdojn.

La grupo «Universala Frateco» organizis teatran feston, dum kiu oni ludis katalune *El casament per jorsa*, kastile *La epidemia* kaj esperante la monologon, *La benkoj de la promenejo'n* bone ludita de Sro. Grau kaj *Edziĝo kontraŭvola* jam ludita unue katalune.

Ĉiuj ricevis laŭdigajn aplaŭdojn kaj Fino. Grau plie, belan bukedon da floroj kaj blankajn kolombojn.

La festo finiĝis per *La Espero*, kantita de la ĉeestantaro.

Novaj kursoj. — Ĉe la grupo «Esperanto kaj Patrujo», Sro. Bermúdez, komencis novan kurson senpagan. La lernantoj estas multnombraj.

Ankaŭ la grupo «Supren...!» malfermis du kursojn. La unua kurso okazas lundojn, merkredojn kaj vendredojn de la 9^a ĝis la 10^a nokte; la dua kurso, praktika, okazas mardojn. ĵaŭdojn kaj sabatojn je la sama horo; ambaŭ estas senpagaj.

La societo «Espero Kataluna» elektis novan komitaton; jen ĝi: *Prezidanto*, Joan Rosals; *Vic-prezidanto*, E. Pellicer; *Sekretario*, J. Astell; *Vic-sekretario*, E. Roig; *Kasisto*, P. Riera; *Bibliotekisto*, V. Renóm; *Voĉdonantoj*, B. Anglada, J. Llorac kaj C. Soler.

Eksposicio. — La grupo «Universala Frateco» pretigas propagandan ekspozicion, kaj ĝi petas la ĉies kunhelpo.

Ĝi konsistos el tri fakoj: «Fako de ilustritaj poŝtkartoj» «Fako de verkoj» kaj «Fako de propagandiloj».

TARRAGONA

La ĉi tiea Societo por la alvenigo de Alilandanoj nomis niajn samideanojn Sron. Solé, kiel kasiston, kaj Sron. Molas kiel viĉdonanton. Ĝi fervore akceptis Esperanton.

La afabla samideano Rafaelo Naklé, egipciano, veturante al Valencia', vizitis nian urbon.

Sro. Solé Granell, partoprenis kiel delegito de «Tarragono Esperanta» la inaŭguron de la Sabadell'a grupo «Katolika Stelo».

Ĉe nia grupo daŭrigas Esperantan Kurson, Sro. Vidal.

REUS

La nova estraro de Nava Semo konsistas el Sroj. Antoni Clivillés, *Prezidanto*; Pere Aguadé, *Vic-prezidanto*; Joan Simó, *Bibliotekisto*; Enric Aguadé, *Kasisto*, kaj Joan Vallés, *Sekretario*.

Ĉe la razejo de Sro. N. Ribas. Esperante oni gratulis la Kristnaskan feston.

SABADELL

La ĉi tiea societo «Centre de Dependents del Comerç i de la Industria» en lasta kunsido decidis krei «Esperanta Fako'n».

Oni elektis komisionon, kiu en la 30^a Decembro 1910^a kunvenigis la samideanoj partoformontajn tian «Esperanta Fako'n». En tia kunveno oni aprobis regularon kaj elektis la estraranojn.

La inaŭgura festo de «Katolika Stelo» okazinta en 11^a Decembro 1910^a, okazis sukcesplene. En ĝi partoprenis multaj gesamideanoj urbaj kaj aliurbaj.

Se la de «Katolika Stelo» atingotan celon ni devas aljuĝi per tiu-ĉi festo, ni povas aserti ke ĝi triumfos baldaŭe.

La eksposicio organizita de tiu ĉi nova Sabadell'a societo estis vizitata multenombre. -

Ni bedaŭras ne povi recenzi la tutan feston, pro manko da loko.

Dimanĉo 8.^a de Januaro, nia estimata federaciano Sro. J. Buxó faros paroladon priesperantan, ĉe la «Academia Catolica».

MANLLEU

Niaj kursoj bone prosperas.

«Esperanta Amo» organizis ĉiudimanĉajn esperantistajn ekskursojn, en kiu partoprenas multaj geanoj. Ilia celo estas praktiki nian internacian lingvon, por kio multe helpas nia kamarado Coll Calvet.

La Manlleu'anoj deziras feliĉan novjaron al ĉiuj gelegantoj de «K. E.»

TERRASSA

Okazis en nia grupo «Lumon» la 18^{an} pasintan Decembron, la unua festeto el serio kiun oni aranĝas. Ĝi estis dediĉata al nia kara majstro Dro. Zamenhof okaze de la 51^a datreveno de lia naskiĝo. Oni legis diversajn poeziojn, prozaĵojn k. a. adekvatajn al tiu festo. Fine la ĉeestantaro stare kantis *La Espero'n* kaj eliris entuziasmigita de la sukceso kiun ĝi atingis:

Estas elektita en ĝenerala kunsido, la nova komitato por la nuna jaro,

jene : *Prezidanto*, Valentí Alavedra ; *Sekretario*, Josep Ventura ; *Kasisto*, Miquel Astals ; *Arĥivisto*, Baltasar Pineda ; *Voĉdonantoj*, Adolf Soldevila, Anton Costajussá kaj Josep Arisó.



EKSTERLANDA MOVADO

BELGICA

FREDERIK DE SKEEL - GIÖRLING

Amb la mort den Skeel Giörling l'esperantisme danés ha perdut el seu més eminent adepte, insustituible, car ell fou qui introduí l'Esperanto a Dinamarca, ara fa uns nou anys, durant els quals se pot dir que no ha fet més que vida esperantista ; la seva major preocupació ha sigut per a aquest ideal. Parlar den Skeel Giörling es gairebé 'l mateix que contar l'istoria del moviment esperantista a Dinamarca, avent merescut per això 'l nom de «pare de l'esperantisme danés». Dintre l'esperantisme ha tingut importants carregs, i no solament en el seu país. Fundador de diferents agrupaments y de la revista *Dana Esperantisto*, de la qual n'avia sigut principal redactor. En els «Floraj Ludoj» de Barcelona seia amb el jurat.

Ara darrerament redactava la *Kongresa Revuo* en l'Exposició de Bruselles... en fi, que l'Esperanto s'ha alleugerit d'un dels seus majors puntals.

Que la pau sigui amb ell!

7.^e *Congrés Internacional d'Esperanto* (20-27 d'Agost 1911). — El senyor Schmit, qefe de policia d'Anvers, ha fet saber al personal a ses ordres, l'obertura d'un curs d'Esperanto per als oficials i empleats de la policia urbana. Seran concedides dues ores de vacances als que y concorrin per a facilitar-los seguir regularment la instrucció, la qual serà organitzada dintre de poc.

— Fem una nova crida als esperantistes per a que no alassin adherir-se al Congrès, per a el qual repetim lo que havem dit anteriorment : la greu responsabilitat moral i financiera de «La Sepo» fa necessari saber, com més prompte millor, de quines entrades pot disposar aproximadament. La organització material del Congrès indispensablement depèn dels llurs auxilis amb diner.

— Per a donar èxit al concurs literari que organitzarà «La Sepo» preguem als periodics, societats i als benevols correligionaris esperantistes que ofereixin

premias per als temes que vulguin presentar. Que's serveixin informar d'això al Secretari-Caixaer de «La Sepo» (Sro. Ero. W. van der Biest, 76, Minderbroedersrui, Antwerpen [Canal des Recollets], Anvers), abans del 15 de Març vinent. Es de desitjar que B. E. pugui publicar una primera llista de premias oferts amb els temes que an ells se relacionin en el nombre de Janer.—*La Sepo*.

— El nombre de congressistes ha arribat ja a 262.

— Es d'esperar que tots els nostres lectors hauran rebut amb el nombre de Desembre de K. E. una fulla-aligilo. Aquells dels nostres federats que'n desitgin de noves, poden reclamar-les per postal a la Redacció de K. E.



BIBLIOGRAFIO

Ni nur raportos pri verkoj duope senditaj al la Redakcio.

Bulgaraj Rakontoj, de Ivan Minčer Vazov. Tradukis At. D. Atanasov, (Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin.) — Prezo: 0'10 sm.

Estas tute rekomendinda tiu ĉi libreto. Dum la legado de ĝiaj Rakontoj ŝajnas ke elspiro de tiu lando enŝoviĝas en vin kaj vi sukcesas travivi ĉiujn okazojn en ĝi naskiĝintaj. Ĝi ja emocias. Kaj ĉu oni alion povas postuli? — *Civitano*,

Noto pri la Inicilo Matematika (patentita en kelkaj landoj.) Jacques Camescasse. — Librejo Hachette kaj K^o, 79, Boulevard Saint-Germain, Paris. — Prezo: 4 franko (0'40 sm.).

Ni recenzos en venonta numero.



OFICIALA PARTO

2^a Kongreso de la «Kataluna Esperantista Federacio» okazonta en Tarragona, dum la monato Junio. — En la venonta n^o ni konigos la decidon de sinjoroj F. Pujulà Vallés, Joán Rosals kaj D. Serdà, kiujn en la unua Kongreso oni elektis kiel organizintojn de la «Literaturoj Konkursoj».

En ĉiu postvenonta n^o ni konigos la kongresajn organizojn.

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

12. strato Gracia. — **SABADELL**
BARCELONO-HISPAŬUJO

AVIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezono la manuskriptojn, neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendadas.

ENHAVO: Tarragona!... — Pri la vortaro de Grosjean Maupin. — Eho. — Studkomisio pri ĉiulanda verkaro. — Enlanda Movado. — Alilanda Movado. — Oficiala Parto. — Bibliografio. — Korespondado. — Literatura Konkurso (aldono).

TARRAGONA!...

HAN passat nou mesos desde que a Sabadell s'acordà la celebració del Segon Congrès de K. E. F. a Tarragona. La vella ciutat, l'istorica, la que umilment, quietament, influix en la cultura encara avui, anc que no amb tanta poixança com en segles passats (el record dels quals ha quedat perpetuat en monuments i llibres), va enviar-nos, per son ilustríssim alcalde, la lletra de convit. En aquells jorns, quelcom que s'avia incorporat a nosaltres en dies no molt llunyans, de fresc record, va vibrar novament, i, unanims, els congressistes catalans varem acceptar i aplaudir el convit. Aquella lletra refermava la certesa que en nostra terra se 'ns considerava una força, un element de vida, de cultura; força i element que amb anterioritat ens avien reconegut les forces vives socials de Barcelona, de Catalunya, d'Espanya, del món sencer, i l'acte de consagració de les quals tingúe lloc a Barcelona amb el V Congrès d'Esperanto.

«— Som una força!» deiem, convençuts, després del Primer Congrès, després d'aver escoltat les paraules de pregon reconeixement i distinció que les entitats locals ens adreçaven i després d'aver oit el convit de Tarragona. Conscients d'aquella força, però, prou ens do-

navem compte que contrèiem una responsabilitat davant dels nostres compatriotes i dels *samideanoj*: contreiem el deure de no deixar apaivagar ni afeblir l'entusiasme nostre per l'Esperanto; preniem amb nosaltres l'obligació de divulgar el nostre ideal continuament, sense parar. Contrèiem a l'ensempe el compromís de correspondre dignament, amplem, al convit que la ciutat del Camp ens enviava.

Dins la quietut de la sala de reunions, les comissions treballen com abelles, retirades en el llur rusc, elaboren per a demà, se fan plans i projectes, s'organitzen festeigs i recepcions, se fan esboços i croquis. L'obra s va pastant, i paulatinament van apareixent els detalls, les línies, els perfils, fins que a la fi l'obra serà finida. En el dia d'avui la tasca del Congrés de Tarragona apar les vigílies de la primavera, quan la terra sent en son sí l'inquietut de la florida que s'inicia. Demà, demà passat, serà l'esplendida florida que inondarà de joia ls nostres esperits.

Contribuim-hi tots, companys: tots sens mancar-n'hi un. Tarragona ns vol, i, franca, desinteressada, ens obre ls braços amb gest ample. Fem que, amb la nostra individual col·laboració, la ciutat se senti joiosa del nostre esforç; i que no desmentim amb la nostra acció el concepte que de nosaltres i de la nostra institució s té. Per això cal que ns proposem triomfar, car ara es l'ora. Més que totes les propagandes individuals i aïllades, serà d'eficàcia la propaganda que pels actes del Congrés portarem a terme. La nostra reunió anyal serà l'acte més convincent pera ls refractaris i els indiferents, i pera ls contraris si n'hi ha.

Hem de tenir concienca que es nostre l pes de la responsabilitat davant de tot el món esperantista; que nosaltres som la representació d'aquell moviment a la nostra terra. Per dignitat, per l'Esperanto, fem que aquell acte sigui gran, pera que pugui restar-ne inesborrable record.



PRI LA VORTARO DE GROSJEAN MAUPIN

ŜAJNAS al ni, ke certiginte ke en nia lando estas neniŭ idisto, ke la reformemo estas tute nekonata de ni, kaj ke ni estas sinceraj, senpasiaj, konvinkitaj partianoj de la Fundamento kaj de la deklaro de Boulogne sur Mer, oni ne juĝos nin suspektaj se ni

aldonas ke la vortaro de Grosjean Maupin tute ne maltrankviligis nin, kaj ke ni *ne* estas pretaj subskribi ian ajn proteston kontraŭ ĝi.

Unu fojon por ĉiam ni akceptis la Fundamenton, kaj unu fojon por ĉiam ni akceptis la Oficialajn Instituciojn kun iliaj roloj en la evoluado de la Lingvo. Krii. protesti, barakti tial ke iu, en uzo de sia rajto proponas aŭ konstatis novajn radikvortojn, kiujn nur la praktikado valorigos kaj la Akademio oficialigos, tion ni ne faros, ĉar tia agado, krom tio, ke ĝi estus kontraŭa al la individua libereco, montrus mankon de fido al niaj Institucioj, kaj al nia natura forto, kaj katenus por ĉiam la lingvon.

Amaso da vortoj nefundamentaj troviĝas en la vortaro de Kabe, kaj en tiu de Boirac, amasego da ili troviĝas en la Enciklopedia vortareto de Verax, kaj neniuj protestoj montris sian bruon kapon super iliajn paĝojn nek super la kapon de tiuj eminentaj aŭtoroj. Ni ne scias ĉu estas en Esperantujo privilegioj, sed se ili ekzistas, oni ne devas kalkuli sur nin por ilin respektigi. Ni kritikos la radikvortojn, kaj ni uzos aŭ ne uzos ilin, laŭ nia plaĉo, sed en ĉiu okazo ni nur scios danki la aŭtorojn, kiuj donis al ni la okazon prilabori por la riĉigado kaj kontrolado de la Lingvo. Sed same por ĉiuj.

Oni murmuris ĉirkaŭ ni, ke tiu protesto estas incitita de Sro. Cart pro personaj kaŭzoj. Ni ne povas kredi tion.

La *Dictionnaire Français-Esperanto* (jen pli grava afero ol Vortaro Franca Esperanta!) eldonita de la Presa Esperantista Societo kun antaŭvorto de Sro. Cart, estas modelo de enkondukado de plej arbitraj vortoj en nian leksikonon. Ni ne rajtas eĉ supozi, ke Sro. Cart havas du malsamajn mezurilojn, unu por la vortaroj de la firmo, kiun li direktas, alian por la vortaroj de aliaj firmoj.

Ni preferas kredi tute simple, ke tiuj, kiuj protestas forgesis momente ke nur la Akademio havas la rajton oficialigi la vortojn uzitajn kaj necesajn, kaj ke la rolo de la Akademio estus nula se oni rajtus neniam uzi novajn vortojn, kaj sekve, ilin proponi, kaj sekve ilian valoron kontroli per la uzado.

LA REDAKCIO



EHO

U NU el la ĉefaj redaktoroj de la Kataluna ĵurnalo *El Poble Català* publikigis, antaŭ kelkaj tagoj, en la interesa fako *Ehoj*:

«Sro. Pujulà i Vallès estas kiel la prezidanto de nia respubliko esperantista. Aŭ almenaŭ nia urbestro. Estas mirinda en li, arbitrulo kaj satirulo estinta, la fido kiun li havas en lingvo elirinta el la gramatikaj laborejoj. Ĉar Sro. Pujulà, kun sia tuta energio de entuziasmo kaj sia senvantea kulturo, bataladas por ke, iam, sur la kapoj de la homoj aperu la mirakla flamo de Sankta lingva Spirito kiu tra la tero dissemos la vortojn «interkompreniĝu unuj kun aliaj», imitante, tiel, la «amu unuj la aliajn» malnovajn.

— Ĉu Esperanto, amiko Pujulà, ne malantaŭeniras?

— Ne.

— Sed, ĝi kreskas do?

— Tre multe. Nur en Barcelono ni estas pli ol tri mil esperantistoj.

— Se via partio iom pli grandiĝas, vi povos baldaŭ gajni la balotojn. —

Pujulà, post ekrideto, diris:

— Kaj stranga afero. En fremdaj landoj, Esperanto estas apartenaĵo de la homoj poliglotaĵ, inteligentaj kaj eĉ revoluciemaj. La literaturistoj ankaŭ fervore ĝin utiligas; tamen ĉi tie, la esperantista plimulto estas precize formata de nekleraj laboristoj. Kun kia fido kaj entuziasmo ĉi tiuj lernadas! Mi vidas kiel belan kaj esperoplenan spektaklon la priokupon de masonisto aŭ metallaboristo, pri gramatikaj aferoj. Estas iuj sciantaj tiel bone la verbojn kaj adjektivojn kiel sian propran metion. —

Kun entuziasmo kreskanta parolas Pujulà. Lia parolo devigas nin forlasi ĉian ajn ironion kaj kredi, tute kredi, ke la tasko de tiuj homoj estas kultura kaj civitama. Lia evangelia libro estas gramatiko, kiel ĉe aliaj estas biblio aŭ programo.

Je la fino de nia interparolado, Sro. Pujulà donis al ni ĉi tiun eĥon:

— Post la dua Pasko, en tago ne ankoraŭ difinita, okazos en Tarragona la dua Kataluna nacia kongreso.»



STUDKOMISIO PRI ĈIULANDA VERKARO

(Sĉkvo)¹

SCĜNO kun la sencŉ SCENEJO

Sab. — La sceno prezentas tre malriĉan loĝejon. (48)

— La sceno prezentas pentristlaborejon. (86)

— Sama sceno, kiel en la unua akto. (123)

SE kiel interjekcio aŭ helpavorto tradukante la vorton katalunan *si*, kiu estas ofte uzata en tiu lingvo kun la sencŉ «sed» «ja» aŭ ia alia vorto aŭ frazo, aŭ tute simple por plifortigi la frazon. Oni renkontas en «La Patrino» «se» kiel tradukon de kataluna *si*.

Sab. — Ne, se mi diras al vi tion, kaj malgraŭ tio mi ne plendas, (22)

Orig. — *No, si t dic aixŉ, i no s que m planyi.*

Rap. — Ne kiel plendon, mi diras tion al vi.

Sab. — Se mi ne faras tion nur por ci! (30)

Orig. — *Si no ho faig solament per tŉ!*

Rap. — Sed, ne nur por ci mi faras tion!

Sab. — Se ĉio estas studaĵoj, kaj nenio plu! (32)

Orig. — *Si tot son estudis i res mŉs!*

Rap. — Sed ĉio estas nur etudoj! (aŭ: sed ĉio estas etudoj kaj nenio alia!) (Rimarko pri «plu»).

Sab. — sed... se tio ne estas ebla! Se ne estas ebla! (68)

Orig. — *Perŉ... si no pot ser! Si no es possible!*

Rap. — sed... tio ne estas ebla! Ne estas ebla!

Sab. — Se tio estas bono por ĉiuj! Se mi sentas ĉe la tempioj ĝian bruladon! Se mi sentas min kvazaŭ senpeza! Same kvazaŭ mi levigus! Se mi estos feliĉa patrino!... Ĉu vi ne volas, ke ili venu? (36)

Orig. — *Perŉ si serà un bŉ per a tots plegats! Si ia veig la claror de la*

1) Mallongigoj. — Sab: Teksto de Sro. A. Sabadell. — Orig: Teksto originala. — Rap. Ĝusta traduko laŭ opinio de la Raportinto. — La numeroj montras la paĝojn. (Vidu la numerojn 4^a, 5^a, 6^a, 7^a, 8^a, 9^a kaj 10^a.)

gloria! Si 'm sento la cremor als polsos! Si 'm sento com si no pesés! Com si m'alcés tot sol en laire! Si serem feliços mare!.. Que no voldria que vinguessin?

Rap. — Sed ĝi ja estos bono por ĉiuj ni! Mi jam vidas la helon de l'gloro! Mi jam sentas ĝian brulon, (ardon) ĉe la tempioj! Mi sentas min kvazaŭ senpeza! Kvazaŭ mi tute sola levigus!... Ni ja estos feliĉaj, patrino!... Ĉu vi ne volas ke ili venu?

Sab. — sed, se mi diras al ci, ke mi ne... (87)

Orig. — *Però si t' dic que no...*

Rap. — sed mi ja diras (al ci) ke ne...

Sab. — Ne se tute ne malutilas al mi, ke oni min elveku! (92)

Orig. — *No, si no 'm fa res que 'm despertin!*

Rap. — Nu, estas al mi egale, ke oni min veku!

Sab. — Sed vi forgesis diri al li, ke ne estus la pentrarto, kiu suferigadus lin, se nur tiuj, kiuj sin nomas bonfaruloj. (107)

Orig. — *Però 's van descuidar de dir que no 'seria la pintura lo que 'l faria patir, sinó 's que 's dinen benefactors.*

Rap. — Sed vi forgesis diri, ke ne estos la pentrarto kio suferigados lin, sed nur tiuj kiuj sin nomas bonfaruloj.

Sab. — Se ili sendos por ke ni revenu... (119)

Orig. — *Si 'ns enviarán a buscar...*

Rap. — Ili ja venigos nin. (aŭ: ili ja repetos nin veni.)

Sab. — ke se ci ne silentigos min! (120)

Orig. — *no, si a mi no m'aturarás!*

Rap. — Ho ne, min vi ne haltigos! (Silentigos?)

Sab. — Sed, se estas ŝi, mi ĵuras ke ŝi estas, kiu kuraĝigas min labori! (120)

Orig. — *Però si 's ella: si t' juro que 's ella la que 'm dona dabit de treballar.*

Rap. — Sed estas ŝi, mi ĵuras ke estas ŝi, kiu donas al mi fortojn por la laboro!

Sab. — Kion mi diros al ci, se ci ne komprenos! (73)

Orig. — *Que t' diré jo, si no 'u entendrtas!*

Rap. — Kion mi diros al ci! Ci ja ne komprenos!

Sab. — Do, mi nenion nutras, se nur tion kion mi povas nutri. (100)
 Orig. — *Doncs jo no crio res que no pugui mantenir-ho.*

Rap. — Do, mi bredas nur tion, kion mi povas nutri (Laŭvorte: Do, mi bredas nenion, kion mi ne povas nutri.)

SEKVI kun la senco IRI DE — AL

Sab. — Kiam mi vidis ekspozicion, mi manĝis ĝin per la okuloj; mi sekvis ĉiun pentraĵon, unu post la alia, kvazaŭ ili estus floroj kaj mi abelo. (40)

Orig. — *Quan veia una exposició la devoraba amb els ulls: anava seguint tots els quadros d'un a un com si fossin flors i jo una abella.*

Rap. — Kiam mi vizitis ekspozicion, mi manĝegis ĝin per la okuloj; mi iris de unu al alia pentraĵo (aŭ de pentraĵo al pentraĵo) kvazaŭ ili estus floroj kaj mi abelo.

SEKVU

Sab. — Ci sekvu. (40)

Orig. — *Ves dient.*

Rap. — Diru ankoraŭ. (aŭ) Daŭrigu.

SESHORA

Sab. — ... la seshora veturilo. (128)

Orig. — ... *el cotxe de les sis.*

Rap. — ... la veturilo de la sesa horo.

SUNIGI

Sab. — ... tiun placon sunigitan. (77)

Orig. — ... *aquella plaça assoleiada.*

Rap. — ... tiun placon banitan de la suno (aŭ helan de suno).

ŜANCO, kun la senco BONA ŜANCO

Sab. — Ĉar hodiaŭ mi atendas la ŝancon.

Orig. — *Es que avui espero la sort!*

Rap. — Ĉar hodiaŭ mi atendas (esperas) la bonan ŝancon!

SATI VIDANTE

Sab. — Mi pli ŝatas vidante bakajon el tiuj! ol... (9)

Orig. — *M'estimo mès veure una fornada d'aquestes... que...*

Rap. — Mi pli preferas vidi (aŭ: pli ŝatas vidi) bakajon... ol...

Trouzo de TIE en la traduko de kataluna HI (franca y)

Sab. — Pro tio mi ilin iras serĉi. = sed... = Mi iras tien. (30)

Orig. — *Amb això, vaig a cercarlos. = Pero .. = Hi vaig.*

Rap. — Tial, mi iras serĉi (eble: renkonti) ilin = sed... = Mi iras.

Sab. — Kiel lipoj ĉirkaŭitaj de animo por tie kisi kaj preĝi. (63)

Orig. — *Com uns llavis voltats d'una ànima per a fer-hi petons i resar-hi.*

Rap. — (Mi sincere konfesas, ke mi tute ne komprenas, kion signifas «lipoj ĉirkaŭitaj de animo» nek kion oni kisas — ĉu la lipojn, ĉu la animon, — nek kian signifon havas la verbo preĝi en la frazo. La originalo estas kiel eble malbonstila. Eble en tiu ĉi okazo, la «tie» de la traduko bone konservas la konfuzon).

Sab. — Nun... mankas nur unu afero... ke ci ĉeestu tie, Sed mi jam scias ke ci ne povas ĉeesti tie. = Sed mi estos tie! Tie mi estos... kiam... (79)

Orig. — *Ara no mès hi fa falta una cosa... que tú hi fossis. Però jo ja sé que no pots ser-hi. = Però hi seré! Hi seré quan...*

Rap. — Nun... mankas nur unu afero... via ĉeesto. Sed mi bone scias, ke ci ne povas ĉeesti. = Sed mi ĉeestos! Mi ĉeestos... kiam...

(Daŭrigos.)



ENLANDA MOVADO

BARCELONO

Paroladoj kaj kursoj. — Nia amiko Sro. D. Dalmau malfermis kurson ĉe la «Museo Pedagógico Experimental» per parolado okazinta la 1^{an} de Januaro 1911^a kaj estis tre aplaŭdata de la multenombra ĉeestantaro. Post la

parolado aliĝis al la kurso pli ol 20 lernantoj. Tiu kurso okazas ĉiu mardon kaj jaŭdon noktoe kaj estas klarigata laŭ la natura metodo.

En la grupo «Barcelona Stelo» estis malfermata kurso por tramveturilistoj klarigata de Sro. Grau Casas. Ĝi okazas lundojn kaj jaudojn de la 9^a kaj 1/2 ĝis la 10^a kaj 1/2 nokte.

En la loĝejo de la kvarteta societo «La Filantrópica» okazas ankaŭ kurso ĉiujn mardojn kaj jaŭdojn nokte de la 9^a ĝis la 10^a.

Esperantistaj vendredoj. — La vendredon 13^{an} de Januaro okazis la unua kunveno ĉe la grupo «Semo» (Ateneu Enciclopèdic Popular).

La samideanoj kiuj kunvenis en la salonon de tiu grupo, agrable pasigis horon, aŭskultante la elokventan paroladon de la Prezidanto de la K. E. F., Dro. Bremón, kiu bedaŭris la mankon de aĉrobatitaj profesoroj en Katalunujo.

La ĉeestantoj premiis la laboron de Dro. Bremón per longa aplaŭdado kiu varme aprobis la laborojn kiujn la Komitato de K. E. F. faras por la disdonado de «Atesto pri lernado kaj pri profesoreco».

Festeno. — Por solenigi la V^{an} datrevenon de la fondiĝo de «Espero Kataluna» tiu Societo organizis festenon kiu okazis la 30^{an} de Decembro en la societa sidejo. La partoprenintoj estis multenombraj kaj inter ili ni vidis multajn fraŭlinojn.

La Prezidanto Sro. Rosals malfermis la paroladojn kaj post li parolis Sroj. Cases, Bremón, Pellicer, Bartomeu, Astell, Fino, Saltiveri, Sroj. Morató, Dalmau kaj Urbez. Ĉiuj esprimis la deziron ke la vivado de la Societo estu longa kaj fruktodona, ricevinte ĉiujn bruegan aplaŭdadon. Oni sendis telegramojn, laŭ propono de Sro. Cases, al Dro. Zamenhof kaj Sroj. Sebert kaj Bourlet.

Finigis tiu bela festo en dancado, kiun la gejunuloj daŭrigis ĝis la unuaj matenaj horoj. La sidejo estis bele ornamita per esperantaj tolaĵoj.

Teatra festo. — Organizita de la grupo «Supren...!» okazis teatra festo la 31^{an} de Decembro en la teatreto de la C. N. R. Fivaller.

La ganoj de tiu grupo ludis la komedion *Fianĉinigo de Sovagulineto* kiu estis ludata unuafoje, kaj la katalunan komedion *El mestre de minyons*.

La kataluna komedio plene sukcesis. Gratulojn al ĉiuj. La agemeco de la aktoraro estas vere laŭdinda.

Esperantistaj vespermanĝoj. — La 16^{an} de Januaro okazis la unua esperantista vespermanĝo en la hotelo «La Terrasse». Inter la ĉeestantoj ni vidis Srojn. Pujulà, Bremón, Rosals, Codorniu, Torent, Balsells, Dalmau, Astell, González, Pellicer kaj aliajn kies nomojn bedaŭrinde ni ne memoras.

Dum la vespermanĝo la tempo rapide forflugis kaj ni estas certaj ke la venontaj *deksesaj* atingos ankoraŭ pli da sukceso.

Festo de la Epifanio. — La 6^{an} de Januaro okazis en la sidejo de «Espero Kataluna» tiu ĉi festo kiu bone sukcesis dank'al la spritaj leteroj kiujn la *Reĝoj* ricevis de la societanoj; inter la subskriboj ni memoras la nomojn de Finoj. Cases, Saltiveri, Anglada, Gibert, Cunill, k. a.

Nova Komitato. — La grupo «La Rondo» elektis la jenan novan komitaton : *Prezidanto*, Joan Campdelacreu; *Vicprezidanto*, Jaume Muria; *Sekretario*, J. Ferrer; *Vicsekretario*, J. Aran; *Kasisto*, P. Aguiló; *Kalkulisto*, J. Estrems; *Bibliotekisto*, J. Cervera; *Voĉdonantoj*, R. Just, J. Ferrando, N. Brias kaj Rozo Padreny.

Esperanta Rubriko de «La Publicidad». — Tiun rubrikon — kies redaktoro estas Sro. Delfi Dalmau — ĉiusemajne oni pli legas. Krom la barcelona movado ĝi enhavas gravajn artikolojn verkitajn de niaj pioniroj; ĝin, do, devas legi ĉiusemajne ĉiu esperantisto.

MANLLEU

Ĉiuj lernantoj de nia samideano B. Nogué, kreis «Esperantista Amikoco» n. Ilia una decido estis aliĝi al «K. E. F.».

La 1^{am} de Marto, la Kataluna societo «Rafel de Casanova» malfermos Esperantan kurson.

MAHO (Balearaj Insuloj)

«Mahona Grupo Esperantista», elektis la jenan Komitaton : *Honoraj Prezidantoj*, Dro. Zamenhof, Sro. J. Juaneda, Pastro., Sro. Prezidanto de Scienca Mahona Ateneo kaj Sro. Prezidanto de H. S. p. p. Esperanto; *Aktiva Prezidanto*, Sro. J. M.^a Doménech Puigjaner; *Voĉdonantoj*, Sroj. A. Tuduri Ponseti, J. Sala Gomila, A. Fradera Carreté; *Kasisto*, E. Sintes Rotger; *Sekretario*, Sro. B. Pons Aragonés; *Arĥivisto*, Sro. P. Ripoll Busquets.

Ĝia adreso estas : Grupo Esperantista. — Ateneo.

LLEIDA

Niaj samideanoj de Lleida estas pretigante la fondon de grupo. La provizora komitato konsistas el : Sro. J. Martínez Vallespí, infanteria kapitano, *Prezidanto*; Sro. F. P. Morera, arĥitekturisto, *Vicprezidanto*; Sro. F. Fautá, profesoro, *Sekretario*; Sroj. J. Solé, R. Sans, J. Morante, *Voĉdonantoj*.

Ni esperas ke per la fervoro kaj agemeco de tiuj samideanoj, Esperanto baldaŭ triumfos en tiu ĉi urbo. Antaŭen!

SABADELL

Sub la nomo «Komerco-Industri-Esperantista Oficistaro» nia grava societo «Centre de Dependents del Começ i de la Industria» fondis Esperantistan Sekcion, kies celo estas faciligi al siaj anoj la pligrandigadon de siaj konoj pri Komerco kaj Industrio, per Esperanto, kiun ĝi propagandos penante fari ĝian uzon ordinara, kiel eble plej baldaŭ, en internaciaj komercaj kaj industriaj aferoj. Sroj. R. Graupera Garrigó, *Prezidanto*; J. Bernaldo, *Vicprezidanto*; R. Bassols, *Kasisto*; J. Arús, *Bibliotekisto*, kaj P. Oriach Solá, *Sekretario*, partoformas ĝian estraron.

La ĉiutaga jurnalo *Diari de Sabadell* enpresigis pri-Esperantajn artikolojn subskribitajn de nia samurba federaciano J. B. M.

— «Esperanta Semo», okazigis propagandan feston en la granda salono de la grava laborista societo «Cercle Republicà Federal» (Respublikana Federala Klubo) kie la vorto Esperanto entuziasmigis la multajn ĉeestantojn,

En ĝi partoprenis Sro. Administranto de K. E. Joan Piferrer, legante la verkon «Esperanto ĉe la laboristoj», de nia amiko Josep Altura.

Nia redaktoro Antoni Martí, prezidanto de Esperanta Semo priparolis pri la temo «Progresoj de Esperanto» kaj «Esperanto kaj la internaciá paco».

Sro. Joan Camps, vicprezidanto de E. S. pritraktis la temon «Naciismo-Federalismo-Esperanto».

Sro. Joan Mora, Prezidanto de la Respublikana Federala Klubo, prezentis la partoprenintojn, kaj ĉe la fino, la prezidanto de E. S. dankis la aŭdantaron.

Ĉiuj estis tre aplaŭditaj.

VENDRELL

La ĉi tica grupo «Frateco» elektis la jenan komitaton: *Prezidanto*, Jacob Marcé; *Sekretario*, Joan Constantí; *Kasisto*, Magí Güell; *Voĉdonantoj*, Salvador Evertil kaj Ramon Corbella.

La 4^{na} de Marto la grupo inaŭguros ĝian verdan standardon.



ALILANDA MOVADO

«La Sepo» resta profundament reconeguda al gran nombre de revistes esperantistes que han cridat l'atenció de llurs llegidors sobre l Seté Congrès, i preferentment al *Holanda Pioniro*, *Paris-Esperanto* i *Universo*, els quals li han dedicat articles especials, i a *Germana Esperantisto*, que mensualment publica correspondencies sobre «La Sepo». També està molt agraida a la «Germana Esperantista Societo», que organitza conferencies, amb projeccions lluminoses, sobre l Congrès durant la VI assamblea d'esperantistes alemanys, que tindrà lloc a Lübeck els dies 4 i 5 de Juny.

— El secretari-caixer de «La Sepo» reb moltes cartes en les quals se li demanen tota classe d'informes. A fi de no compliear el gran treball que representa contestar a cada un dels demandants, desitja que s'atenguin a les noticies que tots els mesos publicarà la *Belga Esperantisto*. Una circular especial de «La Sepo» serà repartida durant el mes de Març.

— El president de «La Sepo» va parlar amb els gerents del Sindicat d'Hôtels i Restaurants d'Antwerpen. Aquests senyors prometeren fer tots els possibles pera facilitar l'estada dels esperantistes a dita ciutat, prometent que molt aviat podrien oferir notes de preus. Tots aquests informes seran publicats en circular, també especial, en el número de Març del *B. E.*

— El reverent senyor A. Van Griethuysen s'oferi a fer el sermó en esperanto durant la festa evangelista que tindrà lloc el 20 d'Agost, dia en que s'obrirà l Congrès.

— Referent als temes que seran tractats en el Concurs Literari, podem donar les següents noves:

El Comitè organitzador del Congrés ofereix 100 francs a la millor *Historia de l'Esperanto*. (20 pàgines com les de la B. E.)

La Redacció de B. E. ofereix 50 francs a la millor noveleta original. (12 pàgines format de B. E.)

El «Grup d'Esperantista d'Antwerpen» regala 50 francs a qui millor descapdelli el següent tema: *Sobre l'utilitat de l'Esperanto en el Comerç: manera d'introduir l'ús de la llengua internacional a les relacions comercials*.

— El Comitè, per medi d'una vibrant alocució dirigida a tots els esperantistes, desitja que aquests proposin més temes i ofereixin premis. Dirigir-se, per a més detalls, al secretari-caixer de «La Sepo».

— Hi ha creixent entusiasme per la representació de *Kaatje* durant el Congrés, essent moltíssims els exemplars ja venuts.

— El ministre belga d'Arts i Ciències ha posat ja a disposició del Comitè el gran Saló de festes i totes les dependències de l'«Ateneu Reial».

— «La Sepo» ha obert compte corrent en el «Banque de Reports».

— El nombre de congressistes adherits fins al 4 de Febrer es de 422.

(Extret de *Belga Esperantisto*.)



OFICIALA PARTO

Reunit el Comitè Directiu de «K. E. F.» el dia 19 del corrent, després d'oberta la sessió pel president Sr. Dr. J. Bregon Masgrau, el Sr. Joan Piferer, administrador caixer, feu conèixer el moviment administratiu durant l'any 1910, l'estat de comptes del qual, després d'esser examinat, fou aprovat per presentar-lo als senyors socis de «K. E. F.»

Després de breu discussió referent a l'ordenació de cobrances per a 1911, s'acordà que s'enviessin a tots els delegats les *membrokarlojn* de llur respectiva localitat, pera que 'ls senyors socis facin efectiva an el delegat corresponent la quota anyal; i que 'ls que no puguin fer-ho d'aqueixa manera enviïn directament l'import an aquesta Administració en segells de correu de 15 centims de pesseta.

Després se parlà del proper Congrés de «K. E. F.» a Tarragona, acordant el Comitè enviar les instruccions necessaries a la societat «Tarragono Esperanta» per a que, d'acord amb les principals entitats i autoritats de Tarragona, nomeni el Comitè local per a l'organització dels festeigs i demés actes que y tindran lloc, fixant pera llur celebració 'ls dies 24 i 25 de Juny.

Finalment, el Comitè acordà fer present a tots els federats que vulguin presentar algun tema a discussió que, d'acord amb l'article 7 del nostre reglament, tenen temps fins al 15 de Maig d'enviar-lo al lloc social, per a que se'n pugui així donar coneixement en el número de Juny.

Tots els temes auran de venir firmats per llurs autors, els quals auran de defensar-los davant del Congrés.

Solament podran prendre part a les tasques del Congrés els federats, per a lo qual serà necessari tenir ja la *membrokarlo* de 1911.

Mensualment el Comitè anirà donant els detalls necessaris per a que pugui

tot-om veure l'importancia que té'l nostre Congrés per a l'avenir de l'Esperanto a Catalunya.

Veus-aquí, ara, els comptes que presenta'l Comité Directiu :

MOVIMENT DE CAIXA EN 1911

Poblacions	Socis inscrits	Quotes cobrades	Pessetes	Cts.
Sabadell	42	40	120	
Ripollet	1	1	3	
Reus	12	12	31	50
Sant Llorenç Savall	1	1	3	
Vilanova i Geltrú	6	6	16	
Vic	24	16	48	
Barbarà del Vallès	3	3	9	
Balaguer	2	2	6	
Cambrils	2	2	6	
Olot	27	27	81	
Terrassa	53	50	150	
Aiguafreda	1	0	0	
Manlleu	9	9	27	
Barcelona	87	80	240	
Tarragona	8	8	24	
Premià de Mar	1	1	3	
Castellar del Vallès	2	1	3	
Tivissa	1	1	3	
Moncada	1	1	3	
Mataró	1	1	3	
L'Escala	1	1	3	
Berga	1	1	3	
Sant Feliu de Codines	1	1	3	
Arbós	6	6	18	
Vendrell	2	2	6	
Igualada	6	4	12	
Girona	7	7	21	
Vilafranca de Penadès	2	2	6	
Caldes de Malavella	1	0	0	
Borges Blanques	1	1	3	
Total socis	312	287		
Entrega de la societat « Esperanta Semo » a « K. E. F. », so- brant de la subvenció de l'Ajuntament de Sabadell a dita entitat			175	
Exemplars de K. E. venuts <i>ponumere</i>			6	40
Total entrats a caixa			1,035	90

DESPESES DE «K. E. F.» EN 1910

Mes	Dia	Conceptes	Ptes.	Cts.
Febrer	1	Factura Horta.	22	
»	6	3 fulls paper segellat.	7	
»	10	Viatge a Barcelona per a aprovació del Reglament.	2	
»	17	1,000 sobres i paper cartes.	12	
»	21	Factura Campmany	11	50
»	22	» Giner.	32	
»	28	Despeses correspondència d'aquest mes.	9	35
Març	2	Viatge a Barcelona per a aprovació del Reglament.	2	
»	5	3 llibres ratllats per a secretaria	2	25
»	17	Un velograf	6	
»	31	Despeses correspondència d'aquest mes.	2	35
Abril	4	Factura «L'Avenç»	102	50
»	26	1 full de paper segellat	2	
»	30	Despeses correspondència i enviar revista	8	90
Maig	6	Factura «L'Avenç».	100	
»	12	» Ribera	30	
»	16	Remesa telegrama a Varsovia.	9	65
»	31	Despeses correspondència i enviar revista	8	30
Juny	18	Factura Zanni i C. ^a	20	
»	20	» «L'Avenç».	205	
»	30	Despeses correspondència i revista	6	90
Juliol	31	» » »	7	50
Agost	30	» » »	6	65
Setembre	22	Factura «L'Avenç»	158	75
Octubre	31	Despeses correspondència i revista	9	40
Novembre	25	Factura «L'Avenç»	178	
»	30	Despeses correspondència i revista	7	25
Desembre	10	Factura «L'Avenç»	25	
»	31	Despeses correspondència i revista	6	15
Total.			1,040	40

RESUMEN

Entrades	1,035'90	Sortides	1,040'40
Quotes 1910 per cobrar	73'50	Factures per pagar.	125'00
Total, Ptes.	1,109'40	Total, Ptes.	1,165'40

Diferencia

1,165'40

1,109'40

Total, Ptes. 56'00 de deficit

El president,
DR. J. BREMON MASGRAU

El secretari,
J. PUJOL MONFORT

L'administrador-caixer,
J. PIFERRER RIFÀ

BIBLIOGRAFIO

Ni nur raportos pri verkoj duope senditaj al la Redakcio.

Amoro kaj Psiĥe, de Lucius Apulejus. El la latina originalo tradukis Emilo Pfeffer. — Esperanta Biblioteko Internacia (Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin.) — Prezo : 0'20 sm.

Esperantista Poŝkalendaro 1911, redaktita de Prof. Dro. Siegfried Lederer. (Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin.) — Prezo : 1 m. (0'500 sm.)

Dictionnaire Usuel Esperanto-Français, de E. Grosjean-Maupin. — Kolekto de *La Revuo*. — Hachette kaj K^o, Paris. — Prezo : 1 franko.

Cours Méthodique d'Espéranto. Corrigé des Thèmes, de Camille Aymonnier kaj E. Grosjean-Maupin. — Kolekto de *La Revuo*. — Hachette kaj K^o, Paris. — Prezo : 1'20 franko.

Mistera Krimo. — Amuza unuakta komedieto, kiun aranĝis al Esperanto, Mikaelo Cases, Prezidanto de «*Espero Kataluna*» kaj Ĉefredaktoro de *Tutmonda Espero*. — Prezo : 40 spesdekoj (1 franko). Aĉetebla ĉe la aranĝinto, strato Salmerón, 229, 4.^o, 2.^a, Barcelona.

Estas bedaŭre! tamen ni rajtis esperi pli bonan laboron de nia amiko Cases. Ĝia tradukaĵo ne riĉigos la esperantan verkaron, sed male, ĉar ĝi ne estas konscia tradukaĵo. Mi tute bedaŭras esti devigata tion ĉi diri : ne ĉiam la veron oni ŝatas, kaj mia amiko eble ne pardonos al mi mian konfeson. Sed la vero estas devizo mia, kaj mi ne scias ĝin malkaŝi. Alie, mia opinio rilate al *Mistera Krimo* kiel esperantaĵo, ne estas deviga; oni povas kontroli ĉu mi diras aŭ ne diras la veron.

En nia bedaŭrinda, lando, kie oni aplaudas ĉion, kio koncernas al amikoj — tio estu aŭ ne estu aplaŭdinda aŭ laŭdinda — ne estas, eble tre favore akceptata mia recenzo.

Por ke oni ne juĝu mian opinion nesincera. nelojala, mi silentos pri ĉio, kio koncernas al la originalo. Ĉu indus la penon esperantigi tiun ĉi komedion? Ĉu ĝi atingas ĝian celon kiel komedio? Ĉu ĝi amuzos la legonton? Mi ne parolos pri tio, sed nur pri la laboro de traduko.

Kiel mi antaŭe diris mia fervora amiko ne sukcesis. En lia verko enŝovigiĝis multaj nepardoneblaj al li eraroj, kiuj malbonigas lian laboron kaj faras lian esperantigitan komedion ne rekomendindan.

Plej gravaj eraroj : Pri *iĝ* : paĝo. 6^a : Ne haltigu (*haltu*) plu; p. 20^a : Vi elportiĝas (*elportas*) la vinon?; p. 24^a : Silentigu. kaj en la sama paĝo oni trovas (*Silentu*); p. 28^a : alproksimigu tiun seĝon (ĉu okaze *alproksimigu*); p. 29^a : mi kontraŭvizaĝiĝos (ĉu okaze *kontraŭvizaĝigos*); p. 31^a : li subite haltigas (*haltas*).

Pri akuzativo : p. 3^a : Tri pordojn dekstre al aktoro ; p. 10^a : ... sen timon ian, mi reposedos mian veran personecon... ; p. 18^a : Elegante vestita sen palton, ĉapon, barbon nek okulvitrojn ; p. 24^a : Kian tromalsaĝajon !

Aliaj eraroj : p. 3^a : Sur ĝi, lampo ekbruligita (ekbrulinta) ; p. 6^a : ... regali a klientoj (la klientojn) ; la fiŝojn kiuj suficegas ĉe la rivero (abundas en) ; ĝis poste (ĝis baldaŭ) ; p. 7^a : Internen Sinjoroj ! (eniru...) ; p. 11^a : Gustatempa ! (katalune : «aproposit!») ĝi estas uzata kiel interjekcio ; p. 13^a metante kreton en (sur) la bilarbastono ; p. 14^a : samtempe ke (kial nzi ke ?) metante kreton en (sur) la bilarbastono ; p. 18^a eksamoro mia (eksamo) ; mi alvenas, mi alvenas ! (katalune : «ja vinc, ja vinc!») ; p. 21^a : ... mi neniam vidis nenie ; p. 25^a : silentiĝu ambaŭe (ambaŭ) ; p. 32^a, 33^a kaj 34^a : skribado (skribmaniero).

Aliflanke ĉe la fino de la libro estas «Eraroj» (Preseraroj), kiu vere donas aspekton de libro bone korektita. Sed oni forgesis erarojn sur la paĝoj 3^a (montrobalo, anstataŭ montrotablo) 12^a, 18^a, 22^a, 23^a, 25^a, 28^a k. t. p., k. t. p.

Mi ne konas nek havas la originalon (ĉu ĝi estas kataluna ?) ; sekve mi ne povis kompari la laboron faritan de Sro. Cases, por min konvinkigi pri la valoro de la traduko.

Tamen mi ne komprenas, kial la tradukinto forgesis la nomon de la aŭtoro, kaj kial li aranĝis anstataŭ traduki.

Amiko, kara amiko : se la pioniroj tiel agas, kion ni povos postuli aŭ esperi de la simplaj esperantistoj ? Ni estas devigataj pro nia rolo en la Kataluna kampo, per nia kulturo, per nia klereco, per nia bona agado, per nia serioza agado, per nia agmaniero, per ĉio kio estas en ni, influi sur la ceteraj esperantistoj por atingi konscian, seriozan memvaloran movadon. Ni fine montru ke nia kataluna movado estas en plena aĝo : ĉi tion postulas de ni nia idealo. Sed ne ĉiuj ankoraŭ perfekte ĝin komprenis, bedaŭrinde!

Mi plej fide esperas, ke en nova verko nia fervora batalanto plej bone sukcesos per sia talento. — D. SERDÁ.



KORESPONDADO

Sroj. J. Más. Ĝi ne taŭgas por nia gazeto. Cetere ĝi estas tro longa. Ĝi taŭgos kiel propaganda artikolo ĉe ĉiutaga gazeto. — J. V. Vian verkon ni publikigos en proksima numero. — J. Amades. Ni ne havas sufiĉan lokon por enpresigi vian ŝatindan roporton; Plie, ĝi estos ne legebla de la kompostistoj. Ni ĝustatempe ricevis viajn ekzemplerojn de *Espero de Katalunjo*; ni bezonas la unuan aperintan numeron; ĉu vi ĝin havas? — P. Alsina. Ricevitaj viaj leteroj. La versaĵo ne taŭgas.

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONO-HISpanUJO

AVIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezono la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.

ENHAVO: Havena Propaganda Sekcio. — Flugadoj. — Mia Unua Amkiso. — Literatura Konkurso de la 2^a Kongreso de «K. E. F.». — Studkomisio pri ĉiulanda verkaro. — Pri ia deklario. — Eksterlanda Movado. — Enlanda Movado. — Oficiala Parto. — Bibliografio. — Korespondado.

HAVENA PROPAGANDA SEKCIO DE 'KATALUNA ESPERANTISTO'

LAŭ mia propono, la Unua Esperantista Kataluna Kongreso decidis starigi Havenan Komisionon, kies celo estos propagandi Esperanton inter la maristarojn de la fremdaj ŝipoj, kiuj vizitas la havenon de Barcelono. Tiu Komisiono estis starigita, kiel propaganda sekcio de la *Kataluna Esperantisto* gazetorgano de la Kataluna Federacio.

Nia ideo estis, propagandi Esperanton en ĉiun ajn fremdan ŝipon, sed nehavo de la mono postulita de tiu entrepreno devigis nin plimalgrandigi la kampon de nia agado, kaj, atendante pli riĉajn momentojn kaj la ĉies helpon, ni decidis limigi la propagandon en la francajn ŝipojn. Por tiu entrepreno mi korespondis kun nia eminenta samideano Sro. Rollet de l'Isle, prezidanto de la «Marista Esperantista Ligo» kies senlaca kaj efika laborado estas tie bone konata de ĉiuj kaj kiu juĝante la ideon bona, pli rapide sendis la helpon ol la promeson de helpo mem.

Ni laboras en la konvinko ke nia metodo de propagando por trafi la maristaron estos sekvata plibonigata kaj disvastigata de niaj sam-

ideanoj en kiel eble plej multe da havenoj. Tio ja estas necesa por plena atingo de nia celo. Kutime, ĉiu haveno estas ĉiam vizitata de samaj ŝipoj, sekve, de samaj maristoj. Ni do, post kelkaj monatoj estos montrante Esperanton al ĉiuj francaj ŝipoj, kiuj ankrigas en Barcelono. Estas necese, ke oni imitu nian metodon ekzemple en Co-ruña, kie haltas la francaj ŝipoj, kiuj krozas al Sudameriko, en New-Yorko, en kelkaj havenoj anglaj, en Suez, k. t. p. Per sistema metodo tre facile ni atingos en helkaj monatoj preskaŭ la tutan maristaron de unu nacio. Se ni varbas eĉ nur unu po cent ni ja estos allogantaj al nia movado centojn da praktikaj, spritsanaj, bravaj homoj.

Tial ni diskonigas la metodon kaj la tekstojn, kiujn ni uzos.

Ni sendos al la ŝipestroj de la ŝipoj ĵus alvenintaj en nian marbordon:

- a) Leteron al la ŝipestro en franca lingvo.
- b) Kvanton da francaj ŝlosiloj proporcian al la graveco de la ŝipo.
- c) Cirkuleron de la «Ligue Maritime Esperantiste — Section Française».
- d) Propagandan folion, ankaŭ en franca lingvo.

Jen la tekstoj de la dokumentoj. (Ni kompreneble cedas al ĉiuj la rajton ilin kopii kaj represi).

Letero al la ŝipestro.

A monsieur le Comandant de

Commandant :

J'ai l'honneur de vous adresser quelques brochures relatives a la *langue internationale auxiliaire Esperanto*, á l'aide desquelles on peut l'apprendre.

Votre expérience des voyages dans des pays où sont parlées les langues le plus différentes, vous a certainement déjà montré les avantages que l'existence d'un langue auxiliaire apporterait aux marins; je vous remets ci-joint quelques documents qui, à ce point de vue, vous intéresseront.

Si vous désirez de plus amples renseignements sur cette question, vous pourrez vous adresser a la *Section française de la Ligue Maritime Esperantiste*, 51, rue de Clichy, Paris.

Veuillez agréer, Commandant, l'assurance de ma considération la plus distinguée.

Propaganda folio.

Ligue Maritime Espérantiste (Section Française)

(Siège Social, 51, rue de Clichy, Paris)

M. le Vice-Amiral Baile, president d'honneur.

M. le Vice-Amiral Gigón, haut membre d'honneur.

Le *Ministre de la Marine* a autorisé les officiers, partionnaires et agents de son département à faire partie de cette Association.

M. Rollet de l'Isle, ingénieur hydrographe en chef de la Marine, Président.

M. R. Mezny, professeur d'hydrographie, Secrétaire.

Correspondants à l'étranger :

Angleterre : M. Southcomte, 16, Stantford, avenue Brighton.

Allemagne : Docteur Mybs, 68, Parketrasse, Altona, a. E.

Danemark : Madame G. Mönster, 54, B. Osterbragade, Copenhague.

Russie : M. Cernohwstov, 40, loğ. 25, Malyi pr. St. Petersbourg.

Finlande : M. E. Elenius a Suursaari.

Bulgarie : M. Čočo, v. š. Nadejda, Varna.

Espagne : M. Pujulà, 89, Rambla de Catalunya, Barcelone.

Utilité de la langue international auxilieur Esperanto pour les marins

Les marins sont peut-être de tous les hommes, ceux auxquels l'existence d'une langue internationale rendrait le plus de services.

Ils ont un tel besoin de se comprendre malgré la différence des langues nationales qu'ils parlent, qu'ils ont inventé il y a 50 ans et font couramment usage du «Code International des Signaux» qui leur permet de communiquer, quelle que soit leur nationalité, tant qu'ils restent à bord de leurs batiments.

Mais s'ils viennent à les quitter, ce moyen leur fait défaut et cette situation peut avoir pour eux les conséquences les plus gênantes et parfois les plus graves.

Un bâtiment, par exemple, demande, par le Code, un medecin à un bâtiment d'une autre nationalité : celui-ci vient à bord, mais le plus souvent le secours qu'il apporte sera très-incomplet, parcequ'il ne pourra ni comprendre l'équipage étranger, ni être compris de lui.

Quand un commandant veut entrer dans un port, il lui faut prendre un pilote ; il le demande par signal et le pilote, ayant compris, vient à bord mais, une fois là, c'est à peine le plus souvent si l'on se comprend. Généralement on s'en tire avec quelques mots d'une langue nationale que savent les deux marins ; mais qu'il survienne un incident de navigation, exigeant une manœuvre rapide et qui sort de l'habitude, ces relations élémentaires risquent de ne plus suffire et de causer une catastrophe.

Arrivé au port, le Capitaine a des visites à faire aux autorités, des formalités à remplir, peut-être des démarches commerciales à accomplir : il lui faudrait être polyglotte pour satisfaire à toutes ces obligations avec une égale facilité dans tous les pays où el est appelé à se rendre.

Comme il ne l'est pas, il a recours à des interprètes on est forcé de compter sur l'obligeance de ses interlocuteurs. Ces deux moyens peuvent lui faire défaut et, dans tous les cas, il se trouve forcément dans un état d'infériorité nuisible aux intérêts qu'il a à défendre.

Bien d'autres inconvénients, bien d'autres dangers même peuvent naître, pour les marins, du défaut de compréhension; aussi est-ce travailler pour leur bien intellectuel et matériel que de propager une langue internationale.

Son adoption doit résulter surtout de l'initiative individuelle : l'effort nécessaire pour apprendre l'*Esperanto* est si petit, et les conséquences qui peuvent en résulter tellement importantes que personne ne peut raisonnablement se refuser à le faire.

D'ailleurs cette langue d'une simplicité et d'une clarté admirables est déjà parlée par des milliers d'hommes dans le monde entier et sa connaissance peut, dès maintenant, rendre aux marins de très-grands services.

ROLLET DE L'ISLE

Ingénieur hydrographe en chef de la Marine
 Président de la Section Française de la Ligue Maritime Esperantiste

Un vocabulaire technique des termes de Marine en Esperanto a été publié et est en vente à la librairie Hachette, Paris, 79, Boulevard Saint-Germain, Il a pour titre *Provo de Marista terminaro*.

M. Bourlet, professeur au Conservatoire des Arts et métiers a fait une Conférence aux *Officiers Elèves de l'Ecole Supérieure de Marine*; elle a été publiée et constitue une excellente brochure de propagande; la demander à la Section française de la Ligue Maritime Esperantiste.

Samtempe, ni informiĝos ĉe la havenaj aŭtoritatoj pri la loko kien la ŝipo sin direktos kaj ni sendos al la Prezidanto de la Grupo Esperantista el tiu urbo la jenan karton :

« Barcelono

Kara samideano :

Ni havas la plezuron sciigi al vi, ke hodiaŭ ni sendis Esperantajn

propagandilojn al Sro. , ŝipestro de la el la franca ŝiparo ŝipo ankrita en nia haveno.

Tiu ŝipo forlasinte Barcelonon sin direktos rekte al kie vi povas fari grandan helpon al Esperanto vizitante la ŝipestron kaj parolante al li pri nia lingvo, aŭ petante tiun servon de amiko via loĝanta en tiu urbo.

Vi estos tre afabla informante nin pri la rezultato de via vizito.

La havena sekcio de la gazeto KATALUNA ESPERANTISTO
Adreso: 12, strato Gracia, urbo Sabadell—Katalunlando (Hispanujo).»

Nia sekretario notos sur kajeron la nomojn kaj cirkonstancojn de ĉiu trafita ŝipo kaj la informojn, kiujn oni sendos al ni pri la rezultato de la propagando. Laŭ tiuj informoj ni agos rilate al la ŝipo, kiam ĝi revenos Barcelonon.

Kompreneble tia propagando postulas monon. Se ĉiu esperantisto en nia lando donus al ni nur unu soldon ni havus monon sufiĉan por fari dum unu jaro saman propagandon en la ŝipojn de ĉiu ajn nacio vizitantajn nian havenon. Ni devas kompreni, ke ju pli estos Esperanto disvastigita ĉe la fremduloj des pli ni profitos el ĝi: kun niaj samlandanoj ni ja bone interkompreniĝas per kataluna lingvo! Donu do monon por tiu propagando al la delegito de la Federacio en via urbo; donu al li soldon ĉiu monate. Kolektu soldojn ĉe la kursoj, ĉe la kluboj, dum viaj ludoj; starigu soldpunon pagotan, dum viaj esperantaj interparoladoj, de tiu, kiu uzos nekorektan esprimon aŭ neesperantan vorton. Pensu, ke per la soldo, kiun vi donacos, oni aĉetos ŝlosilon, kaj ke tiu ŝlosilo eble allogos al ni homon utilan al nia Ideo. Ni ne ŝparu la semojn sur la homaran kampon. Por faciligi la kontrolon de la soldkolektado ni presigis biletarojn, kiujn ni sendos al la delegitoj de la Federacio kaj al la profesoroj, kiuj mendos ilin.

Kiu lernanto rifuzos unu soldon ĉiumonate al sia profesoro?

Kiu bona esperantisto ne aĉetos almenaŭ unu bileton ĉiumonate?

La propagando al fremdulo estas plej efika ol al samlandano.

Memoru la proverbojn: «Neniu estas profeto en sia urbeto» kaj «Propra supo brogas, fremda allogas».

F. PUJULÁ

Preguem als senyors delegats i professors que vulguin recollir sòus per a aquesta propaganda, se serveixin demanar an aquesta Redacció 'l *biletaro* corresponent.

Aquests talonaris, dels quals cada full val cinc centims, són una garantia pel qui paga i pel qui demana.

S'enviïn els diners en sagells de correu de cinc centims.

Els senyors que hagin recollit diners, si a l'enviar-los no poden o no volen pagar les despeses de correspondència, poden descomptar-los de la quantitat que enviïn.

Per manca d'espai no podrem publicar el nom de tots aquells que donguin el sòu; publicarem però el nom dels delegats, professors i altres persones que recullin, ab les quantitats enviades, i el nom d'aquells que 'ns enviïn més de 20 bitllets.



FLUGADOJ

V

Ni dum la 1911^a jaro, flugados trans alia jaro; kaj sekve, ankaŭ ni plie maljuniĝos unu jaron. Ĉio, kio ekkomencis, transiras ĝis fino; ĉio, kio eknaskiĝis, transvivas ĝis morto. Ĉu oni dubas, ke nia vivo estas flugado al amikeco, al amo, al transcendo?

Ĉu la vivo ne similas rektestarantan spegulon fajlitan per homaj ĝenoj? Vere, unu jaro estas peceto da tempo, kiun aŭkcias la Ĉiopova Mastro por ke la vivuloj anstataŭos ĝin en bonaferojn. Jen nia rolo: labori bone, barakti ĝis perfekteco, mallogi malvirtojn, danki ĉiam, ĉiam nian ekzistadon. Tuj kiam mi piedfrapis la sojlon de la nuna jaro, per akra voĉo mi kantis dolĉegan kantadon de espero. En tia momento ŝajnis al miaj okuloj, ke la mallumoj de la nokta ĉambro ekbruligis fajron varmigantan, ĉar mia koro batis kuraĝe. Mia estonteeco aperas en sonĝo kiel fiakro de zig-zagaj radioj, kiujn trenis vigle tra la tempo du agloj; la vivo kaj la morto.

Mi hezitas tikli per gravaj pripensoj, laŭ rikanulo, animon diboĉatan. Mia propra kokardo de flugisto, estas fasko de realeco por min frapi, por skui, por hardi nur miajn plej karajn amikojn.

VI

Enpuŝata de febra deliro, mi flugas en spacon por serĉi ion ajn, kiu al mi donos senton de feliĉo. Rimarku karaj gelegantoj: iu spiritulo diris en pasinta tempo, ke ĉe la etero, duone kaŝita, estas ne-

definebla kiso. Bedaŭrinde miaj vangoj ne povas ricevi tian kison, kiu neniam tuŝos karnan vangon. La Tempo, nia simbola praavo, ĉiam senlace, dum ĉiu momento, kisas la homojn; la malsaneco ankaŭ multfoje ĵetas iajn karesojn al ni, ĉar la sankta Amo, kiu estas dia kiso, nur estas ricevota de la rozkolora vango de senmakula virgulino. Nur en ŝiaj harflokaj, povas ripozi la Amo, por florigi ondetojn da vivo.

... Ankoraŭ la kiso nedifinebla restas kaŝita en la blua etero...

La Amo estas la pinto de nia esperanta deziro, la fajro, kiu nin varmigas, la ĉiapova batalanta ilo. La Amo estas ringo, kiu arigas ĉiujn homojn; estas lumo helanta pro sia propra potenco. Jes, la Amo estas kiso nedifinebla kaŝita en la blua ĉielo. Kaj la indulino kiu ricevos tian mirindan kison, estas la Internacia Paco, kune kun ĝia propra filo la Unúversala Frateco.

Tiu estas la nova sento veninta inter nin; la forta voko, kiu iras tra la mondo flugante per flugiloj de facila vento, de loko al loko; kaj ankaŭ, kiu kolektiĝas pacajn batalantojn sub la sankta signo de l'Espero.

F. SURROCA



MIA UNUA AMKISO

AL F-INO. C. PUIG

OKAZIS en somera libertempo. Ni pasigis kelkajn tagojn en la sunpro de unu el la plej altaj montoj en Katalunlando, kie staras, preskaŭ ruinigita de la tempo, arta kaj antikva monaĥejo, kiu de longe forlasis la monaĥoj, kaj kie loĝas, nun, maljuna simpatia viro kun sia filino: en ilia modesta sed pura loĝejo, niaj familioj fariĝis gastoj dum tri tagoj kaj ni, tio estas, mia amatino kaj mi, ĝuis tie la plej belajn horojn.

Matene, ni leviĝis ĉiutage antaŭ la ektagiĝo, kaj antaŭ ol la suno estis leviĝinta, ni jam atendis ĝin sidante apud bruetanta fonteto, kie ni ripetadis multfoje la ĉiam novan kaj ĉiam belan, belsonan frazon «mi vin amas». Kiam per ĝia unua lumradio la suno salutis nin, ni komencis nian gajan matenmanĝon kaj fininte ĝin ni forlasis la fonton por trakuri la arbaron, saltante kiel kapretoj, kurante tra la vojetoj kaŝitaj meze de la densa herbaro kaj serĉante la bongustajn fragojn, kiuj estis malpli ruĝaj ol la freŝaj lipoj de mia amatino.

Kiam, lacigitaj de la tro longa petolado, ni sidiĝis sur la verda herbon, la najtingaloj amuzis nin per siaj plej belaj kantadoj kaj ni aŭskultadis ilin atentege, aŭdante nenion krom ili; ili kantis nian amon kaj ni ambaŭ rigardadis unu la alian, nenion dirante, premante reciproke niajn manojn.

Ian tagon, post la subiro de la suno, la nebulo enŝoviĝis en la fundon de la valoj: silente ĝi suprenlitis la krutajn flankojn de la monto, ame dorlotante ilin, etendante sian vaporan vualon sur la arbaroj tie starantaj, kaŝante malrapide ilian verdan koloron, kvazaŭ ĝi kovrus per dika gaza mantelo dormantan infanon; baldaŭ ni vidis ĝin sub niaj piedoj kaj tiam ĝi prezentis al ni ravan spektaklon. Ŝajnis, ke ni estas en malgranda izolita insulo meze de grizkolora nebula maro, kies ondojn, similajn al amasoj de molega lano, neri-markeble movis tre kvietaj bloyeto, ŝanĝigante iliajn nuancojn, kiujn la malrapida noktiĝo malheligadis iom post iom.

Fine, ĝi ĉirkaŭis nin tute kaj ni devis nin rifuĝi en la maldelikata manĝoĉambro de la monaĥejojgardantoj, kie ni gaje pasigis la tempon per la plej agrabla babilado. Sed, allogitaj de la belegeco de la ĝuita de ni ĉarma spektaklo, mia amatino kaj mi forlasis ĉiujn kaj ni eliris sur la monaĥejan placeton.

Neniam Naturo ŝajnis al ni tiel bela!

La nebulo kuŝis ankoraŭ super la valoj, kovrante ĝuste la malgrandan ebenaĵon, kie ni staris kaj tiel dense, ke niaj piedoj eniĝis en ĝin; la vento estis ĉesinta kaj eĉ la plej delikata aerbloveto ne movis jam la ondojn de tiu maro, kiun la luno griznuance arĝentis; en la ĉiela lazuraĵo palpebrumis la steloj kaj ĝiaj ĉielarkkoloraj ekbriloj lumis kiel puregaj diamantoj.

Neeble priskribi, kion ni sentis! En la kortuŝanta silento de la Naturo, niaj voĉoj malklare resonis kaj, kvazaŭ timante malhelpi ĝian ripozon, ni senrimarke ilin mallaŭtigis, por silente rigardadi tian ravan belecon.

La samtempe sentita deziro esti karesataj de la dorlotanta nebulo reciproke nin proksimigis kaj ni marŝis tra la vojeto, kiu ĉiumatene kondukis nin al la fonto; ĉirkaŭpremante unu la alian ni malsupreniris ĝis kiam ni estis tute kaŝitaj de la malseka nebula mantelo. La lunlumo, refraktiĝante, disvastiĝis kaj intensive heligis la similkotanan vaporan amason: antaŭ ni, nur ni vidis la silueton de l'antikva monaĥejo, kiu rapide malklariĝadis ĉe ĉiu paŝo nia. Fine, ni haltis, mi sentis sur mia brusto la amajn batetojn de la koro de mia amatino, kiu senkuraĝe, timigita de la grandiozeco de tia spektaklo, reiris malantaŭen demandante per milda voĉo, «se mi ŝin amas!» Mia

kiso. malfermiĝante en ŝiaj lipoj, malpermesis daŭrigi la frazon, kaj la nebulo, varmigita de nia amo, tuj disrompiĝis.

La vento forĵetis ĝin de la supro de la monto kaj ni vidis ĝin disŝirantan sian gazan mantelon je la abioj sur la fundo de la valo.

JOSEFO GRAU



LITERATURA KONKURSO DE LA
2^a KONGRESO DE LA «K. E. F.»

Temo proponita de *La Revuo* :

Verki originalan studon pri arto, pri muziko, pri poezio, pri literaturo aŭ pri historio.

(La verko devas esti ne pli longa ol 20 paĝoj presitaj de *La Revuo*).

Premioj :

1^a Premio : Unu senpaga unujara abono al *La Revuo* kaj dek libroj de la kelekto de *La Revuo*.

2^a Premio : Unu senpaga unujara abono al *La Revuo* kaj *Faraono* (3 volumoj).

3^a Premio : Unu senpaga unujara abono al *La Revuo*.

Jugantoj : Sroj. Carlo Bourlet, F. de Ménil kaj Fred. Pujulà.

N. B. — La premiitaj verkoj estos publikigitaj en *La Revuo*.

La Konkurso estas internacia. Al ĝi povas partopreni ĉiu esperantisto. Sendu la verkojn sub koverto sur kiu oni skribos «Por la Lit. Konk.» kaj la adreson de la Federacio : «12, strato Gracia, urbo Sabadell».

La Grupo «Semo» de A. E. P. el Barcelona decidis premii la plej bonan kolekton de katalunaj modismoj, tradukitaj al Esperanta lingvo.

La premio konsistas el arta argenta tabulo enhavonta la nomon de ĉi gajnonto.

Premio de Sro. Fred. Pujulà :

La literaturajn esperantajn verkojn de Sro. F. Pujulà (*La Rompantoj*, *Mistero de Doloro*, *Frenozo*, *La Grafo Erarinta*, *La Naivulo*) dediĉitajn al la aŭtoro de la plej bona versduo (*redolĉ*) verstrio, au verkvaro, povanta taŭgi kiel divizo de «K. E. F.» Ekzemple.

«Unuiĝo estas forto kaj la izoleco morto»



STUDKOMISIO PRI ĈIULANDA VERKARO

(Sekvo)¹

TIEN en nereкта komplemento

Sab. — Do, kial ili forpelas min de tien, ĉu kiel malbona. (69)

Orig. — *Doncs, perquè m'escupen d'alli; per dolent?*

Rap. — Kial do ili forkraĉas min de tie; ĉu kiel malbonan? (Rimarko pri malbona).

UNUA

Sab. — La apostolo numero unua min kompatu! (8)

Orig. — *Valgam l'apostol numero ú!*

Rap. — Min helpu la unua apostolo!

VALORI kun la senco ATRIBUI VALORON

Sab. — Ci malhelpi min? Mi ne tiom valoras cin! (92)

Orig. — *Tu destorbarme? No t dono tanta importancia!*

Rap. — Ĉu ci, malhelpi min? Ci ne estas tiel grava! (laŭvorte: mi ne aljuĝas al ci tiom da graveco).

VESTI

Sab. — Mi cin vidas malbone vestitan, kaj ci ne devus vesti tiamaniere. (82)

Orig. — *Veig que vas mal endressat i no 'y tindries d'anar.*

Rap. — Mi vidas ke vi iras malbone vestita, kaj ci ne devus tiel iri.

VIRO laŭvorta traduko de kataluna *ome* = MIA KARA, MIA AMIKO, NU!...

Sab. — Ci mem, viro, ci mem... (33)

1) Mallongigoj. — Sab: Teksto de Sro. A. Sabadell. — Orig: Teksto originala. — Rap. Ĝusta traduko laŭ opinio de la Raportinto. — La numeroj montras la paĝojn. (Vidu la numerojn 4^a, 5^a, 6^a, 7^a, 8^a, 9^a, 10^a kaj 11^a de K. E.)

Orig. — *Tu mateix, home, tu mateix..*

Rap. — Ci mem, do, ci mem...

Sab. — La dorso kaj la kruroj ne interesas por tio — Viro! (14)

Orig. — *L'esquena i les cames no compten! — Ome!*

Rap. — La dorso kaj la kruroj ne estas interesaj. — Nu! (aŭ: hum!)

Ni vidu la dialogon: La desegnisto rimarkas, ke la almuzulo montras grandan suferon precipe per la okuloj kaj li diras: Belegaj okuloj por desegno! La almuzulo respondas: Sed, kio doloras al mi, estas la dorso kaj la kruroj. Tiam sekvas la rimarko de la pentristo kaj la ekkrio de la almuzulo, kiu egalvaloras: Diable! Al mi ili ja estas tre interesaj! aŭ: Kompreneble, ĉar ne estas viaj, kiuj doloras.)

FARIGI VIRO KUN LA SENCO FARIGI GRANDA, ALTKRESKA

Sab. — Kiel ci fariĝis viro! (137)

Orig. — *Com t'has fet ome!*

Rap. — Kiel ci grandiĝis!

Sab. — Ĉu vi ne vidas, kiel mi fariĝis viro? (141)

Orig. — *Que no 'm veu, com m'he fet ome!*

Rap. — Ĉu vi ne vidas, kiel mi grandiĝis?

VIRINO, laŭvorta traduko de kataluna *dòna* = MIA KARA, MIA AMIKINO, SINJORINO, NU!..

Sab. — Sed, virino, kial vi venis? (56)

Orig. — *Però, dòna, perquè ha vingut?*

Rap. — Sed, sinjorino; kial vi venis?

Sab. — Silentu, virino! (60)

Orig. — *Calla, dòna!*

Rap. — Nu, silentu! (aŭ silentu, ci).

Sab. — Virino, mi parolas serioze! (61)

Orig.—*Dòna, que t parlo en serio!*

Rap.—Sed, mi parolas serioze, mia kara!

Sab.—Bone, virino, iomete, kaj denove vi povos ekdormi! (64)

Orig.—*Vaja, dòna, un platet i s torna a dormir!*

Rap.—Nu, sinjorino, nur telereton da ili, kaj k. t. p.

Sab.—Virino, kial ne? (98)

Orig.—*I sí, dòna!*

Rap.—Jes, sinjorino!

Sab.—Sed, virino... (130)

Orig.—*Però, dòna...*

Rap.—Sed, mastrino...

FARIGI VIRINO kun la senco FARIGI GRANDA, FAMA, SERIOZA, RESPEKTINDA. (Enlandaĵo).

Sab.—Ju pli pentraĵojn ci pentros, des pli per ili ci fariĝos homo, kaj ju pli mi utilos kiel modelo des pli ankaŭ mi fariĝos virino, sed same ne estas fariĝi homo aŭ virino. (62) (*Efektive*).

STILO

AKUZATIVO KAJ NOMINATIVO

Sab.—Nu, kie ŝtipojn oni jam enmetis, tie oni sekvas ilin enmeti. (123)

Orig.—*Doncs allí on se n'hi ha posat, se n'hi posa.*

Rap.—Do (aŭ kaj) kien oni enmetis, tien oni enmetas. (Laŭvorte

kaj laŭsence). (Ĉiuokaze, anstataŭ «jam» estus pli ĝusta «iam»).

Sab. — Tiuj ĉi trajtoj, kiujn vi havas kiuj malsupreniras vizaĝsuben, vi ne havus ne suferinte. Mi ne scias ĉu ili estas pro doloro, sed tiel ili ŝajnas, kaj por desegni estas same kvazaŭ ili estus tiaj! (15) (Laŭvorte).

Orig. — *Aquestes ratlles que teniu, que vos baixen cara avall, sense aver patit, no les tindriau. No sé si són de dolor, però 'u semblen, i per a dibuixar es com si 'u fossin!*

Rap. — Tiujn ĉi sulkojn, kiuj malsupreniras tra via vizaĝo, vi ne havus ne suferinte (aŭ : sen antaŭaj suferoj). Mi ne scias ĉu ili estas sulkoj de doloro, sed ili tiel ŝajnas, kaj por la desegno tio sufiĉas. (Laŭsence).

Sab. — Kiujn oni pendigas ĉe la altaroj, kiel dankosigno por sanktulo. (41) (Noto de la tradukinto).

Rap. — Kiujn oni pendigas je la altarojn, kiel dankosignon.

Sab. — ... mi ne deziras la estonta gloro por mi. (52)

Sab. — Sed la larmoj de tiuj, kiuj estas patrinoj, oni viŝas per ĉirkaŭpremo, (53)

Rap. — Sed la larmojn...

Sab. — Se mi povus eltrovi tiun ĉi vivon! Tiujn ĉi liniojn kiuj ne estas linioj! Tiun, mi ne scias kio, de la esprimado! (16) (Laŭvorte).

Rap. — (Ĉiuokaze) : Mi ne scias kion. (La frazo ŝajnas ne povas esti klara por fremdulo. Mi ne povas juĝi).

Sab. — Kaj kio ci volas, ke okazu? (75)

Sab. — Mi amas cin ĝis tio deziri, kion ci deziros? (91)

Sab. — Kiel komencis cian aldonitecon? (39)

Orig. — *Com te va venir l'afició?*

Rap. — (Laŭvorte). Kkiel venis al ci la artinklino?

Sab. — Manuelo faras ŝian portreton sur tre malgranda tolo. (86)

Rap. — Sur tre malgrandan tolon.

Sab. — Mi reiros al mia mansardo, kaj nenion ni ŝuldas unu al la alian. (120)

Orig. — *M'entornaré a les golfes, i en paus.*

Rap. — Mi reiros al mia mansardo, kaj jen ĉio (aŭ laŭvorte: kaj ni estos kvitaj). (Rimarko pri alian).

Sab. — Dio gardu ĉiujn vi el la malbono! (128)

Rap. — Ĉiujn vin.

TIA KIA kiel adverboj = ESTI

Sab. — Tiu ĉi domo tia, kia ĝi funkciadas, ne estas bone. (17)

Orig. — *Que aquesta casa, tal com va, no va.*

Rap. — Ke tiu ĉi domo (hejmo) tiel, kiel ĝi iradas, ne iradas (bone), (Laŭvorte).

Sab. — Ĉu vi vidas kiel silentante, estas kiam pli bone parolas la buŝon, kiam la frunto ŝajnas pripensi. (16) (Laŭvorta traduko, kiu konservas la konfuzon de la originalo).

Orig. — *Ho veieu? Ho veieu, Isidre, com callen? Es quan parla mellor una boca, quan el front sembla que mediti.* (Stilo malbonega; nekomprenbla frazo).

Rap. — (Rimarko pri «buŝon»).

Sab. — Oni ne trompas la patrinojn. Kiam ili ion ne scias, tiam ili divenas ĉion. (53)

Orig. — *A les mares no se les enganya. Quan no saben, endevinen.*

Rap. — La patrinojn oni ne povas trompi. Kiam ili ne scias ili divenas. (Laŭvorte kaj laŭsence).

Sab. — Kaj ci ja scias ĉu ni nenion bezonas!

Orig. — *I ja u sabs tu si ns falta res!*

Rap. — Kaj ci ja scias, kiom multe ni bezonas! (Laŭsence).

Sab. — Ĉu ni devas toasti per terpomoj? — Kaj per kio? La toastoj ne konsistas el tiu per kio oni toastas sed por tio al kio oni toastas, (65)

Orig. — *Amb patates hem de brindar? — I, doncs, amb què? El brindis*

no es amb lo que 's brinda, sinò per allò que 's brinda.
(Granda manko de sintakso: «*el brindis no es amb lo que...
sinò per allò*»).

Rap. — Ĉu per terpomoj ni devas toasti? — Per kio do? La toastoj ne konsistas el tio per kio oni toastas, sed el tio por kio oni toastas. (Laŭ supozebla senco). (Rimarko pri «kaj per kio?» «Konsisti el tiu per kio» «konsisti por tio al kio»).

Sab. — Kiam oni sekvas tiun metion, kiun mi ne scias kiel oni nomas ĝin. (21)

Orig. — *Que 'y sentit dir qu'han de dur els qu'emprenen aquest ofici,
que jo no sé com ne diuen*

Rap. — ... tiun metion, kies nomon mi ne kohas.

Sab. — Por cin sendi al la urbo, al fremdolando, aŭ kien ajn ĝi estos. (28)

Orig. — *Per a enviar-te a estudiar a ciutat, a l'extranger o allí on sia.*

Rap. — Por sendi cin studi en la urbon, al fremdolando aŭ ien ajn.

Sab. — Eble mi rigardas per la koro, aŭ per la sento, aŭ per kio ajn ĝi estas, sed koncerne... (44)

Orig. — *Devem mirar amb el cor, o amb els sentiments o amb lo que sia, però en tractant-se...*

Rap. — Eble ni rigardas per la koro, aŭ per la sentoj aŭ per io (ajn) alia, sed koncerne...

Sab. — Kiu ajn aŭskultus vin, kredus ke ni estas kio ajn. (III)

Orig. — *Qualsevol que la sentis es creuria qui sab lo que som!*

Rap. — Kion pensus pri ni, kiu aŭdus vin! (Laŭsence).

Sab. — Ne, sinjoro Instruisto, ke ili venu! — Nu!... Kiel ci diras. (29)

Orig. — *No, senyor mestre, que no vinguin! I ara!... Qué dins!*

Rap. — Ne, sinjoro Instruisto, ke ili ne venu! — Nu!... Kion ci diras!

Sab. — Estas pro dek centimetroj nur, kial mi ne ĝin vendis. (52)

Orig. — *Em va venir d'un pam de vendrel.*

Rap. — Nur je dudek centimetroj, mi ne vendis ĝin.

Sab. — De tiam, kiam ŝia patro mortis, kiel malmulte da rento ni havas, mi devigis ŝin iri al la Konservatorio. (57)

Orig. — *El dia que va morir el seu pare, com que vam quedar amb molt poca paga, la feia anar al Conservatori.*

Rap. — Kiam ŝia patro mortis, ĉar ni restis kun tre malgranda pensio, mi irigis ŝin al la Konservatorio.

Sab. — ... kaj mi sekvas ciajn konsilojn. Kiel ci jam donis ilin tiel bonajn al Manuelo. (115)

Orig. — ... *i seguiré 'ls teus concells. Com els vas donar tant bons a n'en Manel...*

Rap. — ... kaj mi sekvas ciajn konsilojn. Ci ja donis tiel bonajn konsilojn al Manuelo... (Rimarko pri kiel ci jam...)

Sab. — Vi havas okulojn, kiujn vi tute ilin ne meritas. (14)

Rap. — (Rimarko pri : «kiujn — ilin»).

Sab. — Kaj ĉu ci komprenas, tio estas ĉar ĉiu pano enhavas multe da ŝvitoj : ŝvito pro la semado de la greno, ŝvito por ĝin vidi kreskantan, ŝvito por timo ke la hejlado ĝin detruu, draŝa ŝvito, ŝvito por ĝin gardi, knedi, kuiri, kaj ŝvito, kiu estas pli forta ŝvito : ŝvito pro timo ne povi ĝin manĝi. (10) (Tute laŭvorta traduko).

Orig. — *I es que veus? Cada pa vol dir moltes suors : suor de sembrar el blat. suor de veure-l creixer, suor de por de que la calamarsada 'l mati, suor de batre, suor de guardar-lo, suor de llevar-lo i de coure-l, i suor qu'es més que suor : suor de por de no poder-ne menjar.* (Malbona, efektama, konfuza stilo).

Rap. — (Rimarko pri : «ŝvitoj» en multenombro, «ŝvito por ĝin vidi kreskantan» «ŝvito por timo ke» «draŝa ŝvito» «kuiri» «pli forta ŝvito»).

Sab. — Sed ci ne rememoras, kie ci loĝas, ke nun estas la vilaĝa ĉeffesto, ke ni devas liveri la turtuojn, nek pri la meso, nek pri io ajn, pro la manio pri landkartoj. (9)

Orig. — *Es que ni 't recordes aon vius, ni que siguem a festa major, ni que tinguem d'entregar les coques, ni de missa, ni de res, amb aquesta taleia dels mapes!*

Rap. — Sed lasu min! — Ne ĉar vi memoras, ne kie vi loĝas, nek ke nun okazos la vilaĝa ĉeffesto, nek ke ni devas liveri la turtuojn, nek pri la meso, nek pri io ajn, pro la manio de l'pen-trado. (MAPES = (landkartoj) estas slanga esprimo por nomi dezegnaĵojn).

Sab. — Sed certe okazis al vi multe da reversoj! (15)

Orig. — *Però deuen aver passat molts trastorns!*

Rap. — Sed certe vi travivis multajn kontraŭaĵojn! (Laŭvorte).

Sab. — Via mieno ne esprimas mizerón sed doloron. — Mi ankaŭ tion havas. — Sed tiun de vi nomitan, oni ne povas dezegni. (14) (Li nomis neniun doloron).

Orig. — *No 's de miseria que feu cara: es de dolor. — Ja 'n tinc també de dolor. — Però 'l que vos voleu dir no 's dibuixa.*

Rap. — Via vizaĝo ne esprimas mizeron sed doloron. — Mi ankaŭ doloron havas. — Sed tiun pri kiu vi aludas (aŭ parolas: aŭ laŭvorte: pri kiu vi intencas paroli) oni ne desegnas!

Sab. — Bone! Al la vendejo, kaj rapidu! (34)

Orig. — *Vaja! Cap a la botiga depresa!*

Rap. — Nu! Rapide al la butiko!

Sab. — Ci vidas ĝin, kvazaŭ idealo, kiu naĝas en ĉaro el oraj flamoj kun artantika matenkrepusko. (44)

Orig. — *El veus com un ideal que neda entre un carro de flames d'or, amb una aurora boreal per fondo.* (Malbonega stilo. Nekompreneble estas kiel «idealo» naĝas «inter» ĉaro el oraj flamoj kun boreala aŭroro, kiel fundo aŭ fono!)

Rap. — (Rimarko pri «kvazaŭ idealo»).

Sab. — Bildego! (41)

Orig. — *Dómino!* (Ekkrio de la ludanto, kiu ludas sian lastan ludpecon en la ludo de domenó. Ĝi havas ankaŭ kaj sekve la sencon: GAJNITA! TRAFITA!) (Eble la tradukinto intencis traduki la francan *tableau* — trafita!)

Sab. — Tio estas nervaj ekvekigoj. (66)

Orig. — *Es un desensopiment de nírvis.*

Rap. — Ĝi estas sentorporig (il) o por la nervoj.

Sab. — Do, jes: estas jam de longe ke ci ne skribis al mi. (75)

Orig. — *Doncs si: feia molt temps que no escrivies.*

Rap. — Ja, jes: jam de longe ci ne skribis (al ni).

Sab. — Kiam la semo alvenas al la aliaj, ĝi ne estas sole aĉetita per ŝvitaj: ĝi entenas gutajn sangojn de la vivo! (10)

Orig. — *Quan la llevar arriba als altres, no es sols suor lo que 'ns costa : són gotes de sang de la vida!*

Rap. — Kiam la semo alvenas al la aliaj, ne nur ŝviton ĝi kostis al ni sed ankaŭ gutojn de sango de la vivo! (Laŭvorte kaj laŭsence).

Sab. — Patrino, tio okazas tiel, kiel mi diras ĝin al vi. (20)

Orig. — *Es que's aixís, mare, tal com l'hi dic.*

Rap. — Ĝi estas tiel, patrino, kiel mi diras.

Sab. — Ĉu ĉar mi estas novulo? — Jes pro tio. Nun ci tion diris, ĉar ci estas novulo. (69-70)

Orig. — *Per nou? — Per nou. Ara 'u has dit bé. Per nou.*

Rap. — Ĉu ĉar mi estas novico? — Jes, pro tio. Nun ci trafis. Ĉar ci estas novico. (La frazo *Ara 'u has dit bé* estas: «nun vi trafis» nun vi parolis grave, aŭ nun vi divenis»).

Sab. — «Kompatinda virino» kaj pli da «kompatinda virino». (78)

Orig. — *«Pobra dòna» i més «pobra dòna!»*

Rap. — «Kompatinda virino» kaj ankoraŭ «kompatinda virino!».

Sab. — Funde en unu flanko granda vitrajaro provizita per kurtenoj, kaj sube kanapo. (86)

Orig. — *Al jons, a un costat, una gran vidriera amb cortines, amb una otomana a sota. (Oni ne scias sub kio kuŝas la kanapo).*

Rap. — Funde kaj flanke, granda vitrajaro kun kurtenoj... (Laŭvorte)

Sab. — Ĉu ci estus trovinta iun, kiu estus aminta cin tiel, kaj tiel longedaŭre, kaj tiel... cin sola, kiel mi finiĝis amante cin? (87-88)

Orig. — *Que aurias trobat ningú que t'agués estimat tant i tant temps, i tant... a tu sol, com jo he arribat a estimarte?*

Rap. — (Laŭsence) Kiu estus aminta cin tiel multe, tiel longatempe, kaj nur cin, kiel mi (fine) cin amas?

Sab. — ... nek genufleksante min al ĝi. (95)

Orig. — ... *ni posant-m'hi, al davant, de genolls.*

Rap. — ... nek genufleksante antaŭ ĝi.

Sab. — Ke ci elvekas la personoj eĉ ne dirante : Dio cin gardu! (91)

Orig. — *Que despertes a la gent sense donar ni 'l Déu vos guard!*

Rap. — Ke ci elvekas la personojn ne dirante eĉ bonan tagon! (Rimarko pri: «personoj» kaj «eĉ ne dirante» «Dio cingardul!» «*Deu vos quart*» estas simpla saluto — «bonan tagon!»)

Sab. — Mi ĝin divenas al ci! (90)

Orig. — *Veritat que seré sola, aquí casa? Sí que 'u seré! Te 'u endevino!*

Rap. — Ĉu ne vere, ke mi estos sola (la sola, nura virino) en tiu ĉi hejmo (aŭ: hejme)? Jes, mi estos! Mi ĝin antaŭsentas!

Sab. — ... samprofesionanon! (92)

ATINGU (Subjunktivo havas ofte en kat. lingvo estontan sencon)

Sab. — ... sed ju pli ci atingu tion, des pli mi perdos. (61)

Orig. — ... *però com més ne tinguis, més hi perdo.*

Rap. — ... sed ju pli ci havos, des pli mi malgajnos. (Vidu PERDI).

Sab. — Brave! Vi laboras por granda pentrajvendisto? — Ne, sinjoro, por vendistino! = Ha! — Mi laboras por la posteularo. (105)

Rap. — (Laŭvorta traduko. Katalune, «posteularo» = *posteritat* estas virinseksa!! Rimarko pri: «granda» = *grava*).

Sab. — La fatalo doni al li bopatrinon, ĉar tio ĉi estas fatalo je konservaĵo. (101)

Orig. = *El destí d'aver-li donat una sogra, que això es un destí en conserva.*

Rap. — La fatalo doni al li bopatrinon, ĉar tio ĉi estas peklita fatalaĵo. (Laŭsence).

Sab. — Ĝi similas al tio; kion Manuelo pentris, kiam oni elkreviĝis lin. (106)

Orig. — *Se sembla a lo que feia en Manel en aquell temps que 'l reventaven.*

Rap. — Ĝi similas tion, kion Manuelo pentradis, kiam oni malaŭdadis lin. (Rimarko pri: «elkreviĝi» laŭvorta traduko de «*reventar*» slanga esprimo, kiu signifas «malaŭdi» malbonintence kritikaĉi).

Sab. = Mi ekdormiĝis dum momento, kaj kiam mi vekigis jam li ne estis. = Ĉu li aŭ vi ne estis? (103)

ADVERBI. — Explicació d'aquesta part de l'oració. — Adverbis en *aŭ*. — Terminació gramatical *e*. — Quan traduhirem el mot català *ho* per un adverbi? — Comparació entre *plu, pli* y *plej*. — S'usa *plu* en les oracions afirmatives? — Participi ab terminació adverbial. — ACUSATIU. — Explicació d'aquest cas. — Quins adverbis poden pendrel.

XIII

MOTS SIMPLES ADVERBIALS, de quantitat, de temps, de causa, de modo, de espay. — Quins d'ells prenen acusatiu? — Explicació d'aquest cas. — Diverses traduccions del mot català *tot*. — Quan el traduhirem per *ĉio, ĉiu, ĉiom, ĉie, tuta, tute*. — Diverses traduccions del mot català *que*. — Quan el traduhirem per *ol, kiom, kiel, kiam, kial, ke?* — Partícula *ajn*. — ORACIONS INTERROGATIVES. — ORACIONS NEGATIVES.

XIV

PREPOSICIÓ. — Explicació d'aquesta part de l'oració. — Regla 14.^a del FUNDAMENTO. — DECLINACIÓ. — ACUSATIU. — Complement directe y indirecte. — Acusatiu usat en lloch de les preposicions. — Preposicions qui poden acompanyar a l'infinitiu. — Quina rahó dóna el doctor Zamenhof pera aclarir aquesta aparent escepció? — Comparació entre *el, de y da*. — Explicacions sobre *pri, per, krom, for*, etc.

XV

CONJUNCIÓ. — Explicació d'aquesta part de l'oració. — Comparació entre *kvazaŭ y kiel*. — Advertencia a fer sobre la paraula *donchs* catalana usada en el sentit de *car, per què*. — Diversos valors del mot català *que*. — INTERJECCIÓ. — Explicació d'aquesta part de l'oració.

XVI

AFIXES. — PREFIXES. — *Bo, dis, ge, mal, pra, ek, re*. — Preposicions usades com a tals. — *Ne, sen*. — SUFIXES. — *Ad, ig, iĝ, iz*. — *Ad*, y l'imperfet dels verbs. — Us dels sufixes *ig, iĝ*.

XVII

SUFIXES. — *Ul, ist, an, il, uj, ej, ar, aĵ, ind, er, estr, id*. — *Ec, ebl, ind, em, eg, et, oz, aĉ*. — Comparació entre 'ls sufixes *ul, ist, an* y les terminacions del participi *anto, into, onto*.

LA URBO DE NIA KONGRESO

(Sekvo)

Temple d'August (Templo de Aŭgusto). Nur konserviĝas moneroj riprezentante la templon, kaj fragmentoj de kapiteloj kaj kornicoj.

El la *Temple de Júpiter* (Templo de Jupitero) oni profitis la ŝtonojn por konstrui la Katedralon, konserviĝas mirindaj restoj de marmoraj belaj reliefoj, medalionoj, kapiteloj, kornicoj k. t. p.

Amfiteatre (Amfiteatro). Ĝi partoformis la apudurbajon. Ĉi tiun verkon oni atribuas al *Stalio Tauro*, kiu konstruis tiun de Romo. Li estis pretoro de Tarragona. Ĉi tiun arenon sange ŝprucis la martiroj Fructuoso, Aŭgurio kaj Eŭlogio. Pli malfrue oni konstruis sur tiun arenon, templon al *Ntra. Sra. del Miracle*, belan romartan ekzempleron.

Teatro. Nur konserviĝas la restoj de ĝiaj benkoŝtupoj kaj ĉe la Muzeo — la maskoj de la aktoroj.

Torre dels Scipions (Turo de la Scipionoj). Ĝi estas kvadratforma, havas du statuojn altreliefajn kaj bone skulptitajn, vestitajn per togoj. En la alta parto estas surskribaĵo. Ĝi estas je 6 kilometroj malproksime de Tarragona.

Arc de Barà (Arko de Barao). Estas unu el la plej bone konservitaj monumentoj de la Roma epoko. Kiam oni ĝin rigardas ĝi naskas gravan respekton al si. Ĝi estas alta je 12'08 metroj, kaj la arko estas 4'69 metroj alta. Ĝi estis renovigita en la jaro 1840. Ĉi tiun konstruaĵon kaj la antaŭan oni povas vidi de la vagonaro Barcelona-Tarragona.

Medo. Antikva Roma ŝtonmino, inda je vizito pro ĝiaj fantastikaj efektoj je vegetaĵoj. Proksime estas *Tamarit'* ruinigita forlasita vilaĝo, kiu en sia unua epoko estis araba observejo.

Aqüeducte (Akvokonduko). *Pont del Diable* (Ponto de la Diablo). Ĝi estas ĉe la ĉefvojo de Tarragona al Lleyda malproksime je 4 kilometroj; per ĝi la Romanoj ricevis la akvon de la rivero Gayà. Ĝi konsistas el du mirindaj vicoj de supermetitaj arkoj; 11 en la suba vico kaj 25 en la supera. Ĝia maksimuma alto estas 40 metroj kaj ĝi estas 217 metrojn longa.

Centelles. En ĝia unua epoko ĝi estis varmobanejo. Poste ĝi fariĝis religia restadejo. Estas rimarkinda ĝia mirinda mozaiko en kupolo je 10 metroj de diametro, el paganaj motivoj. Oni kredas ke ĝin konstruis *Adria*. Ĝi estas unu horo malproksime de Tarragona, kaj vere estas vizitinda.

Museu. Ĝi estas en la teretaĝoj de la Urbodomo kaj Deputatodomo.

Ĝi konsistas el 3 salonoj, en kiuj estas kolektitaj ĉiuspecaj historiaj estintaj artaĵoj, el arkitekturo, ceramiko, skulptarto; kaj plie armiloj, vitraĵoj, aŭtografoj, moneroj, pentraĵoj, tomoŝtonoj, kaj surskribaĵoj, k. t. p., k. t. p.

Provinca Biblioteko. Ĝi enhavas ĉirkaŭe 20,000 verkojn. La kolektoj de manuskriptoj, kodoj, *cartularis* (cartulario cast., cartulaire fr.) estas la plej antikvaj el la XIII^a jarcento kaj aparteninta al Poblet. Ankaŭ multenombraj estas la inkunabloj.

Katedralo. Ĝia fundamento formas turan krucon de la komenco de la XII^a jarcento. Ĝi staras en la plej alta loko de la urbo, kaj estas belega ekzemplero el romarto de la unua epoko. Ĝia fasado majeste leviĝas; ĝia sojlo estas longa je 6'80 metroj kaj la centra kolono estas 5'92 metrojn alta.

Estas tute interesaj: la granda baptopelvo pro tio, ke ĝi estis banopelvo de la imperiestro Aŭgusto; ankaŭ la tombo de la reĝo Jaime I; la figuroj de la kapelo de la «Sant Sepulcre»; la fiorejo (1445) kun ĝiaj sennombraj polikromaj libroj; ĝia orgeno modelo el sia klaso; la kapelo de la Sakramento pro ĝiaj surmuraj pentraĵoj de Isaak Hermes, kaj tiu de la Plej Sankta Virgulino.

Estas vizitinda la Apsido kun ĝia ĉefaltaro kiu estas arta juvelo kaj unu el la plej belaj en Hispanujo; la *retaulo* kiun konstruigis la Ĉefepiskopo Tello, mirinda verko el gota arto kun kiu alia en la mondo povas nek konkuri nek esti komparata; la tombo de la infanto *Joan d'Aragó*, k. t. p.

Claustre (Klaŭstro). Ĝin komencigis la ĉefepiskopo *Tort* por instalati en ĝi la komunumon de kanonikoj (1146) kaj ĝi estis konstruita sur ruinaĵoj de la *Arce-romana*. Ĝi estas vera muzeo de kapiteloj — kaj el ili estas fama en la mondo tiu de la *profesó de les rates* (procesio de ratoj); — la *bizanca* pordo kiu alitempe anstataŭis la pordon de la fasado; la restoj el romana kaj gota arkitekturo de ĝiaj muroj; la kapelo de la «Corpus-Christi» kaj salono del Kapitolo kun ĝiaj interesaj tapiŝoj kaj la morta drapo de la reĝoj kiu estis posedaĵo de Poblet, la multvalora kolekto de tapiŝoj, k. t. p.

Portal de Sant Antoni (Portalo de Sankta Antono). Ĝi estas el marmoro kaj ĝin konstruigis Ferran VI en 1757. Antaŭ ĝi staras la bela gota kruco nomata kruco de *Sant Antoni* (Sankta Antono)!



ENLANDA MOVADO

BARCELONA

Ekskursoj. — La grupo «Esperanto kaj Patrujo» organizis ekskurson al la fonto de «Mas Guimbau» (Vallvidrera) okazintan la 30^{an} de Aprilo. La ĉeestantoj estis multenombraj kaj multajn fraŭlinojn oni vidis inter ili.

La esperantista grupo «Kulturo» vizitis, la saman tagon, la Hospitalon de Sant Pau. Kvankam ĝi estas ankoraŭ konstruata ili povis admiri la belan verkon de la fama arkitekturo Sro. Domenech i Muntaner.

La Ekskursa Fako de la grupo «Ĉiam Antaŭen» decidis inaŭguri serion de ekskursoj, kiuj samtempe estos agoj de propagando ĉar dum ili oni disdonos «Tot l'Esperanto en una fulla» al la loĝantoj de la urbetoj kaj vilaĝoj kiujn oni vizitos dum la ekskurso.

La aprilan monaton oni faris ekskurson de Badalona al Moncada tra Montalegre, Sant Fost kaj Ripollet.

Al Cabanyes, Reixac, Torre Pallaresa kaj Santa Coloma oni ekskursis la 21^{an} de Majo.

Ni deziras al tiaj propagandagoj grandan sukceson.

Nova grupo. — Oni fondis grupon, kies sidejo estas Strato Mariano Cubi, 160 (Sant Gervasi), sub la nomo «Esperanta Aŭroro».

En tiu grupo estis malfermataj du kursoj okazantaj lundojn kaj jaŭdojn la elementa kurso, kaj mardojn kaj vendredojn la supera kurso. Ambaŭ de la 8^a kaj $\frac{1}{2}$ ĝis la 10^a.

Parolado. — La lasta «Esperantista Vendredo» ĉe la agema «Grupo Semo» konsistis el la anoncita parolado de nia Kataluna pioniro kaj kara amiko Sro. Fred. Pujulà.

Ĉirkaŭ 100 gesamideanojn kunvenigis la anonco de ties parolado.

Sro. Pujulà rakontis historiajn de la urbo de la «Sepa» pri kies nomo, Antverpeno, li sciigis la devenon. Per multaj kliŝaĵoj li vidigis Antverpenon kaj ĝian gravecon: artajn trezorojn, grandan riveregon Skeldon kaj ĝiajn vastajn havenojn, instalaĵojn, monumentojn, belegan Zoologian ĝardenon, vivplenaĵn stratrojn, k. a. Kaj tion faris Sro. Pujulà tre alloge. Kiel plej bona laŭdo por lia parolado, jen ĝiaj finaj frazoj:

«Jen estas la kelkaj vidaĵoj kaj informoj pri Antverpeno, kiujn mi deziris prezenti al vi. Mi esperas ke ili naskos ĉe vi la premantan deziron viziti kaj observi vi mem senpere tiun belegan urbon, juvelo de la nordaj landoj, centro de agado, de inteligento kaj de noblaj aspiroj, industria svarmejo, ekzemplo de kuraĝo kaj persisteco, kiu sciis glori eligi el la cindroj, kiujn jetis sur ĝin barbaraj preadoj!

Sed memoru bone: kiam oni vizitas alilandan urbon, eĉ enlandan urbon, en kiu oni ne havas konatojn nek amikojn nek estimajn rilatojn, oni sin sentas sola, des pli sola ju pli granda estas la belo kaj la alloganteco de la vizitata

urbo. Oni sentas, kiel antaŭ ĉia mirinda spektaklo en la mondo, la bezonon komuniki al proksimulo siajn internajn impresojn.

Memoru bone : dank'al Esperanto, kiam vi iros al Antverpenc, vi ne estos tie fremduloj. vi ne estos solaj, vi renkontos tie fervorajn amikojn, kies amo al Internacia Lingvo inklinos ilin al via servo kaj helpo, kaj se vi iros al Antverpeno dum la 7^a Internacia Kongreso de Esperanto, kiu okazos on Aŭgusto, ne nur amikojn, tutan familion vi renkontos, ĉe kiu vi vin sentos feliĉaj esti homoj kaj ĝui en la belega scenejo, kiun mi prezentis al vi, la belegan altajn sentojn de homa interfratiĝo kaj alproksimiĝo paca.»

La tuta aŭdintaro premiis tiun paroladon per longa aplaŭdego.

Esperantistaj vendredoj. — En la sama grupo okazis tri kunvenojn en kiuj oni daŭrigis la interparoladojn por la starigo de unika barcelona grupo. Ni deziras sukceson al la iniciatintoj de tiu afero.

Al nia kongreso! — La entuziasmo por ĉeesti nian kongreson pli kaj pli vekigas en niaj barcelonaj samideanoj; en privataj kaj publikaj babiladoj oni ofte aŭdas priparoli tiun aferon kaj oni povas certigi, ke la barcelona samideanaro estos bone reprezentata en Tarragono.

SABADELL

La grupo «*Esperanta Semo*» organizas paroladon kun lumbildoj pri Antverpeno. Kredeble ĝin faros nia kamarado Fred. Pujulà.

«*Katolika Stelo*» faris ekskurso-viziton al grupo «*Lumon!*» de Terrassa.

«*Aplec Esperanta Grupo*» malfermis novan kurson por virinoj.

La Esperanta Sekcio de la C. de D. del C. i de la I. forlasis por nova okazo la ideon fari publikan propagandan akton.

TERRASSA

Novan fojon la kataluna esperantistaro perdis unu el siaj plej lertaj kaj kleraj anoj : Ptron. Jaume Muixí, skolpiulo. De antaŭ longe li propagandis nian Esperanton ĉu skribe ĉu parole, lernigante ĝin senescepte al ĉiuj. Li fondis en Castellar del Vallés Esperantan Grupon, kaj helpis la starigadon de nia Grupo Lumon! Li sukcesis atingi permeson por instrui nian internacian lingvon ĉe la lernejo de Skolpiuloj de Terrassa, kies li estis profesoro, al infanoj kaj knaboj.

Ankaŭ li estis unu el plej fervoraj partianoj de «*K. E. F.*» al kiu ĝi tuje aniĝis kaj helpis, kaj kiun propagandis inter niaj samurbanoj. Lia fervoro por nia celo estis tia, ke li eĉ dum la tre longa malsano, kiu lin forprenis de ni, ne ĉesis labori por nia kara lingvo Afabla kaj tre humila sciis alvarbi ĉiujn al sia simpatia kaj sindona amikeco.

Nia katalunaj lingvo kaj literaturo perdis ankaŭ fervorulon. La paco al nia plorinda estimata kamarado!

VALENCIA

Post la vizitado al kelkaj gravaj eŭropaj urboj, pola Dro. Martin Steckiewicz, kuracisto de la Rusa Militistaro honoris per sia vizito Valencion, en kiu li jam de kelkatempo havis korespondantinojn.

Okaze de tiu vizito, la 8^o de Majo, tiu klera pola esperantisto faris paroladon en la sidejo de la Esperantista Grupo. Kompreneble, en tiu parolado li montriĝis mirigita de la gastama frateco, per kiu li estis akceptita ĉie, de la geesperantistoj, dediĉante apartan paragrafon al la Barcelonaj geesperantistoj, kies gastamecon, li neniam forgesos. Malgraŭ lia homfido, li ankaŭ montriĝis surprizita de la progresado de nia lingvo en tiuj de li travizititaj landoj, precipe en Katalunujo, kies nuna stato de propagando kaj progresado estas imitinda. Tiu parolado estis tre aplaŭdita de la ĉeestantaro, en kiu troviĝis briligante la feston multe da valenciaj esperantistinoj, kies nombro, preskaŭ nerimarkebla dum la memorinda Postkongreso (Septembro 1909^a), estas nuntempe, ja, atentiga.

La kvintaga restado de Dro. Steckiewicz en Valencio, certe estos neforgesebla, tiel por la klera pola doktoro, kiel por la Valenciaj geesperantistoj, kiuj gardos ĉiam ĉe la koro, la memoron pri tia fratiga vizito, kaj esperas novan okazon por interfratiĝi kun ĉiulandaj samideanoj. — *Angelo Novejarque.*



POR LA NEFEDERACIANOJ

Kiam ni estas en ĝojo, kiam la bruo kaj laboro de la Kongreso surdigas niajn sentojn per ĝojo kaj entuziasmo, frapo de samcelanoj nin dolorigas en la animo. Ni, kiuj de antaŭ longe nin liveris al Esperantismo kaj al propagando de Esperanto kun tuta abnegacio, kun tuta sindonemeco, kun tuta humileco; ni, kiuj ĉiupaŝe semas kaj vokas pacon; ni, kiuj lasas sen timo nek dubo ia la pordon de nia organizado tute malfermita; ni, kies vojon ni sekvas tute en rekta linio, kaj kies proponoj ne estas suspektaj pro tio ke ni ilin klarigas en la lumo de la tago kaj per skribajoj, ne sukcesas kompreni tion, kion enlandaj samcelanoj agis rilate al ni.

Jen ĝi: ni sendis al la tremalmultenombraj ne aliĝintaj al «K. E. F.» grupoj, cirkuleron petantan ilian anigon al nia Federacio, aŭ almenaŭ ilian nean respondon, en la celo koni niajn — laŭ ilia kredo — malperfektaĵojn de organizado. *Neniu respondis al ni!* Eĉ en plej primitivaj landoj la organizitaj societoj ricevintaj petantan skribajon atente respondas pli malpli longe. Tion ja konsilas la bona edukiteco. Ni estas en civilizita lando, ni loĝas kaj havas rilatojn kun civilizitaj homoj batalantaj por la grava celo *fratigi la homojn*, kiel ni mem batalas, kaj tamen oni ne respondas al frato, al samcelano, al samlandano. Jen plej granda aberacio!

Se ni ne estus tiaj, kiaj ni estas, tia fakto ne estus nin dolorinte; sed ĝin ni ricevas de homoj, kiuj sin nomas fratoj niaj kaj samcelanoj. Ni certe ne scias konvinkiĝi pri la konduto kaj celo de tiaj fratoj. Sed eĉ en doloro ni ne malesperas! For de ni la cinikajoj kaj ironioj. Ni ne fermas la pordon nian, kaj ankoraŭ ĉiu sur ĝi povas legi:

«La kontraŭcelulojn konvinkiĝi;
la indiferentulojn alvarbi;
al samcelanoj, saluton;
al ĉiuj respekton!»

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONO-HISPANUJO

AVIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezone la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.



DOMINIKO SERDÁ SIMÓ

DOMINIKO SERDÁ SIMÓ

LA 27^{an} Junion mortis en Sabadell je la 27^a ĵaraĝo nia amiko kara, la direktoro de K. E. Sro. Dominiko Serdá, unu el la plej entuziasmaj esperantistoj de nia lando.

Kiam por ni devus esti motivo de ĝojo la redaktado de ĉi tiu numero, kiam niajn orelojn ankoraŭ frapas la festbruo okaze la sukceso de nia dua Kongreso al kiu ne povis ĉeesti nia amiko, restigita en lito de grava malsano per kiu morto kruela subĵetis en ombron tiu potencon cerbon, ni restas kortuŝitaj, kaj de nia plumo anstataŭ flui kanto el ĝojo kaj entuziasmo, fluas kanto funebra.

De la jaro 1905^a ke li per la estinta revuo «*Joventut*» konis Esperanton, kaj tuje, kune kun kelkaj samurbaj amikoj li eklernis nian lingvon kun plena fervoro, fervoro kiun li ĉiam metis en ĉiuj siaj entreprenoj, ĉar ni devas rememori, ke li estis ĝenerala sekretario de la societo «*Centre Català*» redaktoro de la ĵurnalo *Acció Catalana* en kiu li publikigis esperantan fakon, sekretario el la juĝantaro de la literatura konkurso organizita de la societo «*Centre Industrial*» dum la jaro 1906^a per kia sekretaria raporto li konigis siajn literaturajn konojn, kaj poste li sin konigis kiel rapsodo, legante tute ĝuste kaj klare kun la devigaj nuancoj kiujn havas en ili la plej bonaj literaturaj verkoj de niaj poetoj.

De tiu momento li iĝis varma propagandulo de tiu feliĉa solvo kreita de Dro. Zamenhof al grava demando de lingvo internacia, kaj dediĉis sian tempon, sian fortikan volon kaj fruktigajn klopodojn al tiu lingvo kaj al tiu ideo.

Estis la unua prezidanto de Esperanta Semo, unu el la plej malnovaj societoj el nia lando, kaj diversaj kursoj estis de li klarigitaj. Al kiom da gesamideanoj li konigis nian lingvon! Estis nediskutebla la vera fondinto de K. E. F. de tiu grava asocio de ĉiuj samlandanaj esperantistoj, kies nuna graveco kaj vivpotenco estis montrita de la ĵus okazinta kongreso en Tarragona, graveco kiun li ne povis ĝui.

Por tiu federacia ideo, li batalis longtempe, ĉar li estis ankaŭ unu el la fondintoj kaj redaktoroj de *Tutmonda Espero*, en kia kolekto oni povas trovi kelkfoje lian subskribon, kun la celo krei la katalunan Esperantistan Federacion, sed tiam la tero ankoraŭ ne estis sufiĉe bone semita, kaj li atendis senlace, pacience, la oportunan momenton por arigi la katalunajn esperantistojn.

Nia amiko malaperis, certe, tro certe ve! tamen homara ĉelo de potenco rǎdia antaŭ malaperi enigis en ĉirkaŭantaj ĉeloj sian propran celon kiun fatalo malpermesis lin plenumi. Li malaperis certe, tro certe bedaŭrinde, sed ne sia vivo, ĉar ĝi estis transdonita al Esperanto. Tiu, pli konkrete K. E. F. entenos longtempe en ĝi la impulson de lia puŝanta animo. Tiamaniere nia inda plorita kamarado venkas morton mem per tiu ĉi superorgana vivado postmorta, cirkonstanco observebla en la morto de ĉiuj grandaj homoj.

Inter lia literatura heredo li lasis kelkajn tradukojn de gravaj katalunaj verkoj kiujn ni intencas kolekti kaj publikigi kiel lasta Respektego al la memoro de tiu kiu estis dum sia vivo nia direktoro, nia amiko, kaj fervora esperantisto.

Sur nia skribotablo kuŝas ankoraŭ la lastaj paperfolioj de li skribitaj; ili estas la originalo por la preskompostado pri la premiitaj manuskriptoj de nia literatura konkurso; ili estis skribitaj kiam li jam estis enlitiginta, kaj ni devos gardi kaj konservi ilin kiel simbolo de la Homo kiun ne timigas la Morto, ĉar havas fortan volon por diri al ĝi ĵatendu! mi ankoraŭ devas dikti mian testamenton.

Al lia enterigo ĉeestis kelkcentoj da amikoj kaj samideanoj; Dro. Bremón kaj Sro. Santiago Mas, tenis nigran rubandon je la nomo de la Federacio kaj Esperanta Semo respektive, kaj la ĉerko restis preskaŭ kaŝita per naturflorkronoj senditaj de ĉi tiuj korporacioj kaj de la fraŭlinoj de li esperantigitaj.

Ke ni estu bonaj por sekvi la vojon de li signitan kaj tiel ni honoros lian memoron.

Al lia familio por kiu li estis ĉiam bona filo kaj frato, niajn plej sincerajn kondolencojn.

Pace ripozu.

K. E. F. KAJ K. E.



II^a KONGRESO DE KATALUNAJ ESPERANTISTOJ

ORGANIZITA DE

«KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO»

SUKCESON ni esperis de nia II^a Kongreso. Ĝi preterpasis niajn esperojn. Kiel homoj, kiel esperantistoj, kiel federacianoj ni estas plenaj de ĝojo. La unuiĝo de la katalunlingvaj esperantistoj estas evidenta fakto substrekita krom per la Kongreso mem, per la

parolo de la delegitoj de la 40 grupoj reprezentita; en ĝi. La laborado estis laciga sed la fina rezultato ĉion kompensas, kaj laŭ la elokventa parabolo de Pastro Coil, la kelkaj nuboj, kiuj trakuris nian ĉielon fariĝis belkoloraj per la radioj de la Esperanta Suno kaj nun ili plibeligas la pejzaĝon.

Dank' al la klopodo de niaj karaj geamikoj el Tarragono, nia Kongreso konstante prezidita de aŭtoritatuloj havis karakteron kvazaŭ-oficialan. Tio estis por ni plej grava venko. Esperante parolis la Urbestro dum la festeno kaj la Floraj Ludoj; esperante parolis la Prezidanto de la Alta juĝistaro Provinca, la prezidanto de la Deputitaro, la Delegito de la Financa Ministraĵo. Ili toastis esperante por nia Majstro kaj por ni; ili toastis por la interna ideo de nia movado, kaj ili uzis en tiuj momentoj nian internacian lingvon kvazaŭ por montri ke iliaj vortoj ne estas nur afablaj sed ankaŭ veraj kaj kore sentitaj.

La kataluna lingvo povis vidi en Tarragono siajn ĉieajn reprezentantojn. Inglada el *Alicante* gajnas la Naturan Floron per majstra tradukaĵo; Novejarque el *Valencio* gajnas premion kaj aliĝas per tuŝantaj vortoj al la Federacio; la Pireneo kaj la Insuloj sendas samideanojn, kaj el ĉiu flanko de nia lando ne tre oportuna por longaj vojaĝoj alvenis fervoruloj kun la koro plena de entuziasmo por Esperanto.

Nur kun la helpo ĉies povis okazi tiel granda manifestacio de nia ideo, kaj pri tio ni jam estis konvinkitaj kiam de antaŭ multe da tempo ni laboradis por la starigo de nia Federacio. Neniu restis surda al la voĉo de la logiko kaj esperantista fervoro, kaj nia vojo estas nun klara, rekta. Ĉiu, se sia loko povos kunhelpi kaj kunhelpos. Ni havu nur fidon al la estonta tempo kaj ni pliperfektigu interkonsente.

Ni rememoru nun per la raporto, kiun ni publikigas, la belan Kongreson II^{an} de nia Federacio, sed ni ne ripozu tro en ĝuo de la sukceso. Niaj samideanoj de *Vich* atendas nin por la III^a. Ni pretiĝu de nun, kaj dum la tuta jaro ni laboru fervore por Esperanto kaj por la plifortigo de la frataj rilatoj inter ni.

Vivu la «Kataluna Esperantista Federacio»!

ALVENO AL KONGRESURBO

Per la vagonaroj kiu foriras matene el Barcelona, multaj samideanoj vojaĝis al Tarragona, sed kiam estis pli granda la nombro, estis en la vagonaro kiu foriras je la 9^a.

La vojaĝo estis tre amuza, ĉar aparte la belaj vidaĵoj kiujn oni povas ĝui, la konversacioj, kaj la ridetantaj fraŭlinoj kiujn ni vidas ne nur ĉe ĉiuj stacidomoj, sed ankaŭ en n'a vagono, ĉio tio estis kaŭzoj por pasigi tre bone la tempon.

Je la 12^a 15^a tagmeze ni alvenas al Tarragona, kaj en la stacidomo ni jam vidas Srojn. Pujulà, Bremón, Pallejà, Dalmau, kun la urbkonsilantoj Sroj. Nel-lo, Vallvé, Boldú, Gibert, Miró, kaj la Loka Komitato prezidita de senjoro Molas.

Salutoj, manpremoj, flagoj flirtantaj, kaj grava manifestacio, kiu sin direktas al la Urbdomo kie Sro. Cobos la Urbestro donis bonvenan saluton al ni; ankaŭ nin salutis Sro. Estivill je la nomo de la Provinca Deputataro; al ĉiuj respondis Dro. Bremón, per koraj kaj varmaj paroloj dankante la akcepton.

Militisto muzikistaro ludas *La Espero*, akompanata voĉe de la ĥoro «L'Ancora» antaŭ la Urbdomo, poste eksonas la notoj de La Rondo, kiu estas dancata de kelkaj gesamideanoj: fotografistoj kaptas kliŝaĵojn, kaj ni iras inaŭguracii la Esperantistan Ekspozicion.

Ĝi estas tute bone aranĝita, kaj en ĝi ni vidis 142 malsamajn esperantajn ĵurnalojn; la portreto de nia Majstro prezidas la salonon; oni estas disdoninta propagandajn foliojn por vekii la scivolemon de la vizitantoj.

Estas la dua horo tagmeze, kaj ni iras rekte al Hotelo ĉar preskaŭ nenion ni manĝis dum la tago, kaj ni devas remeti fortojn en nia korpo, ĉar je la kvara okazos la unua labora kunsido.



JOAN MOLAS
Prezidanto de la Loka Komitato

LABORAJ KUNSIDOJ

UNUA KUNSIDO

Je la kvina posttagmeze la ĉefurbestro malfermis nian unuan laboron kunsidon kaj post kelkaj vortoj de li, esprimante la deziron ke ni atingu



GRUPO DE KONGRESANOJ ANTAŬ LA URBDOMO

bonajn decidojn por niaj aferoj, transdonas la prezidon al prezidanto de K. E. F.

Dro. Bremón lin respondas, dankante al ĉiaj aŭtoritatoj el Tarragona la bonan akcepton kiun ili faris al ni.

Poste rememoras ke nia karega amiko Serdá, kaptita de grava malsano ne povas ĉeesti nian Kongreson, kaj ĉar li estis la vera animo de nia Federacio, ni antaŭ ekkomenci nian laboron, estas devigataj esprimi nian bedaŭron pro lia neĉeestado. Ĉiuj gekongresanoj staras kaj, aplaŭdas la vortojn de la prezidanto, kiu diras ke la aplaŭdoj estas por nia amiko.

Dro. Bremón legas la prezidantecan raporton, pri la laboroj de K. E. F. dum la jaro 1910-11. Jen ĝi:

«Jen ni, karaj kunfederacianoj, por la dua fojo kunvenintaj en Kongreso: jen ni, estimataj kolegoj, venintaj el ĉiu parto de Katalunujo, por partopreni en tiu ĉi granda kunveno montranta al nia samlandanaro la viglecon de nia ideo, pruvanta al la alilanduloj ke ankaŭ nia patrujo volas havi unu el la unuaj postenoj en nia sankta batalado...


En nia unua Kongreso, vi faris al mi nemerititan de mi honoron: vi nomis min estrarano de la Kataluna Esperantista Federacio, kaj miaj kunkomitatoj bonvolis elekti min, sian prezidanton. Mi juĝas tion grava eraro; sed bona aŭ nebona prezidanto, la fakto estas ke mi estas tia, kaj ne nur montro de ĝentileco de mi al miaj samsocietanoj, sed ankaŭ devo mia al ĉiuj federacianoj, devigas min ĝeni dum kelkaj momentoj vian atenton por klarigi al vi la agadon de K. E. F. en la periodo de nia unua al nia dua Kongreso.

En la Sabadell'a kongreso, ni decidis la kreon de Literaturaj Konkursoj:

lando tiel literaturamema kiel la nia, lando, en kies urboj kaj urbetoj oni festas ĉiujare la reviviĝon de nia literaturo, bezonis ke ankaŭ en la esperanta movado movado montriĝu la amo al beletristiko: jen kial la literaturaj konkursoj estas kreitaj: pri la granda sukceso de nia unua konkurso, mi ne volas paroli: la prezidanto de la komisiono speciale farita por ĝi, nia kara amiko kaj kunfederaciisto Sro. Pujulà, diros al vi en la festo baldaŭ okazonta ĉion koncernantan tiun ĉi aferon: mi, en la nomo de la komitato de K. E. F, donas al li kaj al liaj kunlaborintoj sinjoroj Rosals, Serdà, Cordoniu kaj Galcerán la plej varman dankon pro iliaj klopodo kaj laboro.

Alian decidon ni prenis en la unua Kongreso: mi parolas pri la kreo de la Havena Sekcio kies celo, kiel vi ĉiuj konas, estas la propagando de nia lingvo en fremdaj ŝipoj: mi invitas kaj esperas, ke Sro. Pellicer la sekretario de tiu subkomisiono, konigos al la Kongreso ĝian agadon.

Mi devas konigi al la gefederaciistoj, ke ekzistas en nia lando, nia studkomisiono kreita laŭ decido de la Lingva Komitato en la V^a Internacia Kongreso, por studadi la verkojn kiuj aperas en Katalunujo. Ĝi havas nenian rilaton kun la Federacio, ĉar estas afero de la Lingva Komitato: sed, tial ke unu el la membroj de tiu komisiono publikigis sian raporton pri verko tradukita el kataluna lingvo, en la organo de la Federacio, kaj tio povus kredigi ke la studkomisiono pri ĉiulanda verkaro estas afero de la Federacio, mi decidis fari tiun ĉi averton por ke ĉiu sciu, kiaj rilatoj ekzistas inter la Federacio kaj la studkomisiono kataluna.



LABORA KUNSIDO EN LA GRANDA SALONO DE LA URBDOMO

Ni havas motivon de ĝojo, tial ke la komitato de la Barcelona kongreso decidis doni la trionon rezultantan de la profito de la V^a, al la Federacio: tio estas ago de justeco, ĉar juste estas ke tial ke al la sukceso de la V^a kontribuis ĉiu grupo en nia lando, ili ĉiuj estu rekompencataj *per* la Federacio al kiu ili donis sian aliĝon.

La komitato de K. E. F. prezentas al via aprobo la regularon pri ekzamenoj, kaj la programojn por akiri la titolon de *kapableco* aŭ *profesoreco*. Mi esperas la diskutadon de tiu ĉi grava afero kiu kiel vi scias estas metita en la tagordon, por klarigi al vi la motivojn kiuj decidigis la komitaton de K. E. F. al ĝia prezento.

En la daŭro de nia interkongresa jaro, ni havis du grandvalorajn perdojn. Niaj samideanoj Sroj. Paul Berthelot kaj Muixi, pastro skolopiulo, forlasis nin: Sro. Berthelot, kvankam nefederaciano meritas memorajon nian: li, la unua, estis kiu provis fondi federacion katalunan: en la jaro 1905 nia fervora amiko tiam loĝanta en Ceret, kreis la «Aplec Esperantista de Katalunya» kies membro mi baldaŭ fariĝis, kiu enhavis membrojn de la franca kaj hispana Katalunujoj, kaj publikigis la *Espero de Katalunujo*, monata ĵurnaleto la unua aperinta en kataluna lingvo. Multaj el vi konis pastron Muixi: kora esperantisto, fervora federaciano, sincera amiko, li lasis veran rikolton en ĉiu urbo kie li povis semi: Castellar del Vallés, Terrasa, Vilanova kaj multaj aliaj urboj estas plenaj de liaj eksdisciploj: senkompata estis por ni la morto, kiu segis tiel frue tian por ni tiel valoran vivon!...

La nuna stato de la Federacio estas tre esperdona: ni havas 35 grupojn kaj societojn aliĝintajn, kaj pli ol 375 membrojn izolitajn: vi vidas do, ke en unu jaro ĝi vere fariĝis forta! Ni ĉiuj klopodu por ke ĝi senĉese kresku!

Mi finos mian paroladon per kelkaj dankaj vortoj: dankon, por la urbo Tarragona kiu tiel kore, frate, nin akceptis; dankon por la aŭtoritatuloj kiuj per sia helpo kontribuis al la kongresa sukceso: kaj varman, koran dankon por vi, membroj da la loka komitato, kiuj kun via prezidanto nia estiminda amiko Molas, klopodis laboris, penadis por vidi la efektiviĝon kaj sukceson de la II^a Kongreso de Katalunaj Esperantistoj.»

Poste la delegitoj de la aliĝintaj grupoj, prezentas la dokumentojn liveritaj al ili de siaj societoj.

Dum la societaj delegitoj prezentas la dokumentojn estas legita poŝtkarto de Dro. Zamenhof, salutante nian duan Kongreson, kaj la ĉeestantaro aplaŭdas bruege, ekkriante vivu nia Majstro!

La esploro de la delegitaj dokumentoj montris la jenan rezultaton.

Lluís Llopart, por *Amo Kaj Espero*; Santiago Mas, por *Monta Grupeto*; Josep Soler, por *Esperantista Grupo*, el Mataro; Josep Coll, por *Gerona Esperantistaro*; Anton Clivilles, por *Nova Semo*; Jaume Marcé, por *Fraterco*; Joan Casajoana, por *Komerca Fako*; Josep Ventura, por *Lumon*; Josep Pi, por *Olota Stelo*; Joan Aubeyzon, por *Supren!* Francisco Mestres, por *Laboro Esperanta*; Lluís Coll, por *Esperanta Amo*; Lluís Gubernado, por *Semo*; Ramon Soler, por *Ĉiam Antaŭen*; Santiago Puigbonet, por *Esperanta Nesto*; Dro. Joaquim Coll Pbre, por *Esperanta Akrofalo*;

Josep Anglada, por *Esperanto kaj Patrujo*; Joan Campdelacreu, por *La Rondo*; Antoni Martí, por *Esperanta Semo*; Francisco Moya, por *Forigu Barojn*; Rosèn Roig, por *Casino del Comercio* Jaume Gillomia, por *Esperanta Frateco*; Josep Grau, por *Barcelona Stelo*; Artur Torné, por *Universala Frateco*; Pastro Joaquim Coll, por *Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj*.

Ankaŭ estis ricevitaj salutoj de *Escola Universitaria*; *Vika Esperantistaro*; *Esperanta Grupo*, el Cervia; *Grupo Esperantista*, el Arbós; *Esperanta Fako*, el Ateneo Obrer Martinense de S. Martí de Provencals (Barcelona); *Biblioteka Museo Balaguer*, *Fomento del Trabajo*, *Orfeo Vilanovi*, kaj la *Urbeŝtraro* el Vilanova y Geltrú; *Orfeo Tarragoni*; de Sro. Angel Novejarque kaj telegramon de Sro. Vicente Inglada, redaktita jene: «*Korsaluton al ĉiuj kaj grandan sukceson al Kongreso. Inglada.*»

Sro. J. Piferrer, nia diligenta kasisto-administranto, legas la finanĉan raporton, klarigante kelkajn elspezojn de la jaro 1910 kaj konstatante la bonan antaŭeniradon de K. E. F. pri la monafero.

Unuvoĉe estis aprobitaj la kalkuloj publikigitaj en la Februara numero de K. E. kaj Sro. Mestres, el Vilanova y Geltrú, proponas danki per aplaŭdo Sron. Piferrer pro lia bona laboro, aplaŭdo kiun aprobas ĉiuj.

Sekvante la tagordon estis metita je la diskutado la aldono de la jenaj vortoj. «La delegitoj de K. E. F. estos rekompencitaj per la kvanto da 5 % el la kotizaĵoj, pro elspezoj de ili faritaj» al la VI^a artikolo de nia Regularo.

Post malgranda diskutado en kiu partoprenis Sroj. Pujulà, Campdelacreu, Pallejà, Dalmau, Piferrer, kaj Grau, estis aprobita kun la jena klarigo «la delegitoj povas konservi, se tion ili kredas konvena, la kvanton da 5 %, k. t. p. k. t. p.» Tiu reformo estis prezentita de la komitato de K. E. F.

Sro. Bordas, el Barcelona, demandas klarigojn al la Prezidanto pri noto publikigita en la Barcelonaj ĵurnaloj kiu diris ke la societo Espero Kataluna decidis ne sendi delegiton al la Kongreso.

Dro. Bremón, diras ke E. K. estas ankoraŭ aliginta al K. E. F. kaj petas de Sro. Rosals, prezidanto de E. K. ke li bonvolu klarigi la aferon.

La respondo de Sro. Rosals estas ke E. K. ĉiam restos fidela al la Federacio, kaj ke se iuj personoj nun agas kontraŭ ĝi, li ne povas kontraŭstari tion, sed li kondamnas la agon de l' personoj kiuj sendis tiun noton al la ĵurnaloj sen esti rajtigitaj por agi tiamaniere.

Sro. Pujulà, per varmaj vortoj dankas Sron. Rosals pro la klarigoj de li faritaj antaŭ la Kongreso.

Sro. Campdelacreu, petas ke la Kongreso deklaru ke la oficiala nomo de la Federacio nur estas «Kataluna Esperantista Federacio» esperante, kaj «Federació Catalana d'Esperantistes» katalune, kaj la Kongreso faras tian deklaron.

Tiel finiĝis la unua kunsido ĉar estis jam sepa horo kaj la urbeŝtraro atendis la kongresanojn por ilin regali per Koncerto kaj Honora Vino.

La prezidanto rekomendas al la kongresanoj la akuratecon por la dua kunsido kiu devas okazi la morgaŭan tagon.

DUA KUNSIDO

Je la 10^h50^a horo mantene Sro. Bremón malfermas la kunsidon.

Oni ekkonmencas diskuti la du reformojn al la Regularo prezentitajn de Sro. Pujulà, Pellicer, Rosals, kaj Dalmau.

Post grava kaj interesa diskutado, en kiu partoprenis Sroj. Pallejà, Dro. Coll, Pujulà, Piferrer, Dalmau, Grau kaj la Prezidanto, la kongreso aprobis la jenajn decidojn.

Rifuzi la unan aldonon, tio estos, ke la grupoj aŭ societoj pagos kotizafon por difinita kvanto da membroj kaj ke la Federacio donu al ili tiom da ekzempleroj de K. E. kiom da kotizaĵoj ili pagos; kaj ke la riprezentantoj de la societoj aŭ grupoj havu ankaŭ la rajton voĉdoni tiom da fojoj kiom da kotizaĵoj ili pagos.

Aprobi la duan aldonon kiu starigas:

I. Konsultan Komitaton, formitan de ĉiuj Prezidantoj de societoj aŭ grupoj aliĝintaj al K. E. F:

II. Ke estu Prezidanto de ĉi tiu Komitato la plej maljuna el ĉiuj kaj Sekretario la plej juna.

III. La Komitato decidus kiamaniere estos pagitaj la elspezoj okazigitaj pro la aranĝo kaj funkciado de ĝi; kaj la materiala helpo kiun devos doni al la Federacio la aliĝintaj grupoj.

IV. La rajto partopreni en tiu Komitato estas persona kaj ne transdonebla.

Aprobitaj la antaŭaj reformoj estis legitaj la sekvantaj komunikaĵoj.

De Sro. J. Altura, el Sabadell, pri bezono altiri al Esperanta movado la laboristojn.

De Sro. R. Palleja, el Ulldemolins, pri propagando de Esperanto en vilaĝoj.

Kaj de Sro. J. Anglada, el Barcelona, pri la fondo de ekzamenkomisio pri verkaro.

Tiuj Komunikaĵoj ne estis diskutitaj ĉar ili ne estis prezentitaj kiel proponoj, sed Sro. Pujulà petis permeson por respondi al Sro. Anglada, kaj post la demando al la kongreso ĉu oni povas malfermi diskuton pri tiu afero, li refutis la argumentojn de la Komunikanto. En la diskutado ankaŭ partoprenis Sroj. Piferrer kaj Dro. Coll.

Laŭ la tagordo estis metita al la aprobo de la Kongreso, la regularo de *Atesto pri lernado kaj profesoreco*.

La Prezidanto Dro. Bremón defendas la necesecon, ke kleraj personoj certigu kaj rajtigu, — laŭ rezultato de la ekzamenoj — la kapablecon por instrui Esperanton, kaj konsekvence ke estas necese nomi oficialajn profesorojn.

Dro. Coll, prezentas aldonon kiu diras ke ĉiuj esperantistoj akirintaj tri ordinarajn premiojn de tradukaĵo en niaj Literaturaj Konkursoj, estu ankaŭ diplomitaj kun la atesto pri Profesoreco.

Post malgranda diskutado estis aprobita la jena reformo «Estos diplomitaj kun atesto pri Profesoreco la akirintoj de tri ordinaraj premioj de traduko en la Literaturaj Konkursoj organizitaj de K. E. F. Oni devos submetiĝi al la ekonomiaj kondiĉoj, starigitaj por la akiro de ĉi tiu diplomo».

Sro. Campdelacreu demandas ĉu nur estos ekzamenitaj ĉiuj kiuj lernis esperanton per Katalunaj gramatikoj, aŭ ĉu ankaŭ oni akceptos ekzameni laŭ kastilaj gramatikoj.

Sro. Pujulà lin respondas, ke por ni Katalunoj, estas tute komprenebla la neceseco scii la katalunan lingvon, por lernigi Esperanton al katalunoj, kaj ke se iu ne scias bone sian propran lingvon ne estas logike ke li pretendu akiri titolon de profesoro donita de Federacio kuŝanta en lando kies lingvo li ne konas.

Sro. Rodellar ankaŭ prezentas aldonon kiu diras ke la lernantoj estu ekzamenitaj per Kataluna aŭ Kastila gramatiko, laŭvole, ĉar tiel estas pli vasta la kampo por la lernantoj, «tiu propono estis rifuzita ne akceptinte diskuton pri ĝi »

Okazis poste tre grava diskutado en kiu partoprenas Sroj. Pallejà, doktoro Coll, Grau, Brú, Rodellar, Dalmau, Campdelacreu, Pujulà, kaj la Prezidanto, dum kiu estis prezentitaj kelkaj reformoj kaj aldonoj, sed fine la nomitaj sinjoroj interkonsentis, prezentante la jenajn aldonojn kiuj estis aprobitaj unuvoĉe. «La ekzamena tribunalo kunvenos en Barcelona, ĉiam, kiam dek membroj, dezirantaj, ekzameniĝi, petu tion, kaj en aliaj urboj, kiam almenaŭ tri membroj pagu la elspezojn por vojaĝoj k. t. p. Ankaŭ ĉiujare oni kunvenos en la kongresurbo kaj kongresaj tagoj.»

«La Kongreso decidis esprimi la plej sinceran konfidon al la komitato de K. E. F. por elekti la unuan ekzamenan tribunalon el la federacianoj.»

«La Kongreso decidis ke estu la komitato de K. E. F. kiu devas nomi la profesorojn por formi la ekzamenajn tribunalojn.»

Je la unua horo tagmeze finiĝis la dua kunsido, ĉar kelkaj el la ĉeestantoj devas ĉeesti oficialan festenon kune kun la aŭtoritatoj.

TRIA KUNSIDO KAJ FERMO DE LA KONGRESO

Je la kvara kaj duono Dro. Bremón malfermas la kunsidon kaj oni legas komunikajon el «Vika Esperantistaro» petantan al la Kongreso ke nia III^a okazu en Vic.

La Prezidanto demandas ĉu oni akceptas la proponon, kaj la Kongreso unuanime respondas Vivu nia tria en Vic!

Poste la Prezidanto permesas dek minutojn da libertempo por ke la kongresanoj interkonsentu pri la novaj anoj por formi la komitaton 1911-12: kiam la Prezidanto remalfermas la kunsidon, Sro. Pujulà petis permeson por paroli je la nomo de kelkaj kongresanoj, petante al la Kongreso ke unuanime elektu por la nova komitato la jenajn sinjorojn, Sro. Dro. Bremón Masgrau, el Barcelona, Sro. J. Píferrer Rifà, el Sabadell, Sro. E. Pellicer,

el Barcelona, Sro. J. Planas Sadurni, Pastro, el Barbarà del Vallès, sinjoro J. Palmarola, el Vic.

Sro Pujulà per varmaj paroloj prezentas la novajn komitatanojn, laŭdante la agadon de Sroj. Piferrer kaj Bremón dum la lasta jaro, kaj la entuziasmon kaj fervorecon kiujn havas por nia lingvo kaj la Federacio sinjoroj Pastro Planas, Pellicer kaj Palmarola.

La Kongreso akceptas korege la proponon de Sro. Pujulà kaj aplaŭdas bruege la novan ĵus elektitan Komitaton.

Sroj. Dalmau kaj Dro. Coll petas al la kongreso ke ĝi esprimu la plej koraĵajn dankojn al la komitato de K. E. F. kaj ankaŭ al la Loka komitato, por la bona aranĝo de la Kongreso.

Kelkaj societaj delegitoj salutas la Kongreson je la nomo de la neĉeestantaj samideanoj, speciale Dro. Coll, kiu deklaras per elokventaj paroloj, ke kvankam siaj katolikaj amikoj nun fondis esperantistan ligan, ili ĉiam restos ĉe nia flanko, ĉar kiel katolikoj ili estos en *Katolika Esperantista Ligo*, kaj kiel Esperantistoj, ilia devo estas resti en la vicoj de K. E. F. Li finas proponante sendi telegraman saluton al Sro. Serdà.

La germana esperantisto Sro. Fritzching, kiu estis inter ni la du tagojn ankaŭ parolis, esprimante sian gratulon pro la kora gastameco trovita de li inter ni.

La Urbestra riprezentanto Sro. Vallvé, adiaŭas la kongresanojn, petante ke ili konservu bonan rememoron el Tarragona.

La Prezidanto, dankinte la ĵurnalojn el Tarragona, Barcelona kaj aliaj urboj, kiuj pro la propagando de ili farita helpis la bonan sukceson de nia II^a Kongreso, fermas ĝin kun la krioj Vivu la III^a en Vic! Vivu nia Majstro! Vivu Esperanto!

KONGRESAJ FESTOJ

LITERATURA KONKURSO

La disdonado de premioj al la aŭtoroj de la premiitaj manuskriptoj estis unu el la plej belaj festoj de la Kongreso.

Ĝi okazis en la teatro-salono de la «Patronat de l'Obrer». Je la horo antaŭfiksita por la komenco estis neeble transiri la salonon. Ĉie oni vidis belajn, junajn fraŭlinojn kies helaj vestaĵoj frapis la okulon de ĉiu eniranto. En ĉiuj anguloj de la salono freŝaj ridadoj, vivplenaj interparoladoj sin aŭdigis. Tiu granda salono estas nesufiĉa por enteni la grandan nombron de personoj tien kunvenintaj.

Sur la dekstra flanko de la scenejo ni vidas la komitaton de K. E. F. kaj la juĝantaron de la konkurso; sur la maldekstra flanko oni povas vidi la tarragonajn Urbestron, Prezidanton de la Provinca Deputataro, Provincan Guvernestron k. t. p. Sro. Cobos, urbestro, elparolas la tradician frazon: *Oni malfermas la feston.*



FESTO DE LA LITERATURA KONKURSO

Sro. Pujulà bedaŭras ke Sro. Serdà de Sabadell, Sekretario de la Literatura Konkurso ne povas ĉeesti la feston pro sia malsano, kaj sekve ne povas legi la raporton persone; tion faras Sro. Bordas, kiu anstataŭis lin.

Jen unu el la plej gravaj paragrafoj de la sekretaria raporto.

«Ĉefe, nia afero estas lingva, kaj la Floraj Ludoj Esperantistaj en nia lando nur povus esti utilaj kaj fruktoportaj taŭgante kiel perfektigilo de la du branĉoj de la arbo de nia Literaturo: la branĉo, kiu produktas la fruktojn originalajn, kaj tiu, kiu ellaboras post greftado la fruktojn produktitajn de la arboj de la naturaj lingvoj. Tial ili decidis ke la ordinaraj temoj estos ĉiam apartigitaj en du grupojn konsistantajn el originalaj kaj tradukitaj tekstoj, kaj kompreneble ke en ĉiu grupo oni aljuĝos tiom da graveco al la versaĵoj kiel al la prozaĵoj, ĉar en ambaŭ povas troviĝi Beleco kaj Poezio, — ĉefaj celoj de niĵ Konkursoj, — nepraj gastoj de la perfektigo de nia Lingvo.

Ni devas konfesi ke la tekstoj elektitaj kiel tradukotaĵoj estis vere malfacilaj kaj plenaj de *kaprompiloj*, sed oni ja deziris pruvi laŭ evidenta maniero ke Esperanta lingvo estas vere literatura lingvo, kaj la belaj tradukaĵoj, kiujn la juĝantaro premiis montris la veron de tiu aserto. Per ili la aŭtoroj neniel perfidis la originalajn verkojn kaj konstatinde estas, ke se ni komparas la originalajn esperantistajn verkojn kun la tradukaĵoj, ni devos deklari tiujn ĉi plej bonaj.

La juĝantaro de la versaĵoj opinias ke la senditaj verkoj estis pli bonaj

kiel esperantajoj ol kiel poeziaĵoj. La lingvo en ili estis tre bone servita; la ritmo kaj la rimo multe suferis kaj plendis. Oni ja povas esti tre bona esperantisto kaj eĉ prozisto, kaj tamen ne kunlogi en bonaj amikaj rilatoj kun tiuj du postulemaj sinjorinoj. Tamen la premiita per la Natura Floro versaĵo estis tiel korekta kaj ĝusta, tiel poeziplena kaj unuvorte majstra, ke la juĝantaro ne dubis ne aljuĝi al alia ia verko la ĉefan plej honoran premion.»

Sro. Bordas poste, sciigas la nomojn de la laŭreatajn aŭtorojn:

Aŭtoro de la traduko de «La Vaca cega» kiu laŭ la antaŭa raporto rajtas elekti reĝinon de la festo, estas Sro. V. Inglada i Ors pro sia traduko kies devizo estas «El ĉiuj estaĵoj la blinda, sendube la plej kompatinda».

La leŭtenanto Sro. Francisco Ibañez je la nomo de Sro. Inglada akompanas la reĝinon fraŭlinon Maria Caballero al ŝia trono. Ŝi estas sekvata de la «Kortego de Amo», kiu estas formata de dek belegaj fraŭlinoj. Tiuj ĉi fraŭlinoj, ĉarmaj tarragonaninoj el kiuj tri reprezentas la kursaninojn de Esperanto, iras akompanataj de individuoj de la Loka Organiza Komitato, Juĝantaro de la konkurso, k. t. p. kaj elvokas pro ilia beleco kaj eleganteco de tualetoj, bruan komentariaron: el ĉiuj lokoj de la teatro aŭdiĝas voĉoj de admiro. Dum la trairado al la scenejo la aplaŭdado de la ĉeestantaro estas senĉesa kaj bruega.

La reĝino sidas en sia trono, kaj apud ŝi, kunprezidas la feston la «amkorteganinoj». En la nomo de la poeto premiita, Sro. Ibañez prenas la Naturan Floron, belega bukedo el floroj, kaj prezentas ĝin al la Reĝino de la festo, kiu metas ĝin ĉe siaj piedoj: en la bukedo oni vidas grandan verdan silkrubandon sur kiu oni legas «1^a Literatura Konkurso de K. E. F.»

Sro. Grau legas tre bonstila, la jenan premiitan poezion:

LA BLINDA BOVINO

Senvole per la kap' ektuŝegante

Je unu kaj alia trunk', sencele

Iradas sur la voj' al trinkoloko

Bovino, kiu venas tute sola.

Ŝi blinda estas. Paŝtistet' per frapo

De ŝton' al ŝi tro lerte surjetita

Okulon unu ŝian difektegis,

L' alian membraneto nubekovras:

Jen blinda estas la bovin'. Ŝi venas

Al font' por trinki, kiel ŝi kutimis;

Sed ne kun firma la sinten' tiama,

Nek kun kolegoj siaj, ne: tutsola

Alpaŝas ŝi. Fratinoj ŝiaj dume
 Ĉe krutegrokoj, sur la plataltaĵoj,
 En la silent' herbeja, ĉe l' akv-bordoj,
 Sonigas pendtintilon, freŝan herbon
 Manĝante laŭ plezuro... Ŝi ja falus.
 L' akvuĵon akreterandan ektuŝegas
 Ŝi per la buŝ' kaj honte sin retiras.
 Sed ŝi revenas, sian kapon metas
 En l' arkon kaj eltrinkas malrapide.
 Ŝi trinkas sen soifo, nur malmulte.
 Kun granda tragedia gesto, poste
 Ŝi levas al ĉiel', egan, la kapon
 Kornhavan: sur senvivaj la pupiloj
 Ŝi palpebrumas kaj denove venas,
 Je lumo orfa sub brulanta suno,
 Malfirme sur la voj' neforgesebla,
 Malvigle balancante la longvoston.

Oni sciigas poste la nomojn de la ceterajn premiitajn aŭtorojn kiuj estas: De la originala temo, poezio: Sro. Josep Ventura, de Terrasa pro sia poezio «Rozoj kaj dornoj».

De la originala temo, prozaĵo: Sro. Joan Aubeyzon pro sia verko «Malkuraĝeco». De la tradukita teksto «Conformitat», el Victor Català: Sro. Estanislau Pellicer, pro sia tradukaĵo kies devizo estas, «Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras».

La premion de «Esperanta Semo», de Sabadell, gajnis pastro S. Pubill skolapiulo, pro la sekvanta traduko de la poezio «La Ratlla», el Guanyabéns kies devizo estas «Kripligo».

LA LINIO

En ebenaja mezo, freŝema, ridetanta,
 Glitigas sian akvon la Segro murmurant':
 Dum sian vojon sekvas, transiras la landlimon,
 Landlimon nenaturan, laŭ faras la vivant'.
 Nek signas ĝin montaroj, nek ĝin malamikecoj:
 Ambaŭ estas niaj, kutimoj, tradici':
 Jam sole du standardoj elmontras kelkafoje
 Patrujojn kripligitajn por formo de naci'.
 En tiuj ambaŭ flankoj, nek paŝo nin disigas:
 Nek lingv' aŭ karaktero de l' miaj ŝajnas for:
 En ambaŭ flankoj estas mi en Katalunujo:
 Lini' en landkart' estas, neniel en la kor'.

LAŬREATAJ AŬTOROJ



VICENÇ INGLADA



JOAN AUBEYZON



ALFONS SABADELL



FINO. EULARIA ROSSELL

La premion proponitan de Sro. Fred. Pujulà i Vallès gajnis la ĉarma fraŭlino Eularia Rosell pro sia versduo «Katalunlando», kiu de nun estos la devizo de K. E. F.

Sro. Alfons Sabadell, gajnis la premion proponitan de *Catalunya Nova*, de Tarragono, pro la traduko de parolado de Sro. Folch i Torres kies devizo estis «Vi frato alveninta de malproksima tero...»

La premion proponitan de Sro. Direktoro de l'«Institut de Tarragona», gajnas Sro. Estanislau Pellicer, pro la traduko de rakonto de Apeles Mestrès, sub la devizo «Ankoraŭ...»

Sro. Angel Novejarque, gajnas la premion de la «Cambra de Comerç», de Tarragona, pro sia tradukaĵo, sub la devizo «Ĉu?...».

Pastro Dro. Coll, gajnas la premion de l'«Patronat Obrer de Tarragona», pro sia verko «Frato helpita de aliaj fratoj estas forta urbo».

La laŭreataj aŭtoroj siavice iras ricevi de la belaj manoj de la

LAŬREATAJ AŬTOROJ

JOAQUIM COLL, PBRE.



ANGEL NOVEJARQUE



ESTANISLAU PELLICER



JOSEP VENTURA

reĝino la gajnitan premion. Ĉiu ricevas longajn kaj varmajn aplaŭdojn.

Fine Sro. Pujulà legas la jenan belan paroladon :

Honorinda kaj gentila Reĝina Moŝto,
 Honorindaj kaj gentilaj fraŭlinoj,
 Eminentaj aŭtoritatuloj,
 Sinjorinoj kaj sinjoroj :

Al ĉiuj mi turnas, en la de miaj kolegoj kaj en mia propra nomo, nian plej profundan kaj respektoplenan dankon por la helpo, kiun vi alportis al nia Festo de Poezio kaj Amo.

Nian dankon al vi, bela Reĝino kaj belaj Sekvantinoj, kiuj per via gracio plektas allogan kronon ĉirkaŭ la Beleco kaj Juneco kiu nin prezidas. Se per via ĉarmo kaj beleco vi plej ĝuste reprezentas ĉi tie la Poezion, per via juneco vi reprezentas la forton de la vivo, la sopiradon al noblaj superaj sentoj, la eternan renoviĝon de la ĉiam pliperfektigema naturo. Certe la Festo, kiu nin

kunvenigas hodiaŭ, lasos ĉe vi impreson, kiu trovos varman restejon en viaj koroj, kaj morgaŭ, post kelkaj jaroj, kiam vi prezidos hejmon tiel majeste kiel nun prezidas nin, vi rememoros al viaj ĉirkaŭantoj pri tiu ĉi aro da entuziasmaj homoj, kiuj al la frenezo predikadi la Lingvon Internacian aldonas la frenezon kredi je la efiko de Amo kaj ami la Belecon per ĉiuj siaj fortoj. Pekoj estas ĉi tiuj, kiujn la plimulto da homoj ne pardonas nun; sed ni tamen ne haltas nek senkuraĝiĝas, ĉar ne nur, ni ne parolas por la plej multaj sed por la plej bonaj, sed ankaŭ la plej multajn vi bonigos se vi turnas al ili vian junulinan rigardon plenan de mildeco por ili, plenan de espero por la estonta tempo.

Nian dankon al vi, eminentaj sinjoroj reprezentantoj de la Aŭtoritato kaj de la Popolo en tiu ĉi antikva urbo. Ĉestante nian Feston kaj prezidante ĝin vi sekvis la tradicion de nia lando, laŭ kiu la Aŭtoritato partoprenas en la festoj de Poezio kaj Amo, kvazaŭ dezirante firme konstati ke nur en ili troviĝas la plej bonaj reguloj por la kondukado de la homoj; sed vi certigis laŭ evidenta maniero ke laŭ via opinio, Poezio kaj Amo, Belo sin trovas en nia helpa lingvo tiel bone kaj komforte kiel en la natura. Sinjoroj, vi permesu, ke al la danko mi aldonu gratulon. La nomoj de la estroj de Tarragono pleniĝis longajn paĝojn de la Homara Historio, kaj tiu tradicio ankaŭ estos sekvita, ĉar morgaŭ, kiam la Internacia Lingvo akiros ĉie oficialan karakteron, kiam la maturaj homoj, lernintaj dum siaj junjaroj ĝin en la unuagradaj lernejoj kaj aŭdintaj ĝin en siaj luliloj mem, ne havos mokon nek ridon por ĝi kaj juĝos ĝin kiel la plej naturan kaj logikan kreitaĵon, tiam oni lernos kun miro la gravajn batalojn, kiujn fervoraj homoj devis organizadi por la atingo de ia homa interkompreniĝo, kaj oni nur laŭdojn kaj aplaŭdojn havos por tiuj, kiel vi respektindaj Moŝtoj, kiuj detenante la povon en siaj manoj havis la kuraĝon veni inter nin kaj antaŭsentis la veron kaj la justecon de nia predikado. — Sajnas kvazaŭ la premanta priokupo de la registroj de tiu ĉi urbo estis ĉiam la defendo de ĝiaj loĝantoj kontraŭ eksteraj malamikoj. Konstruis la Ciklopoj la fortegan muregon, kiun vi montras kun fiero al fremdaj kaj eksterurbaj vizitantoj. Kartaganoj, Grekoj, Romanoj, Mezepokanoj, ĉiuj rivaliĝis en la plialtigo kaj plifortigo de tiuj muregoj, — ŝtona zono, monumenta ŝirmilo, kiu estas la plej bela juvelo de la krono de via urbo. Vi ankaŭ plialtigis kaj plifortigis ilin, vi ankaŭ celis la protekton de viaj regatoj, sed nun, ĉar la malamikoj ne estas homoj, ĉar la malamikoj estas nur malespero, anima malforteco, nekonfido al la estontajo kaj morala defalemo, vi ne per ŝtonoj plialtigis la muregon sed per plej alta anima virto, vi ĉirkaŭstarigis ĉirkaŭ la urbon protektantan muregon el Espero, kaj vi metis sur la brustojn de la tarragonanoj la ŝildon de nia kvinpinta stelo je kiu ĉiu mortiga sageto de la novaj malamikoj malakriĝas kaj resaltas en terenfalantajn splitaĵojn.

Nian dankon fine al ĉiuj poetoj kaj prozistoj, kiuj volis labori por nia Festo kaj respondis al la Alvoko sendante ĉu originalajn ĉu tradukitajn verkojn. La momento de la batalo inter ili por akiri la premiojn jam estas pasinta. Ĉiu faris, kion li povis; la verkistoj per sia talento; la juĝintoj per sia honesta juĝo. La premioj estas jam disdonitaj, kaj jam por ni ne estas plu

premiitoj kaj ne premiitoj, sed aro da entuziasmaj samideanoj al kiuj ni turnas senescepte nian dankon sinceran, kaj nian gratulon.

Ni prenu ekzemplon en tiu ĉi grava festo kronita per plej granda sukceso kaj ni ĉiuj denove, fervore kaj entuziasme laboru por ke la venontaj estu tiel sukcesplenaj kaj plenaj de bono por la diskonigo de nia literaturo enlanda kaj la pliriĉigo de nia jam riĉa, fortika bela kaj admirata de ĉiuj Esperanta Literaturo.

Grandega aplaŭdado sin aŭdigis je la fino de tiu ĉi parolado, kiu kuniĝas kun la aplaŭdado dediĉita al la reĝino de la festo kaj korteganinoj forlasantaj la salonon. La festo estis sukceso, granda, unu el la plej grandaj sukcesoj de la Kongreso.

HONORA VINO

Tuj post la unua labora kunsido, la kongresanoj pasis al ĉambro de la Urbdomo kie urbestro kaj urbkonsilantoj plej ĝentile gastis ilin. Ne estis esprimebla al la kongresistoj la ĝojo kaj entuziasmo kiujn ili sentis pro la kora akcepto kiun Tarragona faris al ili.

RELIGIA DISERVO

Ĝi estis oferita de nia kunfederaciano Pastro Planas, el Barberà del Vallès, kaj estis kantita kun gregoria kanto akompanita de grava ĥoro.

La sankta katedro estis okupita de Pastro Coll, kiu predikis en esperanto pri la temo «La universala Amo en la Sankta Koro de Jesuo, kaj Esperanto kiel rimedo por ĝin akiri».

OFICIALA FESTENO

Je la 1.^a horo kaj duono de la 25^a Junio okazis la festeno per kiu la grupo «Tarragona Esperanta» regalis la aŭtoritatulojn kaj kongresanojn. Ĉirkaŭ la tablo kunsidis preskaŭ 100 gesamideanoj inter kiuj oni vidis kelkajn fraŭlinojn.

Prezidis la urbestro Sro. Cobos, kaj apud li sidis: Prezidanto de K. E. F., Dro. Bremón; Sroj. Cavallé, Vicprezidanto de la Provinca Deputitaro, kaj Pujulà i Vallès, Sekretario de la provinca gubernestro, Prezidanto de la Alta Provinca Juĝistaro, Sro. Marin; Prezidanto de «Tarragona Esperanta» kaj de la Loka Komitato, sinjoro Molas; Delegito de financoj, Sro. Carrillo de Albornoz. Ni ankaŭ

vidas Srojn. Nel-lo, Miró, Dalmau, Nin, Balcells, Garcia, Grau kaj Vallvé, urbkonsilantojn, kaj la reprezentantojn de la lokaj ĵurnaloj *La Cruz* kaj *Diario de Tarragona*.

Oni servis laŭ la jena menuo:

Diversaj almanĝaĵoj.—Makaronioj *Rossini*.—Merlango kun saŭco *mayonnaise*.—Bovido *Perigot*.—Galantino lango *Bellevue*.—Rostita kokido.—Glaciigita biskvito.—Desertoj.—Vinoj: blanka kaj ruĝa. Ĉampano. Kafo. Cigaroj kaj likvoroj.

Antaŭ la desertoj la urbestro Sro. Cobos komencas la tostadon kaj post li parolas la Sekretario de la provinca guvernestro kaj Sro. Carrillo de Albornoz: la tostoj de tiuj sinjoroj estas finataj per esperantaj vortoj kiujn la ĉeestantaro aplaŭdis kun varmo. Tostas ankaŭ Sroj. Marin, Cavallé je la nomo de la Provinca Deputataro, Molas je la nomo de la tarragonaj esperantistoj kaj Pastro Coll. Sro. Soler je la nomo de sia patro, la direktoro de la Gimnazio kaj honora prezidanto de la grupo «Tarragono Esperanta», Sro. Pujulà i Vallès kiu faras belan komparon inter la roma akvokonduko staranta proksime de Tarragono kaj la interna sento de Esperanto; Sro. Balcells je la nomo de la societo «Atracció de Forasters» (*Syndicat d'Initiative*), Sro. Nel-lo urbestra adjunkto, kaj Dro. Bremón Masgrau, Prezidanto de K. E. F., kiu fermas la tostojn salutante Tarragonon kaj ĝiajn aŭtoritatajn moŝtojn, kaj petante aplaŭdon por Sro. Molas, Prezidanto de la Loka Komitato, kiu faris ke nia Kongreso estas tiel grave sukcesinta. Ĉiujn tostojn oni akceptis per longa aplaŭdado.

Laŭ propono de Sro. Pujulà oni sendas dokumenton subskribitan de ĉiuj ĉeestantoj, al Dro. Zamenhof, lin salutante plej kore dum la II^a Kataluna Kongreso.

Fine la kunmanĝintoj kantis starante la himnon «La Esperon» kun granda entuziasmo kaj la krioj «Vivu Esperanto» kaj «Vivu la Majstro» finas la festenon.

KONCERTO

En la ĉarma teatro de la «Patronato del Obrero» okazis la anoncita koncerto de la «Orfeo Tarragoni».

Granda nombro da gesamideanoj kaj ankaŭ da neesperantistoj tute plenigis la teatron. Oni vidis tie sinjorojn Pujulà, Bremón, Molas kaj aliajn amikojn estimatajn.

Sub lerta direktado de Profesoro Josep Gois, komencis la kantado: oni kantis ĝuste kaj bele, dum la unua parto la jenajn muzikaĵojn:

Himne a la Senyera (Gols), *La Pastoreta* (Candi), *La Verema* (Lassus), *Primavera Eterna* (Morera), *La najtingalo* (Mas Serracant), *Somni de Primavera* (Mendelssohn) kaj *Aucellada* (Jannequin).—El tiuj, meritis grandegan aplaudadon, kaj pro tio oni ilin devis kanti denove, *La najtingalo* (esperante kantita) kaj *Aucellada*.

Kaj nun la ĉeestantaro sin dediĉas al la babilado, ĉar l'«Orfeó» ripozas dum kelkaj momentoj. — Ni havis la plezuron interparoladi kun la fraŭlinoj de la «Orfeó Tarragoní» kiuj vere sin montris tre afablaj kaj nin sciigis gracie pri la nomo de tiu fraŭlino kantinta la solparton de *La najtingalo*: Rosalia Borrás en esperanto, tre ĝuste kantis tian parton.

Kaj komencis la dua parto kiu ja estis tre interesa. *Sola l'Olm* estis majeste kantita: *La Barcarola* (Gols) ankaŭ ĝustege kantita, sed tiu, kiu, funden eniris en ĉies senton, kiel senfine ŝprucanta akvo eniras en la sekegan kamparon estis la senerare kantita «*Oh quin bon eco*» (Lassus) kiun alifoje oni devis kanti.

Fine oni kantis *La Esperon* kaj ni ĉiu starante kaj solene akompanis la kantadon de l'Orfeó.

Resume: multe da entuziasmo, da arto, kaj la beleco de la fraŭlinoj de l'«Orfeó Tarragoní» superis ĉion.

BALO

Elirinte de la koncerto la kongresanoj sin direktis al «Teatre Príncipal» kie la esperantistoj tarragonanoj komplezis ilin per balo. La teatro estis plena de belaj kaj ĉarmaj fraŭlinoj kiuj vere allogis la ĉeestantojn. Dum la dancado oni dancis «*La Rondon*» kaj ĉiuj estis tre kontentigitaj de tiu agrabla festo kiu finiĝis la unuajn horojn matene.

FINO

Jen karaj kunfederacianoj, ĉion kio okazis en Tarragona; ni klopodis por doni al vi iomete da ideo pri nia ĝojo en la kunsidoj, pri la sukceso en niaj festoj, pri la entuziasmo de la esperantistoj, kaj de la neesperantistoj kiuj sin sentis tute allogitaj de ni, kaj ankaŭ, por ke ĉiuj kiuj parolis malbone pri nia organizaĵo vidu, ke ni ne estas tiel kiel ili pensis, kaj ke, se virina plumo skribis por ni *Maro estas gularo* ĉiuj ni, Katalunaj esperantistoj, estas devigitaj ke tiu devizo estu realaĵo en niaj vicoj.

Amikoj! Kamaradoj! Vivu nia III^a en Vic!!!



KONSTANTA KOMITATO DE LA KONGRESOJ

LAŭ la peto de Dro. Zamenhof, tiu ĉi propono estis prezentita al la anoj de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, kaj principe aprobita de ili. Sekve, oni preparos elektadon de delegitoj, laŭ la maniero montrita de la projekto, kaj tiuj delegitoj povos, kredeble, diskuti kaj voĉdoni, en la Sepa Kongreso, pri la tuta afero.

Propono de Dro. Zamenhof pri la organizo de niaj Kongresoj

Internacia esperantista kongreso estas antaŭ ĉio festo de la esperantismo kaj propaganda manifestado. Sed krom tio ĝi havas (aŭ almenaŭ devus havi) ankoraŭ alian tre gravan rolon: diskuti kaj decidi pri tiuj demandoj, kiuj koncernas nian tutan aferon kaj ne povas esti solvataj de apartaj personoj, societoj aŭ institucioj esperantistaj.

Ĉiu esperantisto estas homo libera, kaj neniu havas la *devon* partopreni en ia komuna esperantista entrepreno; sed la plimulto de la esperantistoj havas la *deziron* tion fari, ĉar ili konscias tre bone, ke Esperanto prosperos nur tiam, kiam ni laboros kune; tial apartaj personoj kuniĝas en grupojn kaj societojn, kaj la grupoj kaj societoj devas interkomunikiĝi, por preparoli kaj aranĝi entreprenojn komunajn. Tiel longe, kiel ni tion ni havos, ni ĉiam estos tute senfortaj, ĉar ĉiufoje, kiam aperos la neceso fari ian laboron komunan, troviĝos neniam plenumantoj; ĉiu aparta persono aŭ societo diros: «mi estas tro malforta aŭ ne sufiĉe aŭtoritata», aŭ: «mi ne volas labori sola por la tuta esperantistaro, ĉar eble oni povus rekompenci min nur per atakado aŭ nekomprene de miaj bonaj intencoj». Se ni ne volas esti tute senfortaj, la esperantistaj grupoj kaj societoj devas en orda maniero, per rajtigataj delegitoj, periode preparoli kaj aranĝi ĉiujn necesajn komunajn entreprenojn. La plej bonan rimedon por tio prezentas niaj internaciaj kongresoj.

Ĉar ĉiu esperantisto estas homo libera, neniu havas ankaŭ la devon alkonformiĝi sin al la volo kaj opinio de ĉiuj aliaj esperantistoj (se li nur ne ŝanĝas la lingvon laŭ sia bontrovo kaj ne perdas per tio la rajton sin nomi esperantisto), sed la plimulto de la esperantistoj havas la *deziron* alkonformiĝi sin al la volo kaj opinio de ĉiuj aliaj, ĉar ili konscias tre bone, ke nia afero postulas antaŭ ĉio plenan unuecon kaj Esperanto progresos nur tiam, kiam siajn pro-

prajn kapricojn, dezirojn aŭ opiniojn ĉiu esperantisto submetos al la deziro kaj opinio de la plimulto. Tial estas necese, ke pri ĉiu aperanta demando ni havu la eblon scii la veran opinion de la plimulto. Tiel longe, kiel ni tion ne havos, al ni ĉiam minacos anarĥio, ĉiam troviĝos personoj, kiuj diros, ke nur ilia opinio estas la opinio de la plimulto kaj ke ĉia alia opinio estas nur maljusta altrudo aŭ provo de regado. Se ni deziras, ke la Esperantistoj laboru en plena unueco, ni devas, de tempo al tempo, en orda maniero, ankaŭ per rajtigitaj delegitoj, esplori kaj publike klarigi pri diversaj aperantaj demandoj la deziron kaj opinion de la plimulto, kaj por tio ankaŭ la plej bonan rimedon prezentas niaj internaciaj kongresoj.

Bedaŭrinde ĝis nun niaj kongresoj ne povis plenumi sian agadon rolon, ĉar ili ne estis organizitaj kaj ne havis la eblon aranĝi aŭtoritatan voĉdonadon. Ni povis decidi nur pri demandoj plej malgravaj, kiujn oni povis solvi per aklamoj; pri ĉio pli grava, pri kio la opinioj ne estis egalaj, ni nenion povis decidi, ĉar niaj decidoj, faritaj ne de orde elektitaj delegitoj, havus nenian valoron en la okuloj de la Esperantistoj.

Por meti finon al tiu stato kaj doni al niaj kongresoj la eblon labori kun klaraj rezultatoj, mi proponas, ke oni enportu la malsupre donitan aldonon en la regularon de niaj kongresoj.

Ĉar ni ne havas ankoraŭ ian aŭtoritatan institucion, kiu povus pli rajte decidi pri mia propono, tial mi prezentas mian proponon al la Konstanta Komitato de la Kongresoj. Se ĝi aprobas mian proponon, tiam mi petas, ke ĝi publikigu sian decidon kiel eble plej baldaŭ en la *Oficiala Gazeto*, por ke al la Antverpena Kongreso ĉiuj esperantistoj povu jam prepariĝi laŭ la nova ordo.

L.-L. ZAMENHOF

Aldono al la Regularo de la Universalaj Kongresoj de Esperanto

1. — Ĉiu decido de Internacia Esperantista Kongreso estas deviga nur por la komunaj Esperantistaj Institucioj *oficialaj*, tio estas por tiuj, kiuj estas kreitaj kaj subtenataj de la tuta Esperantistaro. Por la Esperantistoj *privataj* ĝi havas valoron nur moralan, montrante al ili la deziron aŭ opinion de la plimulto.

2. — Partopreni en la Kongreso kaj en ĝiaj diskutoj havas la rajton ĉiu, kiu pagis la kotizon kaj submetiĝas al la kongresa Regu-

laro; sed rajton de voĉdonado havas nur la regule elektitaj delegitoj de Esperantistaj grupoj aŭ societoj.

3. — Kiel delegito estas rigardata ĉiu persono, kiu prezentas al la Kongresa Komitato rajtigan leteron. kiun, en la nomo de la grupo aŭ societo, subskribis ĝia prezidanto kaj ne malpli ol 25 membroj.

4. — Grandaj grupoj aŭ societoj povas elekti po unu delegito por ĉiuj 25 membroj majgrandaj grupoj aŭ izolitaj esperantistoj povas, por elekto de delegito, kuniĝi kun aliaj grupoj. Sed neniu havas la rajton doni sian subskribon pli ol por unu elekto.

5. — Ĉiu grupo povas elekti siajn delegitojn aŭ inter siaj propraj membroj, aŭ inter aliaj Esperantistoj kiuj partoprenos en la Kongreso. Ĉiu delegito havas tiom da voĉoj, kiomfoje po 25 anoj havas la grupoj aŭ societoj, kiujn li reprezentas.

6. — La tagordon de la Kongreso fiksas la Prezidanto de la Kons-tanta Kongresa Komitato post interkonsiliĝo kun la aliaj anoj de tiu Komitato, kaj li publikigas ĝin du monatojn antaŭ la Kongreso en la *Oficiala Gazeto*, por ke ĉiuj societoj kaj grupoj havu la eblon es-primi al siaj delegitoj sian opinion pri la diskutotaj demandoj.

Se ia propono ne estas akceptita en la tagordon, ĝia aŭtoro havas la rajton disdoni ĝin dum la Kongreso al la delegitoj de la Kongreso, kaj se ne malpli ol 20 delegitoj subskribas ĝin kiel diskutindan, la Kongresa Komitato devas enporti ĝin en la tagordon.

7. — Ĉi tiu projekto estas nur provizora. En la Antverpena Kon-greso la rajtigataj delegitoj diskutos kaj voĉdonos pri ĉiu paragrafo aparte kaj faros en la projekto ĉiujn ŝanĝojn, kiuj montriĝos utilaj.



LA VIRINO KAJ ESPERANTO

Katalune verkis, J. ALTURA PUJADA.

EN la hodiaŭa festo, festo de vivo, de amo, de beleco kaj de Es-peranto, permesu al mi geamikoj paroli al vi mallonge pri la virino; al mi permesu transdoni al vi iun el miaj vizioj, kiu en mo-mento de spiritaltigo, eliĝis sen ia nebuleto, sen ia nigra makulo; sed tute plena kaj penetrita de diafaneco kaj travidebleco.

Mia spirito, kiu eterne dubas, kiu senĉese luliĝas meze de la nigraj

kaj akraj ondoj de la elreviĝoj; kiu en ĝia cirkaŭo nur vidas fleksiĝi la senfortiĝantan melankolion, kiam ĝi aŭdas la vorton *Esperanto*, kiam ĝi aŭdas la vorton *virino*, kiam ĝi pensas pri la enkorpiĝo de tiuj-ĉi du sublimaj vortoj, ĝi restas ravita, kredas al la morgaŭo kaj havas *Esperon*.

Al ni, kiuj volas la virinon liberigitan de la jugo sub kiu la homoj ŝin submetis; ni kiuj volas ŝin, ne kiel hibridan plantaĵon de nuancoj kaj formoj belaj, kvankam sen aromo nek vivo, sed plena da fruktodona semo; ni kiuj juĝas ŝin kiel la floron plej ĉarmegan de la Naturo; ni kiuj proklamis ŝin simbolo de beleco; ni kiuj ŝin alvokas en ĉiuj momentoj kaj je niaj preĝadoj al amo kaj al vivo; ni kiuj juĝas ŝin ne superebla kiel la giganta figuro de la patrino amo; ni volas ŝin por *Esperanto*.

¡Esperanto! Harmonia kaj varmoplena vorto, kiu devas vin allogi virinoj, ravaj sed delikataj estaĵoj.

¿Kiuj el vi ne havas unu *Esperon*? ¿Kiu el vi elektitaj floroj ankoraŭ ne florintaj, ne esperas ĝojegan morgaŭon? Ĉiuj! Ĉiuj blankaj animoj kredas al tiu nekonita, sed atendita, feliĉa morgaŭo! Kaj kelkafoje, ankaŭ ni, la skeptikuloj, la amantoj de la soleco, ankaŭ kredas al ĝi. Mi volas ĝin kredi, sed antaŭe mi devas vin rigardi kaj eltrovi en vi, iom pli ol vian plastikan belecon, ol vian beltalion, ol vian ĝentilecon; mi devas eltrovi ankaŭ en vi, subtilan animon soifantan pri la tuta perfekteco por kiu vi estas destinitaj.

Esperanto, agado de paco kaj amo, liveras al vi preferan lokon en ĝiaj vicoj kaj al vi malfermas la noblegan vojon de tiu perfekteco, kiu grandigos kaj farigos de vi reĝinojn de la vivado. Sen vi, la tasko fratigi la homojn estos senutila; ĉar ĉiuj vi estas, kiuj scias teksti la katenojn per kiuj kapti la homon al la amo, metante en ĉiu girlando el blankaj rozoj, iridoj kaj ĵasmenoj, rondon da kisadoj por ke ĝi neniam rompiĝu.

Estas Esperanto ago de hieraŭ, de hodiaŭ, sed kiu atendas *morgaŭon* kaj, kiu pli bone ol vi povas al ĝi doni ĉi tiun morgaŭon, se vi estas la vera morgaŭo, se vi estas la tuta vivo?

Vi amu Esperanton kaj igu ĝin amata de ĉiuj; proprigu ĝin al vi kaj ĝi estos al ĉiuj; grandigu ĝin kaj vi grandigos, foriru el tiu *malnova vivado* kiu timigas vin kaj malgrandigas vian grandecon, por eniri en la novan vivon, plena de lumo, de amo kaj de beleco!

Vi, kiuj enhavas la tutan amon, prenu sur vin la bonan novaĵon — Esperanto — kaj signu ĝin per kiso varmega, pura, ĉasta, senmakula kaj la venko estos kun ĝi. Ĝi atendas momenton por edziĝi je vi, kaj dum ni atendas la ĉarman frukton, lasu al ni havi fidon en

ĝi, en vi, kaj lasu ke momente sentante nin viziemojn, en nia penso, ni starigu sur la supraĵo de virga monto, altegan monumenton al Esperanto, kronitan per la superega beleco: la virino flagrante la verdan standardon kaj surportante meze de la ebura frunto, la unuigan laĉon; la markon de amo, simboligitan per nia kvinpinta verda stelo.

Tradukis: J. GARRIGA



LA AMIKECO

AL AMIKO PLEJ KARA F. SURROCA

EN la unuaj tempoj de la Homaro, antaŭ multaj centjaroj-okazis ke fraŭlineto blonda kiel la orkoloraj spikoj de la greno, de okuloj blukoloraj kiel la ĉielarko, blanka kiel la ŝaŭmo de kristalakvo, plendis maldolĉe sidinte sur la humilaj herbetoj, dum falis de siaj okuloj, belegaj-perloj, kiujn la nevidebla Anĝelo de la Doloro rikoltis silente... Ĉe tio pasis preter ŝi, alia fraŭlino, ankaŭ juna kaj bela, kiu portis presitajn en siaj okuloj kaj en tuta sia estaĵo la klarajn signojn de la gajeco.

Ambaŭ estis reciproke nekonintaj sin, sed la lasta aŭdante la doloresprimon de tiu, kiu ploris tiel senkonsole, haltigis sian malpezan kaj ĉarman paŝon, kaj per dolĉa voĉo, diris al ŝi kelkajn vortojn. Poste ŝi sidiĝis flanke kaj komencis interparoladon ameman, karesan; sen alia aŭdantaro ol la birdoj, kiuj haltigis siajn kantaĵojn por aŭdi ĝin, kaj ol la humilaj bestetoj, kiuj lasis siajn aferojn ankaŭ por ĝin aŭskulti. La interparola amuziĝo daŭris dolĉe, kaj mallaŭte kiel virgulinekgemo. Oni aŭdis nur delikatan brueton de kisoj. Fine, leviĝis unu post la alia, kaj reciproke cirkaŭprenante sian talion foriris malrapide ĉiam parolante, parolante dolĉege, milde...

Interne, la gajulino estis ankaŭ pli gaja, sed oni vidis sur sia vizaĝo vualon de malgajeco. Ankaŭ la malgajulino estis sufiĉe dolora, sed la perloj en siaj okuloj jam ne estis senesperaj larmoj, ĉar ili estis kiel la gutetoj falantaj de la arboj, kiam post pluvo, la akvo

glitas trankvile, dum la suno brilas en la ĉielo, denove blua, denove hela...

Tiun tagon, naskiĝis la amikeco, la dolĉa amikeco: tiu ĉi sento neesprimebla, tiu ĉi ligilo nevidebla kiu uniigas la sentemojn de frataj animoj. Per tiu inklino, per tiu simpatio, ni ploras kune kun la ploranto, kaj ankaŭ ĝojas kune kun la ridanto, kaj ĝi donas al ni parolojn por dolĉigi la dolorojn de la suferantoj, talenton por montri la vojon al la erarinto, abnegacion por pardoni al kiu nin ofendas.

Ho sankta! ho dolĉa amikeco! Benon al ĝi!

JOSEFO CASALS DURÁN



ALILANDA MOVADO

AUSTRALIA

Melbourne. — S'ha fundat en aquesta població una societat que compta actualment amb un centenar de socis, els quals, junt amb els del grup «Majo», se reuneixen setmanalment en una gran sala situada en el centre de la població i llogada a l'efecte. Sembla que s' disposen a emprendre una ferma campanya per tot el país.

EGIPTE

Cairo. — S'acaba de fundar l'«Egipta Esperanta Asocio», la qual, junt amb el Sr. Jacques Guéron, mestre del col·legi «Alliance Israelita», autor dels llibres turc-esperanto, estan portant a cap l'obra de esperantitzar tots els pobles de llengua turca.

AUSTRIA

Lwów (Galitzia). — Quasi es segur que 'l VIII^a Congrès Internacional, en 1912, tindrà lloc a la població de Krakov, motiu pel qual els esperantistes d'aquells països s'han posat a treballar de ferm, avent començat ja a organitzar-se seriosament.

Una de les primeres manifestacions que portaran a cap es la organització d'una gran Exposició Esperantista, an el qual fi demanen l'ajuda de totes les entitats i de tots els particulars que lluiten per a la nostra idea.

ITALIA

Genova. — D'uns mesos an aquesta part la propaganda s'ha intensificat de tal manera, que 'l Congrés que acaba de celebrar-se en aquesta ciutat ha sigut un exit complet per a la nostra llengua.

L'edició que s'ha fet en llengua italiana, del *Follet Roig*, arriba a 350,000 exemplars; quantitat més expressiva, per ella sola, que tot allò que nosaltres poguessim dir.

POLONIA

Kielce. — A l'escola de dones d'aquesta població, hi dona un curs d'Esperanto 'l metge militar Dr. Martí Steckiewicz.

Aquest senyor acaba de realitzar un viatge per Espanya i França, durant el qual ha donat conferències públiques en Esperanto a València i a París.

ESTATS UNITS

Després del VI.^e Congrés Internacional, que tingué lloc, l'any passat, a Washington, s'ha escampat de tal manera per tot el país l'Esperanto, que, com aquell qui diu a diari, estan fundant-s'hi societats per a la seva propagació.

Ultimament s'hi han fundat les d'Austin, Raleigh, Lancaster, Decorah i Chicago.

RUSSIA

Tomsk (Siberia). — A la ciutat d'Omsk ha tingut lloc una Exposició d'Indústria i Comers, en la qual, a petició dels esperantistes de la Sibèria occidental, va instal·lar-se una secció esperantista, on se venien llibres, follets, insignies, etc., etc.

Moscou. — Durant les passades festes de Pasqua havia de tenir lloc la celebració del Congrés Esperantista Rus; però no quedant prou temps material per a la seva organització, s'ha acordat ajornar-lo per a les mateixes festes de 1912.

Sant Petersburg. — El 13 d'Abril la «Ruslanda Ligo Esperantista» celebrà la seva reunió anual, i, segons la relació del president, Sr. Postuikov, compta actualment amb 30 societats aderides, escampades per diferents endrets del país.

BELGICA

Anvers. — S'ha publicat ja 'l programa provisional del VII.^e Congrés Internacional, el qual es com segueix:

Divendres 18 d'Agost. — Obertura de les oficines per als congressistes.

Dissable 19. Obertura de l'Exposició. Recepció del Dr. Zamenhof a l'Ajuntament. Concert per la «Vagabonda Kluvo».

Diumenge 20. Festes religioses per a catòlics i anglicans. Manifestació dels congressistes. Concert en el Jardí Zoològic. Representació teatral de *Devo de Reĝo, Por trakuwilaj personoj* i *La Revuo de la Sepa*.

Dilluns 21. Obertura oficial del Congrés. Audició de cants regionals.

Dimars 22. Representació de *Kaatje*.

Dimecres 23. Segona representació de *Kaatje*. Recepció dels metges esperantistes en el «Cercle Médical».

Dijous 24. Repartició de premis del Concurs Literari. Concert en el Jardí Zoològic i recepcions particulars.

Divendres 25. Gran Ball internacional.

Dissable 26. Tancament del Congrés i Gran banquet.

Diumenge 27. Festes religioses. Maniobres de la Creu Roja i Concert en el Jardí Zoològic.

Segons el número de Juny de *Belga Esperantisto*, els congressistes alcançen ja la xifra de 888.



OFICIALA PARTO

Amb motiu de la mort del nostre director i amic caríssim, en Domènec Serdà Simó, s'han rebut una infinitat de cartes i postals de sentit condol; i, en l'impossibilitat de contestar-les totes d'una a una, vagin aquestes ratlles com a mercès i agraïment per les mostres de simpatia rebudes envers el finat.

Com auran pogut veure 'ls nostres llegidors, el nou Comité pera 1911-12 ha quedat compost dels Srs. Dr. Bremon, *president*; Josep Planas, *presbitero*, *viç-president*; Estanislau Pellicer, *secretari*; Joan Piferrer, *caixer-administrador*; i Josep Palmarola, *vocal*.

Dits senyors donen les més corals mercès a tots els que tingueren a bé nombrar-los, confiant que la llur bona voluntat els deixarà sortir bé de les tasques que 'ls han sigut confiades.

Aquesta Administració prega a tots els senyors federats que així que tinguin coneixement de la sortida del K. E., si no l'han rebut, facin el favor de reclamar-lo a les respectives administracions de correus, puix repetidament

vénen queixes de no arribar a lloc exemplars que l'Administració té la seguretat d'haver enviat.

En el cas que algú deixi de rebre-l, remeti-s una postal a l'Administració de K. E. fent la reclamació; i així, sabent qui són els que no l'han rebut, podrem fer les oportunes reclamacions a Correus.

Pesant sobre l'Administració un munt de treball bastant feixuc, se prega a tots els senyors que creguin convenient dirigir-s'hi per a alguns assumptes, que, si no es cosa d'urgència, tinguin la bondat d'esperar les respostes que mensualment aniran sortint a la secció de *Korespondado* de K. E.; puix es una grossa feina l'haver de contestar nn per un tots els assumptes que fan referència a Administració i Direcció de la Federació i son orgue.

Tots els senyors que desitgin adquirir exemplars d'aquest número, quedaran complaguts tot seguit enviant a l'Administració 50 centims en sagells de correu per cada exemplar que demanin.

La nova Direcció de K. E. prega a tots els senyors delegats i secretaris de grups que abans del 20 de cada mes tinguin cura d'enviar la ressenya del moviment esperantista de llur localitat, a fi de poder organitzar bé la secció d'*Enlanda Movado*, puix es d'imprescindible conveniència que dita secció surti lo més completa possible.



BIBLIOGRAFIO

Ni nur raportos pri verkoj duope senditaj al la Redakcio.

Ostlorn, vilaĝaj skizoj de S. Ulfers, el holanda lingvo tradukis M. J. Wessel. Prezo 1'65 sm. ĉe la firmo D. Van Lijn & Zoon Rotterdam.

Vere estas libro kiu ornamas la esperantan literaturon, ne nur pro la materiala vidpunkto, ĉar la libro estas eldonita luksege.

Tra la legado de la dek popolarakontoj enhavitaj en ĝi, ni vidas ke la aŭtoro realigas autaaŭ niaj okuloj la naturon, la homojn, la bestojn, tre maj-

tre, kaj ni dankas la aŭtoron por la horoj ĝuitaj dum la legado, legado kiun ni rekomendas al ĉiuj veraj literaturamantoj.

Suferado de Verter, de Goethe, unua libro, unua parto; ricevebla per Eldonejo Esperanto, Aŭgustenstr. 17 y pr. Leipzig. Germanujo. Prezo 0'10 sm.

Ankaŭ ni esperantistoj estas ĝojaj por legi tiun kortuŝantan rakonton tre bone esperantigitan de nekonata esperantisto, fakto kiun ni bedaŭras, ĉar ni ĉiam estas pretaj por laŭdi se estas laŭdinda la afero, kaj agi kontraŭe se la afero estas kritikebla laŭ la bona senco de la vorto kaj nun ni ne scias al kiu ŝuldas la laŭdojn.

Ondino, de Frideriko Barono de la Motte Fouqué el la germana originalo tradukis K. Myslik. Prezo 0'50 sm.

Dankojn Pastro Myslik por via traduko de la ĉarma rakonto «Ondino» tiu rava juvelo en la trezoro de la germana literaturo.

Aline, svisa rakonto de C. F. Ramuz, tradukita de Sro. René de Saussure. Prezo 1 sm. ĉe Universala Esperantia Librejo. Ĝenevo.

Sro. de Saussure faris belan tradukon de tiu svisa rakonto, kaj pruvas la literaturbonguston de la tradukinto elektante por konigi al esperantistaro tiun belan verkon, kiun kiam oni ekkomencas legi, ĝi allogas ĝis la fino, pro la flueco de la dialogo kaj ankaŭ pro la beleco de la afero.

Kongresa Parolado, de Dro. Zamenhof en Washington. W^o 1^a de la 0'10 sm. Biblioteko Esperantista. Esperanto Propaganda Instituto. Leipzig.

Tre bone konata tiu majstrapeco, ni nur devas aldoni ke ĝi nun estas bele prezentita per eleganta bruŝureto.

Libro de kantoj, de Heinrich Heine, N^o 3^a de la Biblioteko Esperantista, 0'10 sm:

Ni malfermas tiun malgrandan broŝuron, kaj ekkomencas legi «Junecaj Suferoj» kaj ĝis «La Reveno» — kiu estas la lasta kanto el la libro — ni traviras la ĝojajn kaj dolorajn kiujn la fama germana poeto lasis en sia poemaro.

Tre bele prezentita kiel la antaŭa, ĝi estas rekomendinda al ĉiuj kiuj ne konas la belajn poemojn de Heine:

Esperantista Kantaro, 17 liedoj originalaj aŭ esperantigitaj, aranĝita de Karl Jost. Prezo : 0'40 sm. ĉe Universalso Esperantia Librejo. Geneve.

Tiu dua eldono estas pli bone aranĝita ol la unua, ĉar ne nur la preseraroj estas korektitaj, sed ankaŭ la muziko estas nun pli korekta.

Saluto al Belgujo, poezio de H. Menalda, kaj muziko de F. de Ménéil. Eldonejo «Espero» Hago.

Demandaro pri la Historio, Literaturo kaj Organizaĵoj de Esperanto, por Esperantaj Ekzamenoj de R. de Ladevéze, Friedrich Ader, Esperanto-Verlag, Dresden. Prezo ne montrita.

Bonega libro por niaj esperantaj ekzamenoj, ĉar ni opinias kiel la aŭtoro, ke la esperantistoj ne nur devas koni la lingvon profunde, sed ankaŭ estas necese koni niajn organizaĵojn historion de la lingvo, la ideon de lingvo internacia, nian gazetaron, Instituciojn, k. t. p., k. t. p.

Nenia libro pli taŭgonta ol tiu por solvi la problemon, kiu sin prezentas al esperantisto deziranta koni la ĉefajn vidpunktojn de nia movado, ĉar li estas devigata tralegi, librojn, ĵurnalojn, broŝurojn, kaj pasigi horojn legante. Do, tiu problemo estas solvita de Sro. R. de Ladevéze, tre lerte, ĉar post la legado de la 80 paĝoj, sen ia dubo la leganto konos sufiĉe niajn entreprenojn kaj la disvastigon de nia lingvo.

Internacia Higiena Ekspozicio. Dresden, Majo-Oktobro. 1911^a.

Deskriptiva broŝuro de tiu grava ekspozicio, kiu nun havas lokon en Dresden.

Ravena, gvillibro de tiu urbo, por A. Tellini. Tiu broŝuro estis eldonita por ĝin donaci al la membroj de la IV Internacia Kongreso de Filozofio. (Bologna, 6-11 de Aprilo 1911^a).

Lübeck, gvidlibreto tra la Libera kaj Hanso-urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, tradukita de la Lubeka Esperanto Societo kaj eldonita de la Unuiĝo por fremduloj. Prezo : 0'200 sm.

Gvidfolio tra Dresden, eldonita de la tiea gastotablo sub la aŭspicoj de U. E. A.

Vichy Gvidlibreto, publikigita sub la aŭspicoj de la Fama Kompanio de «Vichy-Etat».

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONO-HISpanUJO

A VIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezone la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendadas.

NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO »

ENHAVO : Parolado de Dro. L. L. Zamenhof. — Kongresa Raporto. — La Timema Vilaĝanino. — La Najtingalo. — Enlanda Movado. — Oficiala Parto. — Bibliografio.

PAROLADO DE DRO. L. L. ZAMENHOF

ĈE LA MALFERMO DE LA SEPA KONGRESO ESPERANTISTA

KIEL tradicia malfermanto de la kongresoj esperantistaj, mi permesas al mi esprimi en la nomo de ĉiuj kongresanoj nian respektan kaj sinceran dankon al lia reĝa moŝto la reĝo Alberto por la granda honoro, kiun li faris al nia afero, prenante sur sin la protektantecon super nia kongreso. Mi esperas, ke mi esprimos la deziron de ĉiuj kongresanoj, se mi proponos, ke ni sendu telegrafe nian diversgentan saluton al la regnestro de la lando, kies gastoj ni estas, kaj nian dankon al nia alta protektanto. Mi esprimas ankaŭ en la nomo de la kongresanoj nian koran dankon al la urbeŝtaro de Antverpeno, kiu afable donis al ni sian helpon kaj moralan apogon. Fine mi esprimas nian koran fratan dankon al tiuj niaj belgaj samideanoj, kiuj tiel laboreme kaj zorge pretigis nian grandan feston.

Mi uzas ankaŭ la okazon de nia festo, por revoki en vian memoron la nomon de unu viro, kiu havas grandegajn meritojn en nia afero. La prelato JOHANN MARTIN SCHLEYER, kies nomon ĉiu el vi konas tre bone, la aŭtoro de Volapük, antaŭ nelonge festis la okdek-

jaran datrevenon de sia naskiĝo, kaj estus nepardoninde, se ni ne uzus la okazon de nia nuna ĝenerala kuneestado por esprimi al li tiujn sentojn, kiujn ni ĉiuj havas por li. Li estas la vera patro de la tuta internacilingva movado. Antaŭ li oni ankaŭ revis pri lingvo internacia, oni provis labori por ĝi; sed tio estis nur teoriaj skizoj, palaj senkorpaj fantomoj en la regiono de revoj. Li estis la unua, kiu diris al si: por lingvo internacia mi volas ne revii, sed *labori*; dum ĉio ĉirkaŭe dormis, li estis la unua, kiu praktike kreis la internacilingvan *movadon*. Volapük ne estis venkita de Esperanto, kiel multaj personoj pensas tute erare; ĝi pereis *per si mem* en tiu tempo, kiam la trankvile kaj senartifike laboranta Esperanto estis ankoraŭ tro malforta, por iun venki; ĝi pereis ne pro sia stranga sonado aŭ pro aliaj similaj kaŭzoj, ĉar al ĉio oni povas alkiuti, kaj kio hieraŭ ŝajnis sovaĝa, tio morgaŭ aperas kiel io tute natura kaj bela; per longa kaj multespeca uzado eĉ la plej sovaĝa idiomo de la plej barbara gento iom post iom fariĝas riĉa, eleganta kaj oportuna lingvo.

Volapük pereis ĉefe pro *unu* grava eraro, kiun ĝi bedaŭrinde enhavis: *absoluta manko de natura evoluipovo*; kun ĉiu nova vorto aŭ formo la lingvo devis konstante dependi de la decidoj de unu persono aŭ de facile inter si malpaconta personaro. Kiel sur bastono plantita en teron, novaj branĉoj kaj folioj ne povis nature kreski sur ĝi, sed devis esti konstante skulptataj kaj algluataj. Se ne ekzistus *tiu* eraro, kiun korekti oni bedaŭrinde ne povis, Volapük neniam pereus kaj ni ĉiuj nun verŝajne parolus volapüke. Sed tiu bedaŭrinda eraro, kiun kaŭzis ne manko de talento kaj de laboremece, sed nur tro rapida publikigo de la lingvo, sen sufiĉe matura elprovado, — tiu eraro, kiu pereigis Volapükon, neniel malgrandigas la meritojn de ĝia aŭtoro, kiu la unua potence skuis la mondon por nia ideo; la grandaj meritoj de Schleyer en la internacilingva historio neniam malaperos.

Mi proponas al vi, ke okaze de la festo de Schleyer ni telegrafe sendu al li en la nomo de la tuta esperantistaro nian koran gratulon, nian dankon por lia granda laboro kaj nian deziron, ke li vivu ankoraŭ longe kaj havu la konscion, ke la fruktoj de lia laboro neniam pereos.

Karaj amikoj! Mi staras hodiaŭ antaŭ vi ne esperinte. Ĉar dum la lasta tempo la stato de mia sano estis tro malbona, mi decidis ne veturi al la kongreso en ĉi tiu jaro. Tamen en la lasta momento mi devis ŝanĝi mian decidon, ĉar mi rimarkis, ke la projekto, kiun mi prezentis por diskutado dum la sepa kongreso, ne de ĉiuj estas ĝuste komprenita kaj eble bezonas klarigojn de mia flanko. Tial ne miru,

ke mi ne prepariĝis paroli antaŭ vi pri ia speciala temo, sed mi tuŝos nur per nemultaj vortoj tiun demandon, kies pridiskutadon dum la kongreso mi proponis al vi. Mi ne antaŭvenos vian decidon por aŭ kontraŭ la diskutota projekto, mi volas nur diri kelkajn ĝeneralajn vortojn, por instigi vin bone kaj senpartie prepariĝi por la venontaj diskutoj.

Ekzistas en nia afero demandoj, kiuj povas esti solvataj ne de iu aparta persono, ne de iu aparta nacia asocio, ne de iu aparta institucio, sed nur de la tuta esperantistaro; ekzemple la demandoj pri nia Lingva Komitato, Konstanta Kongresa Komitato, k. t. p. Se iu volas fari simple konsilajn proponojn pri la interna agado de tiuj institucioj, li povas prezenti siajn proponojn al la estroj de la diritaj institucioj; sed se oni faras plendojn, se oni postulas reorganizon, anstataŭigon aŭ eĉ forigon de tiuj institucioj, — tiam al kiu oni devas sin turni? Aŭ se aperas iaj demandoj, kiuj koncernas la tutan esperantistaron, sed apartenas nek al la Lingva Komitato, nek al la Komitato de la Kongresoj, — tiam kiu havas la rajton ilin solvi? En sia privata esperantista vivo ĉiu persono aŭ grupo aŭ asocio estas kompreneble tute liberaj kaj povas agi, kiel ili volas kaj povoscias; sed pri ĉiuj demandoj, duboj aŭ entreprenoj, kiuj koncernas la tutan esperantan aferon, estas nepre necese, ke ni havu la eblon ĉiam scii la veran opinion aŭ deziron de la tuta esperantistaro. Esperanto ne estas ankoraŭ en tia feliĉa stato, ke ĉiu povu nur tiri el ĝi profiton, ne zorgante pri la bonstato de la afero mem: ni devas kaj dum longa tempo ankoraŭ devos propagandi ĝin, kreskigi ĝin, defendi ĝin kontraŭ malamikoj; sed se ni ne havas la eblon regule interkonsiligi, aŭ se niaj interkonsiligoj, farataj ne en orda parlamenta maniero, ne havos moralan valoron por la esperantistoj, ni similos organismon sen kapo kaj sen manoj, ni nenion povos entrepreni, ni staros senmove kaj malpacos inter ni mem.

Mi ne volas en la nuna momento defendi la projekton, pri kiu vi en la plej proksimaj tagoj diskutos; t.e. povas esti, ke la projekto havas gravajn erarojn, kiujn via pridiskutado forigos; tre povas esti, ke la tuta projekto montriĝos neakceptinda, kaj tiam — vi scias tion tre bone — mi ne penos altrudi ĝin al vi kiel mi neniam ion al vi altrudis. Nur pri unu afero mi kore vin petas: kion ajn vi decidus, — ni ne fermu nian kongreson antaŭ ol ni en tia aŭ alia formo faros ian aranĝon, kiu donos al ni la eblon almenaŭ unu fojon en jaro solvi ĉiujn kolektiĝintajn disputojn aŭ dubojn en lojala interkonsento kaj konforme al la vera deziro de la tuta esperantistaro.

La aranĝo de regula kaj rajtigita kongresa voĉdonado, kiun mi

proponis al vi, aŭ ia alia simila arango, kiu eble rezultos el via diskutado, ne estos ia nova institucio kaj per si mem ne ŝangos la iradon de nia afero; sed ĝi donos al ni la forton de ordo kaj de solidareco. La institucioj, kiujn ni kreis, aŭ eble ankoraŭ kreos, ĉesos havi la karakteron de ia privataĵo, kiun neniu subtenas kaj multaj atakas. Ili havos rajton diri al la esperantistaro: se ni estas bonaj, respektu nin kaj subtenu nin; se ni estas malbonaj, reorganizu nin aŭ forigu nin. Ĉiu esperantisto scios, al kiu plej alta instanco li devas sin turni, se tio aŭ alia en la komun-esperantistaj aferoj ne plaĉas al li, kaj oni ĉesos konstante sin turnadi al mi, kiu hodiaŭ vivas kaj morgaŭ povas ne vivi, kaj kiu cetere havas nek rajton nek deziron solvi ĉiujn disputojn propradecide.

Ni komencu nian feston kaj ankaŭ niajn laborojn, al kiuj ni dediĉu nian plenan atenton kaj senpartiecon. Se el niaj laboroj rezultos la enkonduko de preciza ordo en nia aferon, tiam la kongreso Antverpena estos unu el la plej gravaj inter niaj kongresoj. Tion ni esperu. Ĉiu el ni havu la firman decidon helpi per ĉiuj fortoj al la enkonduko de ordo kaj forigo de ĉiu malpaco en nia afero. Kun tiu firma kaj solena decido en la koro ni kriu: vivu, kresku kaj floru nia afero!



KONGRESA RAPORTO

AKCEPTO EN LA URBESTRAREJO

La 19^{an} Junio, kelkajn minutojn antaŭ la tria, kunvenis en kaj antaŭ la Hotelo Terminus — kie loĝas nia majstro — granda popolamaso: Dro. Zamenhof, la anoj de la Organizaj Komitatoj, la Akademianoj kaj la registaraj delegitoj estis ja veturontaj al la Urbestrarejo, kie ilin akceptos lia urbestra Moŝto, Sro. Jan De Vos. Entuziasmaj aplaudoj ĉie salutis la elpensinton de Esperanto kaj lian sekvantaron.

Sro. Van der Biest-Andelhof prezentis la Majstron al la urbestro kaj la skabenoj; Sro. De Vos kore bonvendiris Dron. Zamenhof, kiu dankis en sia nomo de l'tuta esperantistaro. Jam la ŝampanvino ŝaumis en la glaso; la urbestro donacis al sia eminenta invitito la pokalon, en kiu li (la urbestro) estis trinkinta, kaj prezentis al Sino. Zamenhof la simbolajn antverpenajn rozojn.

La akcepto en la Urbestrarejo estis korega; la ĉeestintoj ĉiam kun plezuro memoros ĝin.

MALFERMA KUNSIDO

La solena malfermo de la Kongreso, okazis en la belega salono de la Zoologia Ĝardeno. Pli ol 2,000 ĉeestantoj prepariĝas por aŭdi la ĉiujaran parolon de nia majstro kiun ni enpresigas aliloke. La parolado de Dro. Zamenhof okazigas kiel kutime bruegan aplaŭdadon.

La urbestro de Antverpeno, Sro. De Vos, legas en flandra lingvo, bonvenan saluton de la urbo al Kongreso : tiu parolado tradukita poste en esperanto estas tre aplaŭdita.

Sro. De Vos, urbestro, parolas frandralingve kaj deklaras sin feliĉa, ĉar li havas ia okazon ne nur doni la moralan subtenon de sia ofico al la kongreso sed ankaŭ alporti la esprimon de sia admiro al la tuta esperantista movado.

La oratoro konstatas la utilon de mondlingvo kaj diras ke ĉe ĉiu, kiu amas sian propran lingvon, la unua sento, ĉe la naskiĝo kaj la propagando de internacia lingvo, estas sento de timo. Sed tiu timo foriĝis, ĉar nun ni komprenas, ke Esperanto ne estas celo, sed perilo : ĉiu konservas sian lingvon por esprimi siajn ideojn, sed oni uzas la mondlingvon, kiam oni volas sin turni al alilingvanoj. Esperanto estas do perilo por kunfratiĝo inter la popoloj, kaj la parolanto diras, ke li ĝojas, ĉar li povas gratuli tiujn, kiuj laboras por atingi tiun belan idealon.

La parolo de Sro. De Vos, tradukita Esperanten de Sro. Ritschie, estis ege aplaŭdata ; poste Dro. Zamenhof stariĝis ; lin salutis aklamado tia, kian certe malofte iu ajn aŭdis ; ĝi ne estis plu nura entuziasmo : ĝi estis fajro kaj flamo.

Sekvas la paroladoj de la diversaj delegitoj nome : Sro. Sybie, oficiala delegito de la Registaro el Norvegujo ; Sro. Vischy, delegito de la urbeŝtaro el Praha ; Goeman, delegito de la Belga Registaro ; Perogordó, delegito de la hispana Registaro.

Sro. Perogordó estis komissita de la Reĝo Alfonso XIII por doni al Dro. Zamenhof la insignon de Komandoro de la ordeno de Isabel la Katólita. Tiu insigno, farita el oro kaj multekostaj ŝtonoj, estas kiel oni memoras kolektiva donaco de la hispanaj esperantistoj. Estis vere emocia momento, kiam la ĝenerala konsulo el Hispanujo en Antverpeno metis la rubandon de la ordeno ĉirkaŭ la kolo de la majstro. La aplaŭdoj fariĝis tondro bruega, kiu dauris kelkajn minutojn...

Ni aŭdas ankoraŭ, Sron. Miranda, delegito de la brasila registaro

Dron. Fraga, delegito de la registaro de la Argentino Republika; la sekretario de la ĥina ambasado en Parizo en la nomo de registaro el Hinuĵo; Sron. Fischer, el la Komercio Ĉambro el Galatzo; sinjoro Vischy, delegito de la Rusa registaro; Sron. Reed. id. de la Usona registaro; Yemens, id. de la Usona Ruĝa Kruco: Lees el la ŝtato Masachusets; Moscheles el la Internacia Asocio de la Paco.

Ni aŭdas ankoraŭ salutojn de Sroj. Nufos, Rollet de l'Isle, Delvaux, Josefon, Weber, de la prezidanto de la Kataluna Esperantista Federacio Sro. Bremón, kaj de multaj aliaj. La poliestro el Antverpeno, Sro. Hermand, certigas en bela esperanta parolado, ke li ne estos kontenta ĝis kiam la tuta policanaro Antverpena scios paroli nian lingvon. (Estas konstatinde ke pli ol 30 policanoj tre bone parolis Esperanton).

Post la elekto de la naciaj vicprezidantoj, finiĝas la kunsido je la sonoj de nia glora himno.

KAATJE

Sendube, unu el aferoj kiuj plej bone sukcesis en la 7^a estis la prezentado de *Kaatje*. Intence, mi ne volis legi la verkon antaŭ ĝia prezento, ĉar mi propraserte volis konstati, ĉu estas eble ĝi ĉiun belajn de iu verko, prezentata en esperanta lingvo.

Mi ne havis tempon mendi mian sidlokon, kaj kiam venis la horo de la prezento, mi ne povis havi eĉ la plej malgrandan sidlokon... sur la korto kaj loĝioj: feliĉe, la organizintoj de la 7^a, rezervis la «paradizon» por la malfruemuloj, kaj de tiu «altaĵo» mi ĉeestis la belegan disvolvigon de la flandra dramo.

Mi ne kuraĝas diri kiu el la artistoj plej bone ludis kaj parolis laŭ opinio de la publiko. Ĉiu el ili faris tiel bone sian rolon, ke la ĉarmoj de *Kaatje*, la perfektecon de Jan, la mirinde belparolata esperanto de Pomona, la unuvorte rava ludado de ĉiuj, mirigis ĉiun ĉeestanton.

Nu, la sukceso estis grandega, kaj la samideanoj ofte rememoros tiun belan vesperon; realveninte en la malproksima, amata helmo, ili pensos al la ĉarma, juna Holandanino, kiun la doloro plibeligis, kaj kiu sciis suferi tiel pacience, tiel inde.

La ĉambrego de l'bela Flandra Operejo havis brilan aspekton. Pli ol ordinara esperantista entuziasmo regis, kaj tio jam sufiĉe diras... Ankaŭ la geinterpretantoj meritis ĉiujn laŭdojn; ilia laboro rajtigis la favoran akcepton faritan de la impresitaj kongresanoj. Post ĉiu akto, oni devis resuprenigi la kurtenon tri aŭ kvarfoje; post la tria akto, Sro. Van der Biest-Andelhof aperis sur la scenejo,

kaj elokvente dankis, en la nomo de la ĉeestantaro, la geaktorojn, Sinojn. H. Bertrijn, M. Verstraete kaj M. Janssens, kaj Srojn. J. Verstraete kaj K. Van Rijn, kaj la reĝisoron Sron. A. Van den Heuvel.

La publiko vokis ankaŭ sur la scenejon Sron. Dron. W. Van der Bies, la lertan tradukinton.

Post la ludado la kurteno leviĝis tri, kvar, dekfoje, kaj la vera tondro el aplaŭdoj de la entuziasmigita publiko, montris kiom la dramo estis ŝatata.

LABORA KUNSIDO

La jaŭdon okazis la labora kunsido de la «Sepa» kiu devis esti kaj certe estis tre grava.

Oni diskutis la proponon de Dro. Zamenhof kies celo estis la kreo de organizaĵo plene kaj fidele reprezentanta la tutan geesperantistaron. Feliĉe, tute malsukcesis la celo de la pioniroj de la U. E. A. Certe U. E. A. ne estas deca plenumi la celon de la propono de la majstro. Kaj tion ĉiu konprenis, kaj krom kelkaj ŝanĝetoj estis preskaŭ unuanime aprobata la propono de Dro. Zamenhof.

Partprenis la diskutadon Sroj. Bourlet, Boirac, Pujulà, Mudie, Mybs, Reed, Privat, Hodler, k. a.

FERMA KUNSIDO

La komenco de ĉi tiu kunsido estis la daŭrigo kaj fino de la labora kunsida. Oni entuziasme elaprobis la proponon de Dro. Zamenhof, kaj oni elektis komisionon kiu plenumos ĝian eston. Estas membroj de tiu komisiono Sroj. Bourlet, Cart, Mybs, Mudie, Pujulà, Hodler, Fiŝer, Perogordo kaj aliaj pioniroj.

Multaj Esperantistoj alparolis la ĉeestantaron pri proponoj, sukcesoj, komunikaĵoj, gratuloj, k. t. p., kaj en granda entuziasmo finiĝis la ferma kunsido interradiaŭante unu la alian per la frazo «ĝis revido en Krakovo dum la Oka».

AMUZAĴOJ

Manko da spaco malebligas al ni raporti pri multaj amuzaĵoj de la Kongreso per kiuj niaj antverpenaj samideanoj regalis nin.

Ni raportus longe pri la Internacia Balo okazinta en la Reĝa Harmonia Societo, dum kiu oni povis admiri la belecon de tiom multe da samideaninoj; pri la koncerto de «Vagabonda Klubo» kaj prezentoj de komedioj en kiuj partoprenis tre ŝatinde nia kara amiko Sro. Urbez; pri la Koncerto de Flandraj Kantoj, festo tre bone suk-

cesinta ; pri la tre agrabla ekskurso sur la rivero Skeldo, k. t. p., sed nia ĵurnalo estas malvasta kaj ni devas limigi nian raporton rilate la ampleksojn de nia revuo.

Resume : la 7^a Kongreso de Esperanto, estas ago per kiu niaj antverpenaj samideanoj pruvis sian entusiasmon, kaj la tuta esperantistaro en Antverpeno kunveninta, la vivecon kaj forton de nia sankta ideo.



LA TIMEMA VILAĜANINO

GALOPU, turdkolora ĉevaleto ; kuru, flugu ĉar kiam la bela vilaĝanino vidis cin alvenantan salutos cin per poŝtuko kaj danka rigardo. Galopu, ĉevaleto ke ni tuje alvenos ; kuru, flugu...

Estas en la vilaĝo kaj en ĝia medio, majesta trankvileco kiu similas je biblia paco. Oni devas kredi ĉion dormantan. Mi dirus ke ia mortiga letargiĝo penetris en la malbelajn kaj malpurajn stratojn kaj en la malgrandajn kaj mallongajn domojn. Mi nomus la vilaĝon, silenta dezerto. Sed la resonado de la ĉevala piedbruetado sur la ŝtonetoj de la strato, anoncis mian eraron : post fenestretoj mi vidis ekmontriĝi kuriozaj, grandaj okuloj de timemaj vilaĝaninoj kiuj revas pri la veno de iu sprita kaj kuraĝa kavaliro, kiu dirus al ili amaĵojn igante j ilin senti kiel amataj fianĉinoj.

Mi vidis ŝin post fenestro kiu estas kradita kaj lianita. Ŝi estas fraŭlino kies animo estas pura kaj blanka, kolombina animo ; ŝi estas kamparauino kiu sarkas la grenpajlojn kaj kolektas la flavan rikoltrestaĵon. Kaj ŝi pensas je mi.

Ŝi estas tiel pura kiel timema. Ankoraŭ ŝi ne kuraĝis moduli apud miaj oreloj la eternan frazon de la enamituloj, la frazon dolĉan kiel la abelĉelaroj. « Mi amas vin ». Sed ŝi diris tion al mi per la okuloj kiuj estas la lingvaĵo de la naivaj animoj. Mi devis diveni ŝian penson.

Kiam mi pasas antaŭ ŝia krado mia ĉevalo fiere turniĝadas por ke ŝi rigardu ĝin. Ni ambaŭ rigardas unu la alian. Kaj ŝi ruĝiĝas. Kaj deklinas la vidon de mi, fiksanta ŝiajn pupilojn sur la florajn lianojn.

Mi alproksimiĝas kaj salutas ŝin :

— Adiaŭ, mia amatino.

— Adiaŭ.

— Ĉu vi min atendis?

— Jes, mi atendis vin.

— Ĉu vi min amas?

— Jes; mi amas vin.

Tio estas nia ĉiama idilio. Dum la tempo kiam mi estas apud ŝi eĉ ne rigardas min. Deprenas lianfloron kaj premas ĝin inter ŝiaj longcilindraj fingroj.

Senatente, mi prenas unu el ŝiaj manoj inter la miajn kaj mi intencas alproksimigi ĝin al miaj deziregaj lipoj. Mi volas ami, mi volas kisi... Mia vilaĝanino retiras subite la manon kaj foriras el la fenestro, kie mirigita mi rigardas ŝin; ŝi foriras kiel timema cervidineto divenanta la alproksimiĝon de la ĉasanto.

Kaj ne plu ŝi apudiĝas la kradon. Kaj mi foriras.

— Ne kuru, turdkolora ĉevaleta, ke ni malproksimiĝas je ŝi, ke ĉiunomente nia interspaco estas pli longa.

Kiam mi estis iom malproksime mi turnis subite la kapon kaj mi vidis la timeman vilaĝaninon kisantane furioze la pintojn de ŝiaj fingroj...

A. TORNÉ



LA NAJTINGALO

(Kataluna popola kanto)

Vi fluganta al Franclando	Trilu min al la patrino	Sed ne multe al la patro
najtingal'	najtingal'	najtingal'
trilu min al la patrino	sed ne multe al la patro	ĉar min al paŝtist' li donis
najtingal'	najtingal'	najtingal'
de belarbaro	de belarbaro	de belarbaro
najtingal'	najtingal'	najtingal'
sen halt'.	sen halt'.	sen halt'.

Kuntradukis, Finoj. Amalia kaj Mercé Gili, kaj Sroj. Fred. Pujulà, J. Bremon Masgrau, Delfi Dalmau kaj Estanislau Pellicer dum la revena vojaĝo de la Kongreso de Tarragona.



ENLANDA MOVADO

BARCELONO¹

La 26^{an} de Majo oni legis en la sidejo de «Espero Kataluna» la verkon *Kaatje* kiu estis prezentata dum la VII^a Kongreso en Antverpeno.

Parolado. — Sro. Delfi Dalmau parolis la 28^{an} de Majo ĉe la «Ateneo Obreiro Martinense» pri «Esperanto kaj esperantismo». La parolanto estis tre aplaŭdata de la aŭdinta ĉeestantaro.

Vizito. — La grupo «Kulturo» vizitis la 28^{an} de Majo la Industrian Lernejojn kaj Socian Muzeon: multaj barcelonaj esperantistoj kunigis al la grupoj el «Kulturo» kaj restis tre kontentigitaj pro la akcepto farita al ili.

Novaj Kursoj. — En la sidejo de «Esperanto kaj Patrujo» estas klarigata nova kurso kiu okazos lundojn kaj merkredojn de la 9^a ĝis la 10^a.

La 3^{an} de Junio komenciĝis en la grupo «Supren!» nova kurso kiu daŭros la lundojn, merkredojn kaj vendredojn de la 9^a ĝis la 10^a vespere. Ĝi estas tute senpaga.

La proksiman monaton de Oktobro oni malfermos alian kurson.

La 25^{an} de Majo oni inaŭguraciis la kursojn de Esperanto klarigatajn en la grupo «Novan Vojon». Oni paroladis por Esperanto kaj estis legataj diversaj esperantaj poezioj; ankaŭ oni kantis en nia lingvo. La festo finiĝis en dancado dum kiu oni daneis la esperantan dancan *La Rondon*.

Esperantistaj vendredoj. — Vera sukceso estis la parolado kiun faris al ni la kara rusa samideano Sro. G. Ciklari (Tiflisano) ĉefpropagandisto kaj korespondanto de *La Verda Standardo*.

La aŭdantaro kiu plenigis la tutan salonon de la grupo «Semo» (Ateneo Enciclopédico Popular) tre entuziasme aplaŭdis lin post la difino de la kortusanta temo «Regno Dia sur la tero».

La parolanto prezentis dokumenton de *La Verda Estandardo* (Hungarujo) per kiu li estas petata propagandi Tutmondan Laboristan Ligon; li esprimis la bonajn kiujn alportos al la tutmonda laboristaro la efektiviĝo de tiu bela ideo.

Por propagandi tiun Ligon en nia lando oni bezonas nomi delegiton, kaj Sro. Ciklari petis ke unu el la ĉeestantoj prenu sur sin tiun taskon: volonte ĝin akceptis nia amiko Sro. Francisco Piñol profesoro de la grupo «Liberio».

Nia tiflisa amiko foriris al Rusujo. Ni deziras al amiko bonan vojaĝon.

La prezidanto de «K. E. F.», Dro. J. Bremón, faris la 2^{an} de Julio en la grupo «Semo» paroladon pri nia Dua kiu okazis en Tarragona.

1) Parton de tiu ĉi raporto li ne povis publikigi en la lastaj numeroj pro manko da spaco.

Li antaŭdiris ke nia Kongreso estos sukceso kaj la faktoj pruvis la verecon de liaj vortoj.

Li finis dirante ke la ĉeestantoj al tiu Kongreso konservos plaĉan memoron de la supre dirita urbo.

Poste oni projekciis kelkajn vidaĵojn de Tarragona per kiuj ni nin povis fari pli kapablaj scii kiom estas interesinda Tarragono.

La prezidanto de «K. E. F.» estis treege gratulata post la fino de sia parolado.

Propagandaj ekskursoj. — Organizita de la agema grupo «Barcelona Stelo» okazis la 28^{an} de Majo ekskurso al la najbara urbo Badalona.

Pli ol 300 geesperantistoj foriris de Barcelono en tri tramveturiloj ornamitaj per esperantaj flagoj. Alveninte al Badalona ili estis akceptataj de la urbaj aŭtoritatoj kaj poste ili vizitis la fabrikejon de Sroj. Bosch germanis kie estis ĝentile regalitaj per donaco de la bongusta likvoro tie ellaborita «Anís del Mono».

La ekskursanoj sin direktis poste al la «Círculo Apolo» kie okazis grava propaganda ago. Antaŭ multe da ĉeestantoj Sroj. J. Campdelacreu kaj J. Grau parolis plej konvinke por Esperanto. Fino. Rey ludis fortepiane *La Rondón* kiu estis dancata de multaj paroj de samideanoj : la ekskurso estis granda sukceso.

Resume : bela kaj fruktodona propagando kiun oni devus ofte ripeti.

La 5^{an} de Junio la societo «Esperanto kaj Patrujo» okazigis ekskurson al Moncada. La tieaj esperantistoj hore akceptis kaj akompanis ilin viziti la akvajn putojn. Poste ili sin direktis al «Casino Colón» kie propagande parolis Sroj. Anglada, Bermúdez, Rodríguez kaj Albiñana kiu estis tre aplaŭdataj.

En la grupo «Ĉiam Antaŭen» estas fondita *Ekskursa Fakto* kiu celas alporti per ekskursoj en urbetojn kaj vilaĝojn de Katalunujo, la novan pacan semon, al vilaĝanoj, al kiuj, malgraŭ la konstanta propagando, ne alvenis ankoraŭ la helpa internacia lingvo.

Ĝi celas do, profitante tiujn foriradojn, alporti ĉien, la novan senton. Pro tio, ĝi intencas viziti la tieajn plej lertajn personojn kaj geinstruistojn. Precipe ĉi tiujn lastajn, oni informos pri Esperanto, kaj pri la plej bona metodo por ĝin lerni.

Certe, grava estas tiu entrepreno, sed ankaŭ tre interesa por la progreso de nia afero. Tial, do, oni esperas ke ne mankos kuraĝuloj, kiuj bonvole akompanos la ekskursanojn de «Ĉiam Antaŭen».

De nun, do, restas invitataj partopreni ĉiujn amuzajn vizitojn kaj ekskursojn organizotajn de tiu Ekskursa Fakto, ĉiuj gesamideanoj.

Parolado. — Sro. J. Grau de la grupo «Barcelona Stelo» faris paroladon en la «Casino Apolo» de Badalona la 30^{an} de Julio. La parolado estis sukceso por nia amiko ĉar la ĉeestantaro estis multenombra kaj juste aplaŭdis lin post la fino de lia konvinka parolado.

Lunĉo. — Por solenigi la XXIV^{an} datrevenon de la apero de la unua lernolibro de Esperanto la grupo «La Rondo» organizis lunĉon kiu okazis en la salonoj de la «Mundial Palace» la 22^{an} de Julio. Ĉerkaŭ 100 gesamideanoj ĉeestis tiun feston kio pruvas la sukceson kiun ĝi atingis.

Je la fino tostis Sroj. Sabadell, Campdelacreu, prezidanto de la organizinta grupo, Grau, Dalmau, Baucells, Bravo, Bermúdez, Batet, Gilabert, Gili, Moya, Inglada, Piñol, Renom kaj Dro. J. Bremón, prezidanto de K. E. F., kiu prezidis la feston. Ĉiuj ricevis longajn kaj varmajn aplaŭdojn.

Oni sendis salutan telegramon al la Majstro kaj la festo finiĝis post kanto de *La Espero* kaj dancado de *La Rondo*, esperanta danco.

Niajn gratulojn al la grupo «La Rondo» pro ĝia entrepreno.

Novaj komitatoj. — La Direkta Komitato de la grupo «La Rondo» estas de nun la jena: Prezidanto, J. Campdelacreu; Vicprezidanto, P. Molgosa; Sekretario, E. Igual; Vicsekretario, A. Aguiló; Kasisto, P. Aguiló; Financisto, J. Estrems; Bibliotekisto J. Cervera; Voĉdonantoj, A. Fajula, R. Pujol, E. Llobell, F. Montserrat.

En ĝenerala kunveno de la societo «Esperanto kaj Patrujo» oni elektis la jenan komitaton: Prezidanto, J. Mateu (reelektita); Vicprezidanto, J. B. Albiñana; Sekretario, J. Blanch (reelektita); Vicsekretario, E. Valls; Kasisto, M. Rodríguez; Kontisto, J. Garrigosa; Bibliotekistino, E. Fontanillas; Voĉdonantoj, J. Romagosá kaj M. Bermudez.

Ekskursoj. — Por iom ĝiu la freŝan aeron dum tiuj varmaj tagoj «Esperanto kaj Patrujo» organizis dum la monato Aŭgusto diversajn vesperojn ekskursojn al la najbaraj maroj. Multaj samideanoj partoprenis en tiuj ekskursoj inter kiuj oni vidis belajn kaj ĝentilajn esperantistojn.

Al Antverpeno. — La 17^{an} de Aŭgusto foriris de Barcelono la karavano kiu organizis la societo «Espero Kataluna». Ni vidis en la stacidomo la karavananojn Sroj. J. Bremón, prezidanto de «K. E. F.», Llevat kaj filino, Serrat, Urbez, Dro. Bartomeu kiu estis la kondukanto; Sro. Coll, el Manlleu; Dro. Pallejá kaj edzino, el Uldemolins; en Culera kuniĝis al ili Sro. D. Dalmau, kaj en Girona, Sroj. Domenech kaj Colomer.

Pon ĝin adiaŭi, ĉeestis je la fiरो de Barcelono inter aliaj samideanoj, la prezidanto de de «Ĉiam Antaŭen»; Sro. Aubeyzon, prezidanto de «Supren!»; Sroj. Anglada kaj Renom el la direkta komitato de «Espero Kataluna», la sekretario de «K. E. F.», k. t. p.

AVIZO: *La barcelona delegito petas al ĉiu grupo kaj societo organizinta iun ajn feston, bonvolu sendi raporton pri ĝi al sia adreso Diputació, 327, 3^{er}, 1^a, kontraŭe oni ne povas certigi pri la presigo en K. E.*

TARRAGONA

La 18^{an} de Junio Sro. Delfi Dalmau parolis en la «Gimnasio de Tarragona» pri Esperanto-lingvo kaj Esperanto-sento.

Ĉiuj lokaj ĵurnaloj parolis siatempe pri tiu parolado kaj per ili oni povas konstati ke ĝi estis granda sukceso por la parolinto.

L'ESCALA

La grupo «Norda Stelo» organizis paroladon kiu okazis la 13^{an} de Aŭgusto en la salono «Novidades» por la disvastigado de Esperanto.

La parolinto Sro. Delfi Dalmau estis akceptata en la stacidomo de la profesoro Sro. Ximinis Guri, prezidanto de la grupo kaj ceteraj komitatanoj.

La parolado rilatis «La koro kaj la cerbo kaj Esperanto» kaj bruega aplaŭdado sin aŭdigis kiam Sro. Dalmau ĉesis paroli. Li estis tre gratulata.

Vespere okazis amika kunsido en la sidejo de «Norda Stelo» dum kiu Sro. Dalmau parolis pri didaktiko por la lingvoj; ankaŭ oni parolis pri la propagando de Esperanto kaj pri aliaj aferoj karaj al la esperantistoj.

Ni gratulas la tieajn esperantistojn por la bona aranĝo de la festo kaj al la vilaĝanoj ĉar ili kunvenis grandamase por aŭdi kulturen paroladon.

REUS

La ĉi tiea grupo «Nova Semo» tago post tago havas pli da fervoruloj ol da malamikoj. Antaŭ nelonge Sro. Aguadé, estrarano de ĝi, proponis al la tuta estraro konstati en la kunvena akto, la ĉagreno konsentita de ĉiuj pro la morto de nia inda kunbatalanto kaj direktoro de K. E. Sro. Dominiko Serdá; unuanime estis aprobita.

Je la 1^{an} Aŭgusto «Nova Semo» nomis propagandan komisionon. aranĝonta propagandajn aktojn en la ĉirkaŭaj vilaĝoj. Tiu komisiono aranĝis sian unuan ekskurson dum la dimanĉo 6^{an} de Aŭgusto al Cornudella, kie estis akceptitaj de la tuta Vilaĝestraro. Post vespermanĝi okazis ĉe la kunvena salono de la tiea Vilaĝdomo, nia proponita propaganda akto.

Sro. Enric Aguadé legis dum duonhoru belan raporton, pri la neceso uzi internacian lingvon kaj montris fine la kapablecon de Esperanto kiu nepre taŭgas al tiu afero. La dua estis Sro. Pallejá kiu per diversaj ekzemploj pruvigis la neceso uzi Esperanton kiel internacia lingvo, kaj efike rekomendis ĝian propagandon. Kaj fine Sro. Rocamora aŭskultigis ĉarman paroladon rilate al Esperanto kaj naturaj kondiĉoj de ĝi. Sro. Olivé Vilaĝestro fermis la feston dankante al ĉiuj pro sia ĉeestado kaj precipe al la parolintoj pro siaj verkoj.

En la «Ateneu» oni regaligis nin per kinematografa kunsido, kiu vere de ni estis aplaudita.

Tiu propaganda komisiono aranĝas nun ekskurson al Mora d'Ebre.

SABADELL

La grupo «Semo» de la grava societo «A. E. P.», el Barcelona, kune kun kelkaj samideanoj el «Esperanto kaj Patrujo» kaj «Esperanta Fako», el «C. A. de D. del C. y la I.», venis tien por viziti la tombon en kiu ripozas nia kara Dominiko Serdá.

Je la tria posttagmeze akompanitaj de amikoj el «Aplech Esperanta Grupo», «Esperanta Semo», «Katolika Stelo» ili iris al la tombejo, kaj la Barcelo-

naj amikoj kiel rememoro al nia direktoro metis sur la tomo rubandon kun la kvar Katalunaj Strekoj en kiu per verdliteroj oni legis «Al Dominiko Serdá siaj admirantoj».

Sroj. Piferrer, Martí kaj Miralles, dankis je la nomo de la sabadell'aj esperantistoj la simpatian fakton de niaj Barcelonaj samideanoj.

Poste ĉiuj kune vizitis la sidejojn de la sabadell'aj esperantaj societoj, en kiuj oni povis konstati la simpatian kiun havis nia plorinda amiko inter la Esperantistaro.

Malgraŭ la varmece de la nuna sezono «Esperanta Semo» malfermis kurson de nia lingvo kiu okazas marde kaj vendrede, estante ĉeestita de kelkaj novaj esperantistoj.

ULLDEMOLINS

Nia kara amiko Dro. Roman Pallejá fondis tie esperantistan societon kun la nomo «Montsanta Stelo» kiu aliĝis tuje al nia Federacio.

La Komitato estas prezidata de Sro. Pallejá kaj la membroj estas Sroj. Isidre Fábregas, Pbre., Domingo Baró, Anton Pere, Joaquim Borrull, Salvador Domenech, Pbre., Alexandre Ossó, Pbre., Sino. Joaquima Juncosa de Pallejá, kaj Fino. Teresa Pere.

Antaŭen ĉiam, karaj amikoj, por la bono de nia afero!

TIVISSA

Nia karega samcelano Sro. Mario Brú, profesoro de privata lernejo en tiu urbeto instruas Esperanton al knaboj.

Estas unu el la plej bonaj rimedoj la instruado de nia lingvo ĉe la lernejoj por atingi nian celon.

Al Sro. Brú niajn gratulojn pro liaj agoj.

MANLLEU

La tiea grupo «Esperanta Amo» organizis gravan vesperkunvenon en kiu partoprenis Finoj. J. R. y M. Caballería, C. Colomer, F. Parredas, M. Vilalta, C. Castells, M. Aufiró kaj Sroj. Coll Calvet, Coll Espadaler, R. Bruch, P. Ramoneda, M. Jaumeandren, G. Altafaja kaj aliaj, kies nomojn ni ne rememoras.

La festo okazis ĉe la societo «Rafel de Casanova», kies salonoj estis plenaj da ĉeestantoj kaj samideanoj helpante per sia ĉeestado la atingo de bona sukceso.

Dum la festo estis kantataj *La Najtingalo* kaj *La Spinistino*, katalunaj popolaj kantoj, kaj ankaŭ estis legitaj *La Linio* kaj *La Blinda Bovino*.

Je la fino Sro. Coll Calvet parolis pri la utileco de tiaj festoj por alvarbi novajn adeptojn al nia sankta afero, kaj atingi baldaŭe nian triumfo.

Fine, bela kaj memorinda festo, elkiu ni devas zorgi ke la semita semo fruktigu bone.

SANTA COLOMA DE FARNÉS

La ĉi tiea grupo elektis kiel riprezentanton por la Asambleo el Palafrugell Sron. Pere Costa.

Okaze la somerrestado en nia gaja urbeto de kelkaj universitataj studentoj oni malfermis trien kurson klarigata de Sroj. P. Costa kaj Anton Llinàs, en kiu partoprenas 25 ĉeestantoj.

En la jargenerala kunveno estis elektitaj kiel komitatanoj Sroj. Pere Costa, Andren Ferrer, Josep Puig, Pbre., Josep Canaleta, Joan Mon, Serra, Anton Vila, Tomas Llinàs, Pere Monrrás, Joan Perich kaj Estanislao Aragó.

Unuvoĉe estis elektita kiel Honora Sekretario Sro. Anton Llinàs pro siaj n-laciĝeblaj laboradoj por la starigado de nia grupo.

SANTA PERPETUA DE MOGUDA

Bela festo okazis la 13^{an} de Aŭgusto organizita de la societo «La Kamparoo».

En ĝi partoprenis krom kelkaj geesperantistoj el tiu ĉi urbeto, Sroj. Buxó, el Moncada; Argemí kaj Clerch, el Sabadell; Pastro Coll, el Sant Feliu de Codines, kaj Pastro R. Garriga, el Sardanyola.

Je la fino oni kantis nian himnon *La Espero*.



OFICIALA PARTO

Reunit el Consell Directiu de «K. E. F.» el dia 6 d'Agost en el domicili del president Dr. J. Bremón Masgrau, prengué 'ls següents acords:

Adherir-se al VII Congrès Internacional d'Esperanto que s'ha celebrat a Anvers, del 20 al 27 d'Agost.

Nomenar al Sr. C. Zanni subdelegat a Barcelona amb autorització de cobrar les quotes dels federats d'aquesta ciutat.

Oferir al Sr. Frederic Pujulà, a son regrés de l'extranger, la direcció de la revista KATALUNA ESPERANTISTO.

Nomenar al Sr. J. Palmerola, de Vic, president del Comité organizador local i autoritzar-lo per formar dit Comité i el Comité d'honor.

Publicar i repartir als federats el reglament de «K. E. F.» amb les esmenes que s'hi feren en el Congrès de Tarragona.

Notificar als presidents de les entitats adherides llur nomenament per al Comité Consultiu.

Nomenar el mateix Jurat per al Concurs Literari de 1912 que jutjà els treballs del de 1911, suplint la vacant que deixà la defunció del Sr. Domingo Serdá, el Sr. Josep M.^a Terricabras, de Vic.

Adoptar com a lema de «K. E. F.» *Maro estas gutaro*, de la Sta. Eularia Rossell.

Marista Komisiono. — En la raporto de la 2^a kunsido de nia II^a Kongreso okazinta en Tarragona, ni forgesis diri ke Sro. Pellicer je la nomo de sinjoro J. Astell, sekretario de la Marista Komisiono, legis raporton pri la ago farita kaj farota de tiu Komisiono; en tiu raporto li esprimis plej varman dankon al Sroj. Rollet de l'Isle kaj Hóveler pro la helpo kiun ili donis al tiu ideo, saman dankon al *La Revuo* pro la donaco de grava nombro da ruĝaj broŝuroj kaj al Sroj. Amades, Bordás, Aubeyzon, Dalmau, Gili kaj Blanch, kiuj tre efike helpis tiun komisionon per ilia agemeco en la soldserĉado.

El retrat de la senyoreta Maria Caballero, reina de la festa del *Literatura Konkurso* celebrat durant el Congrès de Tarragona, que no varem poder publicar en el número passat per aver arribat tard a nostres mans, el publicarem en el proxim número perquè l'excés d'original ens impedeix fer-ho en el present.

BIBLIOGRAFIO

Ni nur raportos pri verkoj duope senditaj al la Redakcio.

La Gildhala Pro-Paca Kunveno en London. Broŝuro 24^a paĝa, redaktoro Sro. Harrison Hill. Prezo : 1 penco.

Tiu ĉi broŝuro enhavas la raporton de la pro-paca kunveno okazinta la 28^{an} de Aprilo 1911^a en Londono.

En ĝi parolis Sroj. Lord Mayor (ĉefurbestro), de Londono; Asquith (ĉefministro), Balfour (eks-ĉefministro), Sir Edward Grey (brita ĉefministro de Alilandaj Aferoj), kaj aliaj eminentuloj : ankaŭ enhavas la Propacajn Parolojn de Sro. Andrew Carnegie, kaj la letero de Lia Reĝa Moŝto Georgo V^a.

La Turisto kun la Verda Stelo. Monologo, por Sro. de O. Van Schoor, eldonita de Centra Esperantista Belga Oficejo. Prezo : 0^o16 sm.

Tre amuza kaj simpla teatraĵo proprar por esperantaj festoj, en kiu la aŭtoro tute bone kunligis la spritecon kiu ridigas kaj la propagandon de nia afero.

Noto kaj resuma Katalogo pri la Internacia Muzeo de lingvo Esperanto, organizita de la Esperantista Centra Oficejo. Publikajo n^o 19 de la Centra Oficejo de la Internaciaj Asocioj.

Tiu ĉi broŝuro dividita en tri partojn enhavas; unue la raporton de generalo Sebert al la Monda Kongreso de Internaciaj Asocioj; due, Noto-Katalogon de la Ekspozicio de la lingvo Esperanto en la Internacia Muzeo de Bruxelles; kaj trie; Statistikajn Tabelojn pri la nombro de Esperantistaj Societoj gazetoj kaj libroj.

La Reĝo de la Ora Rivero aŭ La Nigraj Fratoj, de John Ruskin; tradukis Ivy Kellerman, kajero 18^a de la Esperanta Biblioteko Internacia. Prezo : 0^o10 sm.

Plezurege ni legis la ĉarman rakonteton de Ruskin tre bone tradukita al nia lingvo, kaj ni kore gratulas la germanan eldonistan firmon, Möller kaj Borel, pro la zorgo elekti la publikigotajn tekstojn, ĉar el ĉi tiu kolekto ni jam ne scias kiu kajero estos pli grava.

Sinjoro Herkules. Unuakta burleskajo de Georg Belly; tradukis H. Aruty kaj M. Rutin. Kajero 19^a el la antaŭe nomita Biblioteko.

Ni preferus vidi la teatraĵojn sur la scenejo ol legi la librojn, ĉar ĉiam estus pli ĝusta la recenzo per la prezentado ol per la simpla legado, sed tio ne signifos ke legante *Sinjoro Herkules* ni ne vidis bonan dialogon, kaj bonan teatraĵon, tute ne, la aŭtoro sin montras lerta kaj bongusta en tiu malfacila arto. La traduko bona.

Himno Espero. melodio por soprano aŭ tenoro; poezio de Dro. L. L. Zamenhof; muziko de Henri de Coopet. Prezo : 1^o50 fr. Vendata ĉe Boulevard Pereire, 179, Paris.

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONO-HISPANUJO

A VIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezone la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.

— NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO » —

ENHAVO : Popularitat! — Gentoj kaj lingvo internacia. — La rosguto. — La granda arbo. — La patra amo. — Ĉiela peco. — La spiona infano. — Novembro. — Profesoro Dro. Siegfried Lederer. — Enlanda Movado. — Diversaj notoj. — Korespondado.

UNUA LITERATURA KONKURSO



FINO. MARIA CABALLERO ROIG

Regino de la Festo

POPULARITAT!

Avui publiquem la notícia de *La Gaceta*, de Madrid, relativa a la reial ordre per la qual s'autoritza l'explicació de cursos de l'idioma Esperanto en els establiments oficials d'ensenyança, per professors designats per les associacions esperantistes. Aquest fet, a més a més del gran pas que representa per al definitiu triomf d'Esperanto, aludeix poderosament lo que representa i es l'oficialització de l'Esperanto. I en els moments actuals ens suggereix quelques reflexions que considerem oportú exposar.

Si no 'y agués agut a Espanya batecs esperantistes, el senyor ministre poc s'auria sentit empès ad aquesta decisió, ni tampoc auria pensat en l'Esperanto. I es que les autoritats en realitat no són més que 'ls instruments de govern del poble : els que tals són, no 'u són més que perquè 'l poble 'ls delega per a que tals siguin. Per això fan lo que 'ls poble 'l mana fer : quan el poble senti la voluntat de fer obligatoria l'ensenyança de l'Esperanto, això manarà a les autoritats, es a dir, això farà per medi de les autoritats, que formulitzaran l'oficialitat de l'Esperanto.

Hem d'anar, doncs, al poble, a fer-li sentir la voluntat d'oficialitzar l'instrucció de l'Esperanto. I aquesta voluntat serà sentida, i serà sentida prou intensament, quan el poble en general no sols cregui vagament en favor de l'Esperanto, sinó que vegi i senti les qualitats de l'Esperanto i les condicions de la nostra causa.

Els cursos gratuïts d'Esperanto que arreu se donen són el medi més eficaç de fer sentir i veure la causa esperantista. Però per tal medi tant sols s'arriba fins ad aquells que, espontaniament, trobant-se en favorables circumstancies, van a concórrer ad aquests cursos. I això no es prou : així no 's generalitza, no 's popularitza prou el sentiment esperantista. S'ha d'arribar també fins ad aquells que, per desfavorables circumstancies o prejudicis erronis, no aprenguin l'Esperanto. S'ha de fer sentir la causa esperantista a tot el poble, per a que mani a les autoritats formulitzar l'oficialitat de l'Esperanto!

I el medi d'arribar ad aquest resultat tot just ara sembla començar a utilitzar-se, i encara, potser, poc conscientment. Me refereixo a la divulgació de l'idea i el sentiment de l'Esperanto per medi de conferencies i mitings, sobre tot quan les circumstancies són propries, com per exemple en l'inauguració de cursos, de grupus, de banderes, etc. I dic que tot just ara sembla començar a fer-se això perquè re volen dir quelques casos aïllats ocorreguts fins ara, mentres que

aquest any tot d'un cop ja tenim conferències anunciades, un miting en el «Casino del Comercio», de Terrassa, i un altra al «Centre de Lectura», de Reus, celebrats com inauguració dels cursos d'Esperanto que s'han obert aquest any a les esmentades ciutats; una conferència, el diumenge dia 22 d'Octubre, a Vilanova i Geltrú, un acte analoge proxim a tenir lloc a Mataró, etc., etc.

I es així com hem de generalitzar la nostra causa i fer opinió. Hem d'invitar a controversia, a més a més, els qui emeten asercions desfavorables a la causa esperantista, que són sempre aquells que precisament ignoren l'Esperanto; i hem de provar com són falses totes les opinions que senten prejudicis en contra de l'Esperanto; i hem de vigoritzar més els nostres *gesamideanoj* amb les victories que per aital camí assolirem; i hem d'interessar i fer obrir el cor i els ulls als qui encara no sentin ni vegin els nous sentiment i idea de l'Esperanto, que són lo més umà, noble i gran que l'ome fins avui agi pogut sentir i veure.

Enlaire 'l cor i enfora 'l pit, doncs, *gesamideanoj*!

A lluitar, que la nostra lluita produeix el goig de la vida útil i benefactora per a tots els germans omes! i no sols d'avui, sinó també de demà i de tota l'umana futuritat!

DELFÍ DALMAU



GENTOJ KAJ LINGVO INTERNACIA¹

ESTIMATAJ Sinjoroj! Kvankam la nomo de Via kongreso estas «Kongreso de *Rasoj*», tamen permesu al mi, ke mi parolu ne sole pri *rasoj*, sed ankaŭ pri *gentoj*, ĉar ambaŭ egale signifas etnologian grupon da homoj kaj diferencas nur per sia amplekso. La samaj rilatoj, nur eble en pli aŭ malpli granda mezuro, regas inter la gentoj, kiel inter la rasoj, kaj tre ofte estas malfacile diri, ĉu tiu aŭ alia homa grupo prezentas rason aŭ genton.

La reciproka batalado inter la diversaj homaj rasoj kaj gentoj estas la plej granda malfeliĉo de la homaro. Se la Kongreso de Rasoj povus trovi ian rimedon, por forigi, aŭ almenaŭ malfortigi la reciprokajn malamon kaj bataladon inter la homaj gentoj, ĝi povus esti kalkulata al la plej gravaj el ĉiuj kongresoj, kiuj iam ekzistis. Sed,

1) Memuaro verkita de Dro. L. L. Zamenhof por la Kongreso de Rasoj, Julio, 26-29, 1911. — London.


por tion atingi, la kongreso devas ne kontentigi sin per teoria rezonado, kiu forflugas sencele, kiel vento, ne serĉi vanajn kompromisojn, kiuj flikas unu lokon, krevigante alian; ĝi devas antaŭ ĉio esplori kaj trovi la *kaŭzon* de la ekzistanta malbono kaj serĉi rimedon, por forigi, aŭ almenaŭ malfortigi tiun kaŭzon.

Kio estas la ĉefa, eble eĉ la sola kaŭzo de la malamono inter la gentoj?

Ĉu cirkonstancoj *politikaj*, t. e. konkurado inter tiuj homaj grupoj, kiujn ni nomas regnoj? Ne! ĉar oni ja scias, ke ekzemple germano el Germanujo ne sentas ian naturan malamono kontraŭ germano el Aŭstrujo, germanoj naskitaj kaj loĝantaj en plej diversaj regnoj havas inter si reciprokajn simpatiojn, dum ekzemple germanoj kaj slavoj, naskitaj kaj loĝantaj en plej diversaj regnoj havas inter si reciprokajn simpatiojn, dum ekzemple germanoj kaj slavoj, naskitaj kaj loĝantaj en la sama regno, rigardas sin reciproke kiel fremdulojn kaj — se la hejmo ne superas en ili la grupajn egoismojn — ili sin reciproke malamas kaj interbatalas. Sekve ne la ekzistado de regnoj kreas la gentojn kaj la intergentan malamono.

Ĉu ĝin kreas la konkurado *ekonomia*? Ne! Ofte efektive ni aŭdas la krimon: «Danĝero! Tiu aŭ alia gento nin ekonomie englutos! Ni malamu ĝin, ni premu ĝin, ni batalu kontraŭ ĝi!» Sed ĉiu homo, kiun ne blindigas ŝovinismo, facile povas kompreni, ke tiuj krioj estas tute sensecaj, ke ni malamas fremdajn gentojn ne ĉar ni timas, ke ili nin ekonomie englutos, sed ni krias pri englutado tial, ke ni ilin malamas. Ĉar se efektive ekonomia timo estus kaŭzo de nia malamono, tiam en ĉiu lando ĉiuj provincoj kaj urboj devus ja tiel same reciproke sin malami kaj kontraŭbatali. Ĉu efektive pro kaŭzoj ekonomiaj ekzemple la milionoj da rusaj malriĉuloj malamas la milionojn da ĥinoj malriĉuloj, dum, por defendi siajn rusajn premantojn kontraŭ fremduloj ili tiel volonte verŝas sian sangon? Kompreneble ne, ĉar la rusa soldato, mortigante ĥinan soldaton, scias tre bone, ke tiu ĉi lasta neniam farus al li tiom da malbono, kiom lia samgenta «pugno». Sekve ne kaŭzoj ekonomiaj kreas la intergentan malamono.

Ĉu ĝin kreas la reciproka *malproksimeco*, la malsameco de la geografiaj, klimataj kaj aliaj cirkonstancoj, kiuj kaŭzas ian naturan fremdecon kaj antipatiojn inter la gentoj? Ne! Malproksimeco kaj malsameco de lokaj klimataj cirkonstancoj efektive kaŭzas kelkan malsamecon de la eksteraĵo kaj de la karaktero de homoj, sed ne kaŭzas gentojn nek intergentan malamono. La geografia kaj loknatura diferenco inter Peterburgano kaj Odesano aŭ inter Kievano kaj Krasnojarskano estas senkompare multe pli granda, ol ekzemple



DUM LA VII^a. — GRUPO DE GEKONGRESANOJ EN LA KORTO
DE LA REGA ATENEO EN ANTVERPENO

inter Berlinano kaj Varsoviano, kaj tamen inter la unuaj regas la sento de plena samgenteco kaj frateco, dum inter la lastaj ĉiam regas la sento de plena reciproka fremdeco kaj plej fanatika intergenta malamo. Sekve ne la malsameco de la geografiaj kaj klimataj cirkonstancoj kreas la intergentan malamon.

Ĉu ĝin kreas la fakto, ke malsamaj rasoj kaj gentoj diferencas inter si per la ecoj de *korpo*? Ne! Interne de ĉiu gento ni havas homojn kun la plej malsama koloro de la haŭto, kun plej malsama grandeco, formo de la korpo kaj de ĝiaj apartaj partoj; ofte du personoj el la sama gento multe pli diferencas inter si reciproke per la korpo, ol ekzemple meza Japano de meza Franco; kaj tamen al neniu iam venas en la kapon eĉ la plej malgranda ideo dividi la membrojn de ia popolo en apartajn grupojn laŭ la korpaj formoj kaj supozoj, ke tiaj grupoj devas sin reciproke malami kaj kontraŭbatali. Pri la plimulto da fremdaj gentoj jam nun neniu el ni dubas, ke la malsimileco inter iliaj korpoj kaj niaj estas por ni tute indiferenta, ni plejparte ĝin eĉ tute ne povas distingi, ofte ĝi eĉ rekte nin allo-

gas, dank' al nekonscia leĝo de la naturo, kiu fiziologie favoras intermikson de la gentoj.

Nur pri unu sola raso al multaj el ni ŝajnas, ke ni havas kaj ĉiam havos kontraŭ ĝi antipation naturan, tio estas la raso nigra. Sed pli atenta primedito facile montros al ni, ke la kaŭzo de tiu antipatio estas tute alia : la nigruloj, kun kiuj ni, blankuloj, kunpuŝiĝas, antaŭ tro nelonge estis ankoraŭ sovaĝuloj kaj poste sklavoĵoj, kaj la plimulto el ili konservas ankoraŭ la karakterajn trajtojn aŭ la sekvojn de longa barbareco kaj sklaveco, kaj tio nin, homojn liberajn kaj jam de longe civilizitajn pure instinkte forpuŝas. La sentoj de blankulo koncerne nigrulon — tiu sento, kiu ŝajnas al ni ia rasa antipatio — estas en efektiveco tute la sama, kiel la sento de hereda aristokrato koncerne krudan kampulon, kiu estas malagrabla al li pro sia neinteligenteco kaj malelegantaj manieroj. Sed kiam post kelka tempo ĉe la nigruloj malaperos ĉiuj trajtoj de estinta barbareco kaj sklaveco, kiam ili atingos potencon gradon da kulturo, elŝovos el sia mezo multe da grandaj homoj — tiam tute sendube la nuna senkonscia malestimo kaj antipatio cedos lokon al respekto, kaj tiam nin jam certe ne forpuŝos ilia nigra haŭto aŭ dikaj lipoj. Ĉiu el ni povas vidi en sia propra popolo multajn personojn, kies korpoj multe pli malplaĉas al ni, ol la korpo de ia alirasano; se iliaj korpoj estas por ni tro malagrablaj, ni eble ilin evitas; sed ĉu pro la formo de ilia korpo ni ilin malamas aŭ persekutas? Ne! Ne la malsameco de la korpaj formoj kreas la intergentan malamon.

Ĉu ĝin kreas la malsameco de la *mensoj*? Ne! La cerboj kaj la koroj de la homoj el ĉiuj gentoj estas laŭ sia naturo tute egalaj; kaj se ni tiel ofte vidas malsamecon de mensoj, tio estas ne propraĵo *genta*, sed propraĵo *individua*, aŭ dependas nur de la cirkonstancoj, en kiuj la individuo aŭ la tuta gento vivas. Se ni vidas grandegan diferencon inter la mensoj de ia interne-Afrika gento kaj la mensoj de ia Eŭropa popolo, la kaŭzo konsistas ne en la malsameco de la gentaj ecoj, sed en la malsameco de la civilizacio aŭ de la politikaj aranĝoj. Donu al la Afrikanoj sen premado kaj malamo altan homan civilizacion, kaj tiam iliaj mensoj neniom diferencos de niaj. Forprenu de ni nian tutan civilizacion, kaj tiam niaj mensoj neniom diferencos de la mensoj de Afrikanoj hommanĝantoj. Sekve ni havas ĉi tie ne diferencon de gentaj mensoj, sed diferencon de *klereco*, kiun ni en pli aŭ malpli granda mezuro povas vidi ankaŭ inter la diversaj klasoj aŭ diversaj historiaj periodoj de la *sama* gento.

Ke la diversaj mensoj ne prezentas ian apartenaĵon *gentan*, tion pravas ne sole la fakto, ke egalmaniere edukitaj homoj el ĉiuj Eŭro-

paj gentoj havas tute egalajn mensojn, sed tion ankoraŭ pli bone pruvas la komparo ekzemple inter civilizita antikva Egiptujano, civilizita nuntempa Japano kaj civilizita Eŭropano : ili tri apartenas ne sole al malsamaj gentoj, sed eĉ al tute malsamaj rasoj kaj kontinentoj, kaj tamen — se ni apartigos la cirkonstancojn de tempo, loko kaj religio — ĉu la mensoj de tiuj Afrikano, Aziano kaj Eŭropano ne aperos al ni tute egalaj? Ĉu ekzemple la menso de tute alirasa japana scienculo ne estas la sama, kiel la menso de Eŭropa scienculo, malgraŭ ke ankoraŭ antaŭ 50 jaroj inter la Japanoj kaj Eŭropanoj ekzistis ŝajne kolosa malsameco?

Se unu homa grupo havas aŭ ŝajnas havi iom alian karakteron, ol alia grupo, tio venas ne de ia aparta genta menso, sed nur de apartaj cirkonstancoj, en kiuj la grupo vivas: grupo, edukita en sklaveco, ne povas havi tian kuraĝan kaj liberan teniĝon, kiel grupo, edukita en libereco; grupo, kiu ne havis la eblon ion lerni, ne povas havi tian larĝan spiritan horizonton, kiel grupo, kiu multe lernis; grupo, al kiu estas malpermesite havi aliajn laborenspezojn krom komercio, ne povas havi tian karakteron, kiel grupo, kiu ĉiam vivas kun la tero kaj naturo. Ŝanĝu la cirkonstancojn de la grupa vivo, kaj tiam — kion ni jam ofte vidis en la historio — morgaŭ la grupo A havos la karakteron de la grupo B kaj la grupo B la karakteron de la grupo A. Ne, ne ia malsameco de la naturaj mensoj kreas la gentojn kaj la intergentan malamon.

Ĉu ĝin kreas la malsameco de la *deveno*? Efektive, en la unua momento ŝajnas, ke tio estas la plej ĉefa kaŭzo de la intergenta malamo. Ni scias, ke ĉiu el ni amas «sian sangon», ke ĉiu el ni multe pli amas sian fraton aŭ samfamilianon, ol ĉiun «fremdulon». La in-



DUM LA VII^a. — LA REPREZENTANTOJ DE «K. E. F.» SROJ. J. BREMON KAJ F. PUJULÁ KUN SINO. REBOURS DE PUJULÁ KAJ KOLONELO POLLEN, EN ANTVERPENO.

terne altira kaj ekstere forpuŝa apartiĝado de la familioj prezentas jam prototipon de reciproka rilato inter gentoj kaj rasoj, kiuj pro supozo de deveno prezentas ja nenion alian, ol familiojn en pli vasta mezuro. Tamen, kvankam samgentanoj nomas sin «samsanguloj» kaj «fratoj», estas tre facile pruvi, ke la analogio inter familioj kaj gentoj kaj la graveco de la deveno por la intergentaj rilatoj estas nur *ŝajna*. Samfamilianoj scias, ke ilin naskis la samaj gepatroj aŭ la samaj geavoj; samgentanoj analogie kredas, ke antaŭ multe da centjaroj aŭ miljaroj ilin naskis la samaj pra-praavoj; sed tiu kredo estas nur *supozo*, kiu estas bazita ekskluzive nur sur la sameco de la lingvo kaj religio kaj kiu en la plimulto da okazoj estas tute malgusta. Kaŭze de konstanta intermiksiĝado de la popoloj, neniu (krom kelkaj heredaj kastoj, kiel ekzemple la kastoj hindaj aŭ la hebreaj kohenoj kaj levidoj) en la nuna tempo povas scii, al kiu gento apartenis lia pra-praavo. Ne sole oni ne povas pruvi, ke ĉiu nuna loĝanto de la tero apartenas al la sama gento, al kiu apartenis liaj malproksimaj praavoj, sed kontraŭe: el tiuj personoj, kiuj *scias* sian devenon (krom la religie fermitaj kastoj), la plimulto scias tute precize, ke iliaj praavoj apartenis *ne* al tiu gento, al kiu ili mem nun apartenas. Kaj tamen ĉu iu povus diri, ke ekzemple la grandaj rusaj verkistoj Karamzin, Puŝkin aŭ Lermontov ne estis puraj, plej puraj rusoj, kvankam iliaj praavoj estis ne rusoj?

Ĉiuj paroloj pri deveno kaj hereda sango estas nur frazoj kaj pretekstoj, por pravigi niajn sentojn, kiuj efektive havas tute alian bazon. Ni sentas gentan malamon kontraŭ tiu aŭ alia persono ne pro liaj supozataj praavoj, sed nur tial, ke li *mem* estas fakte fremda por ni per sia lingvo kaj sia religio. Se la gepatra kaj familia lingvo de iu estas la rusa kaj lia religio estas la rusa (grek-ortodoksa), tiam — kia ajn estus ia deveno, kie ajn li loĝus, kian ajn korpan eksteraron li havus — li mem kaj ĉiuj liaj ĉirkaŭantoj vidas en li Ruson. Se, kontraŭe, iu eĉ scias tute precize, ke liaj praavoj estis puraj Rusoj, sed li mem havas lingvon kaj religion ne rusajn, tiam nek li mem nek aliaj nomos lin Ruso. Kompreneble, se iu mem ne naskiĝis kun la lingvo kaj religio de tiu aŭ alia popolo, sed nur poste *akceptis* ilin, tiam liaj propraj gentaj sentoj kaj la rilatoj de aliaj personoj al li ofte ne povas subite per unu fojo ŝanĝiĝi; sed lia idaro jam plene kaj por ĉiam solviĝas en la dirita gento.

Estas kompreneble, ke ju pli malproksime (geografie kaj etnologie) staras la akceptintoj de fremda lingvo kaj religio, des pli malrapide estos la procedo de la solviĝado; sed la procedo nepre fariĝos, estos nur demando pri la tempo. Se ekzemple en la centra Afriko

vivus ia popolo, kiu (ne de hieraŭ, sed jam de cent jaroj, ne en la instruitaj klasoj, sed en la tuta popolo) parolus la lingvon franĉan (ne kripligitan, sed tute puran) kaj havus tiun saman religion kaj morojn, kiel la plimulto de la metropolaj francoj, — ĉu tiam la franĉaj naciistoj-ŝovinistoj ne vidus en ili verajn francojn? Multe pli rapide iras la procedo ĉe pli granda geografia kaj etnologia proksimeco. Ekzemple prezentu al vi, ke hodiaŭ ĉiuj hungaroj forĝesis por ĉiam la lingvon hungaran kaj komencis paroli nur la lingvon de la germanoj: ĉu en tia okazo post 30-40 jaroj ekzistus inter ambaŭ gentoj ia diferenco aŭ genta malamo? Certe ne, ĉar ili por ĉiam fariĝus unu gento. Prezentu al vi, ke hodiaŭ ĉiuj hebreoj decidis forĵeti por ĉiam la hebrean religion kaj akceptis la religiojn de la popoloj, kiuj ilin ĉirkaŭas; ĉu en tia okazo post 30-40 jaroj ekzistus ankoraŭ ia diferenco inter hebreoj kaj ne-hebreoj, ia «hebreaj problemoj», ia antisemitismo aŭ filosemitismo? Certe ne, ĉar per la ŝanĝo de la religio la tuta tiel nomata «hebreaj raso» por ĉiam malaperus. Sekve ne la malsameco de la deveno, kiu estas nur preteksto, sed ne kaŭzo, kreas la gentojn kaj la intergentan malamon.

* * *

Kio do estas la vera kaŭzo de la intergenta diseco kaj malamo? El ĉio, kion mi supre montris, oni povas jam vidi, ke, malgraŭ ĉiaj kvazaŭ-sciencaj teorioj pri rasaj apartaĵoj, klimatoj, hereda sangoj, k. t. p., la veraj muroj inter la gentoj, la vera kaŭzo de ĉia intergenta malamo estas nur la malsameco de la lingvoj kaj religioj. Precipe la lingvo havas tian grandegan kaj preskaŭ ekskluzivan rolon en la diferencado de la gentoj, ke en kelkaj lingvoj la vortoj «lingvo» kaj «gento» estas plenaj sinonimoj. Sed du homoj parolas la saman lingvon, sen reciproka humiligo, kun egalaj rajtoj pri tiu lingvo, kaj dank' al ĝi ili ne sole reciproke sin komprenas, sed havas la saman literaturon (buŝan aŭ skriban), la saman edukon, la samajn idealojn, la saman homan dignon kaj rajtojn, se ili krom tio havas la saman «Dion», la samajn festojn, la samajn morojn, la samajn tradiciojn, la saman vivaranĝon: tiam ili sentas sin tute frataj unu rilate al la alia, tiam ili sentas, ke ili apartenas al unu gento. Se du homoj reciproke sin ne komprenas, se ĉiu el ili krom tio havas tute aliajn morojn kaj vivaranĝojn, tiam ili rigardas sin kiel fremdulojn, kiel mutulojn, barbaraĵojn, instinkte evitas sin reciproke kaj reciproke al si malkonfidis, kiel oni instinkte malkonfidis al ĉio, kio kaŝiĝas por ni en mallumo.

Estas vere, ke multaj el ni povas interkompreniĝi kun aligentanoj, kaj tio estas la kaŭzo, ke en la plej kleraj klasoj la intergentaj muroj estas malpli dikaj; estas vero, ke multaj el ni konas kaj juste taksas la esencon de fremdaj religioj, kaj tio estas la kaŭzo, ke homoj vere pensantaj neniam malamas aligentanon pro la alieco de lia religio; sed por ke reciproka sinkomprenado efektive interligu du homojn, estas necese, ke pri la parolata lingvo ambaŭ sentu sin *egalrajtaj*; por ke la religio ne prezentu muron inter du homoj, estas necese, ke ili ambaŭ ne sole estu reciproke toleremaj en principoj de interna *kredo*, kiu ĉe inteligentaj homoj estas afero individua kaj ne dependas de la gento, sed ke ankaŭ diversaj *eksteraj* religiaj vivaranĝoj ilin ne disigu.

* * *

Ĉio supre dirita alkondukas nin al la sekvanta konkludo *principe*: *La intergenta diseco kaj malamo plene malaperos en la homaro nur tiam, kiam la tuta homaro havos unu lingvon kaj unu religion*; ĉar tiam la tuta homaro en efektiveco prezentos nur unu genton. Daŭros tiam en la homaro tiuj diversaj malpacoj, kiuj regas interne de ĉiu lando kaj gento, kiel ekzemple malpacoj politikaj, partiaj, ekonomiaj, klasaj, k. t. p.; sed la plej terura el ĉiuj malpacoj, la malamo *intergenta*, tute malaperos.

Principe ĉiu amanto de la homaro sekve devas celi al tio, ke la tuta homaro havu unu lingvon kaj unu religion. Sed ĉu *praktike* tio estas necesa? Ne! Malfeliĉiga por la homaro estas ne la *ekzistado* de la gentoj, sed ilia ĝis nun tute neevitebla reciproka *altrudiĝado*. Ĉiufoje, kiam mi volas interrilati kun aligentano, estas nepre necese, ke aŭ mi altrudu al li mian lingvon kaj morojn, aŭ li altrudu al mi siajn. Kiam malaperos tiu bedaŭrinda *neceseco de altrudado*, tiam malaperos la intergenta malamo. Tute same, kiel por interna paco en ia lando ne estas necese, ke la familioj kun siaj familiaj moroj kaj tradicioj malaperu, sed estas nur necese, ke ili ne bezonu altrudi siajn familiajn apartaĵojn al aliaj familioj kaj ke por ĉiuj *eksterfamiliaj* aferoj ekzistu leĝoj kaj moroj neŭtrale-landaĵ, tiel same por la paco de la homaro ne estas necese, ke la gentoj nepre malaperu, sed estas nur necese, ke ili trovi tian «modus vivendi», kiu permeas al ili forigi siajn eksterajn pikilojn kaj ne altrudi al si reciproke siajn gentajn apartaĵojn. Estas necese, ke la homaro aranĝu sian vivon tiamaniere, ke: *konservante sian gentan lingvon kaj gentan religion en la interna vivo de sia lingva aŭ religia grupo, la homoj por*

ĉiuj rilatoj intergentaj uzu lingvon neŭtrale-homan kaj vivu laŭ etiko, moroj kaj vivaranĝoj neŭtrale-homaj.

* * *

Kiamaniere oni povas tion atingi pri aferoj *religiaj*, pri tio mi nun ne parolos ĉar : tio ne estas la temo de mia memuaro kaj postulas preparolon tute specialan kaj vastan ; ĉar la religio ne estas io *nature* genta, sed dependas de la volo de la homoj kaj prezentas parton de la homa civilizacio, tial la religia unuiĝo de la popoloj jam de longe komenciĝis per si mem, kaj ĝin malhelpas nur cirkonstancoj tute *flankaj*, kiuj baldaŭ pasos : kiam unuflanke en ĉiuj landoj malaperos la privilegiiteco de tiu aŭ alia religio kaj sekve ĉiu povas ŝanĝi sian denaskiĝan religion sen perfido kontraŭ siaj suferantaj samgentanoj, kaj kiam duaflanke ekzistos religio, kies dogmojn ĉiu homo povas akcepti sen malhonesteco kontraŭ sia konscienco, tiam tre rapide la tuta homaro aranĝos sian religion vivon en egala maniero.

Cetere la unuiĝo religia estas forte ligita kun la unuiĝo lingva. Estas afero tute senduba, ke ju pli la homoj komunikiĝados sur neŭtrale-lingva fundamento, ju pli per tiu egalrajta kaj sengenta lingvo ilia literaturo, ideoj kaj idealoj unuiĝos, des pli rapide ili ankaŭ en rilato religia interasimiliĝos. La tuta problemo de la unuiĝo de la homaro kaj de la malapero de intergenta malamo koncentriĝas sekve en *unu* afero, en unu *sola* afero ; kaj tiun ĉi aferon mi plej insiste rekomendas al via atento, vi, kiuj kunvenis, por pripensi la problemon de amikeco kaj justeco inter la gentoj kaj la rasoj. Tiu afero estas : *por ĉiu rilatoj intergentaj oni devas uzi lingvon neŭtralan, por ĉiu facile akireblan, al ĉiu egalrajte apartenantan.* Al ĉiu, kiu ne volas paroli kun ni en *nia* lingvo, ni parolu en lingvo *neŭtrala*, kaj tiam malaperos la ĉefa kaŭzo de intergenta malamo kaj humiligo ; ĉiu gento, kiu ne volas humiligite akcepti kulturon en lingvo de siaj malamikoj aŭ de fieraj najbaroj, havu la eblon akcepti ĝin en nehumiliga lingvo neŭtrale-homa, — kaj tiam baldaŭ ne ekzistos plu gentoj senkulturaj.

* * *

Ĉu tia neŭtrala lingvo *povas* ekzisti? Jes, ĉar ĝi jam de longe *ekzistas*, bonege funkcias, havas grandegan multon da uzantoj kaj riĉan, potence kreskantan literaturon. Tiu lingvo, kiu havas nenium

materialan aŭ moralan mastron, sed estas plene libera kaj egalrajta apartenaĵo de ĉiuj siaj uzantoj kaj postulas de ili nur, ke apartaj ambiciaj personoj ne rompu kaj ne ŝanĝu ĝin sen komuna interkonsento, — tiu lingvo ne sole ekzistas kaj bonege funkcias, sed ĝi ankaŭ jam nun perfekte plenumas tiun rolon, pri kiu mi supre parolis, t. e., la rolon de interhoma fratiganto kaj de foriganto de ĉiuj muroj kaj malamo inter la gentoj. Kiu volas konvinkiĝi pri tio, kiel bonege tiu lingvo povas esti uzata egale de ĉiuj rasoj; kiu volas konvinkiĝi pri tio, kian grandegan gentunuigan forton posedas tiu neŭtrala, al ĉiuj egale apartenanta lingvo; tiu ne agu kiel tiuj scienculoj, kiuj post kelkvara bonega funkciado de fervojo; verkis grandajn traktatojn pri neebleco de fervojo li ne diskutu teorie, ne babilu pseŭdo-sciencajn frazojn pri rasaj apartaĵoj, sed li vizitu unu el la ĉiujaraj universalaj kongresoj de esperantistoj; li vidos tie la perfektan harmonion inter la gentoj; li vidos per siaj propraj okuloj kaj aŭdos per siaj propraj oreloj, kiel la interrilatado sur neŭtrala, neniun humiliganta fundamento absolute forigas kaj forgesigas ĉiujn barojn kaj fremdecon inter la gentoj, — kaj tiam li komprenos, kion la homaro bezonas, por atingi fine pacon inter la gentoj.

Tion, kion la homaro bezonas, ni ne devas nun plie deziri, ni ne devas kun granda malfacileco kaj duba rezultato provi ĝian kreadon — ĉar ĝi jam ekzistas, kiel senduba, plene palpebla fakto. Ni devas nur *subteni* ĝin.

Neniaj kompromisaj paliativoj, neniam sagacaj politikaj kontrakt-oj donos pacon al la homaro. Sed ju pli la esperantismo fortiĝos en la mondo, ju pli ofte la homoj el diversaj gentoj kunvenados kaj interrilatados sur neŭtrala fundamento, des pli ili kutimos sin kompreni kaj ami, des pli ili sentos, ke ili ĉiuj havas egalajn korojn, egalajn mensojn, egalajn idealojn, egalajn suferojn kaj dolorojn, ke ĉia intergenta malamo estas nur restaĵo el la tempoj barbaraj. El tiu neŭtrala fundamento, kaj *nur* el tiu fundamento, iom post iom elkreskos tiu estonta unuigita kaj pure homa homaro, pri kiu revis la profetoj de ĉiuj gentoj kaj tempoj.

Se vi, membroj de la Kongreso de Rasoj, volas, ke viaj laboroj donu realajn fruktojn, vi scios, kion vi devas fari.

L. L. ZAMENHOF



LA ROSGUTO¹

Devizo : «Rozoj kaj dornoj»

En flora kroneto duonmalfermita
 dezerta, izola kaj ja forlasita
 en kiu dormadis papilio bela
 je la tagnaskiĝo, rosguto tre hela,
 en ĝi, dolĉan kison metis ravigita.

Kaj tiu guteto de roso humila
 kun fid' enamiĝis de l' floro ĝentila,
 ne kredis ĝi morti eble tro baldaŭe
 kaj en la kaliko, de kiu ĉirkaŭe
 ĉio bonodoras pro l' ĝojo Aprila,

kaj kie la ĉarma papili 'dormiĝis,
 silente l' rosguto rav-ekstaziĝis.
 «Ni ĝuu trankvile je l' horoj plezuraj
 daŭrantaj momenton!», la tonoj murmuraj
 ellasis, de l' guto kiu pligojiĝis.

Sed baldaŭ karese ĝin palpas, ĝin tuŝas
 la varm' sunradia; tiam ĝin dispuŝas,
 kaj l' antaŭa ĝojo de vibra odoro
 fariĝas malĝoj' en la fundo de l' floro
 kie l' papilio ankoraŭ nun kuŝas.

Aŭdante kanzonon de rava cikado
 vekigas la roso de sia dormado
 kaj ĝi tuj ektemas, silente, senbrue,
 kaj ploras, kaj timas malgaje; senĝue,
 ĉar estas timiga cikada kantado.

«La vivo, tre dolĉa kaj de mi amata
 apud vi ja estis, ho flor' delikata,
 kredante nur ĉiam brile vin amadi!»;
 la morto devigas, fine murmuradi
 al roso malvarma, de l' sun' mortigata.

1) Versaĵo kiu atingis la ordinaran premion, en nia unua Literatura Konkurso.

Kaj iom post iom la guto fandigas
 dum la varma Suno al ĉiel' levigas,
 la grenojn, la kampojn, ĉion orumante,
 la florojn, foliojn, kun bril' sekigante
 por la hela tago kiu proksimigas.

En tiu kaliko de floro krevanta
 la ĝoja rosguto fariĝas dormanta
 kaj restas rigida kaj iĝas senforta,
 batalas al vivo sed tuj iĝas morta
 pro l' troa kareso de l' Sun' varmiganta.

Tiel sian rolon la rosguto ora
 finis, tre ĵaluza de l' kroneto flora
 kie papilio, ĝin ĉirkaŭprenante,
 kiam ĝin malfermos la sun' vekigante,
 alian dolĉkison al flor', donos glora.

J. VENTURA, el Terrassa



LA GRANDA ARBO¹

Devizo : « Ankoraŭ... »

I

PROKSIME de la vojo staras altega arbo, kiu tute ŝajnas enigi sian supraĵon en la bluan de la firmamento.

Apud la piedo de l' arbo pasis homo kiu, mire ĝin rigardinte, ekkriis:

« Ĝi estas belega arbo! »

Kaj li daŭrigis sian interrompitan marŝadon.

Poste pasis dua trairanto kaj tiu ĉi, ankaŭ pensis ke la arbo estas belega, sed ne malferminte la lipojn por tion diri, pasis ne haltinte.

Pli malfrue pasis tria marŝanto kaj tiu ĉi eĉ ne atentigis pri la estado de l' arbo.

1) Premiita en nia unua Literatura Konkurso, per la premio de Sro, Direktoro de l' « Institut de Tarragona ».

II

Fine alvenis du frenezuloj. Unu el ili intencis grimpi ĝin; sed apenaŭ li atingis la unuajn branĉojn falis teren kaj rompiĝis lia kapo. Tiam oni vidis ke li havis nenion en ĝi.

Lia kunulo intencis same grimpi; sed, per pli da ruzo aŭ da fortoj ol sia antaŭulo, sukcesis atingi la supraĵon kaj de tie li povis atente rigardi la mondon — malgrandan, tre malgrandetan! — kuŝantan sub siaj plandoj.

Kaj la mondo proklamis lin Geniulo.

III

Kaj daŭris pasante homoj kaj homoj kiuj, kiel tiu unua, haltis momenton por admiri la Geniulon, kaj ekkriis:

«Eble la frenezulo kiu falis estis tia Geniulo kia tiu ĉi... sed la sorto ne favoris lin.»

Tiuj ĉi estis *la inteligentuloj*.

Kaj, pasis pli multaj homoj kiaj la dua, kaj nek ion dirante nek haltante, ili sin komplezis pensante:

«Eble tiu ĉi kiu atingis la supraĵon estis tiel freneza kiel tiu kiu falis... sed favoris lin la sorto.»

Tiuj ĉi estis *la saĝaj personoj*.

Kaj pasis pli multaj homoj, — ho, multegaj pli! — kiuj, kiel la tria, daŭris en sia marŝado nenion pensinte eĉ nek suspektinte la ekzistadon de la frenezulo, nek tiun de la Geniulo.

Kaj tiuj ĉi estis *la grandega plimulto*, kiuj nomas sin mem *preskaŭ ĉiuj*. — Kaj tiuj ĉi estas kiuj faras kaj malfaras ĉar la tero estas ilia.

APELES MESTRES

(kun afabla permeso de l' aŭtoro trad. E. PELLICER)



LA PATRA AMO

DE longe jam foriris la gajeco ĉe la metiisto. Jako, la ĝis nuna bona kaj lerta lignisto, estas nun preskaŭ tutĉe ŝanĝita. La paco kiu regis en lia simpatia familio, dum la unuaj jaroj de lia edziĝo, estis anstataŭita de la malamo, de la malgajeco, de la malfeli-

ĉeco. Mario, la bela kaj ridema Mario, la iama karesema edzino, estas hodiaŭ nekonebla. Longaj kaj profundaj sulkoj aliformigis ŝian vizaĝon; ŝiaj okuloj perdis pro la larmoj la tiaman ĉarmon, kaj esprimon, kaj eĉ kiam por kaŝi siajn internajn suferojn ŝi intencis ekrideti, ŝia mieno malkovris la ĉagrenon kiu ŝian koron premis.

Familia malfeliĉaĵo estis la kialo de tiu grava ŝanĝo. La malgranda Ludoĉjo, la unua frukto de ilia geedziĝo lasis en la atingo de sia tria jaro, la patran societon por kunigi kun siaj similuloj la anĝeloj. La vundo kiu la geedzojn trafis estis fatala, tial ke la infaneto forkunportis, en sia forflugo, la gajecon de la hejmo.

Bedaŭrinde ne alvenis la bezonata konsolo por ambaŭ. Se la kompatinda Mario trovis en sia fido la kristanan rezignacion kiu centobligas ŝiajn malmultajn fortojn, la nekonsolebla Jako serĉis konsolon tien kie neniel povis ĝin trovi, kaj la ordema kaj bona edzo ĝis tiam, eniris kaj falis tute en la lernejon de la malvirto kiu al li liveris ne konsolon, sed forgeson por iliaj ĉagrenoj.

Ne taŭgis ke nova infano anstataŭis poste la ĉielirintan. La malfeliĉa Jako estis jam aliĝinta. La drinko eltiris lian bonfarenon kaj baris la lertecon de liaj fingroj kiuj ekstremis kiel tiuj de maljunula mano. Li perdis rapide sian antaŭan laboremon kaj finfine post ŝenutilaj admonoj de sia mastro, tiu ĉi lin eksigis.

De tiam la trinkejo estis la ordinara ejo de Jako, kaj *Karaĵo* — la mallaborema kaj drinkema *Karaĵo*, originala estaĵo kiu neniam faris utilan aferon — iĝis lia ofta kunulo kiu al li sciigis sian kutiman kanton:

Manĝi bone,
ne labori,
ĉiam trinki
Jen la viv'.

La sekvoj de tiu societo kaj de tia vivado ne sin atendigis multe. Mario kaj Jaĉjo, ŝia fileto, baldaŭ suferis ilin kaj la sankta hejmo rapide iĝis infero.

Mario rezignacie suferis sian malbonan sorton kaj per siaj korporaj klopodoj gajnis la helpan monon por la unuaj bezonoj de la kompatinda familio de la mallaboremulo.

* * *

Tiel sekvis la aferoj en tiu hejmo post kelkaj jaroj. Nun la etulo multe kreskis kaj faras grandajn progresojn je sia instruo, kaj la heroa patrino por tio senĉese laboradis.

La tagon al kiu ni raportas nun, okazis la baptonoma festo de la paciencema Mario, sed se tio ĉi pasadis senaverte por la malvirtema edzo, kiu en tiu ĉi tago havis demonan humoron, la ĉarma infano ĝin rememoris bone.

La mallonga kaj malnutra tagmanĝo okazadis kun silento nur interrompita pro la senmotivaj fiparoloj de la furioza edzo minacante ante per siaj pugnoj la rezignaciitan Marion kiu mallevigante siajn palpebrojn maŝine ŝajnis porti al sia senapetinta buŝo la nutraĵon. La knabo kompatinde rigardis oblikve sian patrinon ne kuraĝante ekparoli vorton.

Iomete serenita la nuba hejma ĉielo kiam finiĝas la tagmanĝo, la malgranda Jaĉjo oportune profitis tiun okazon, saltante subite sur la seĝon kaj tiam, eltirante el sia poŝo, decide, prematan skribpaperon per kuraĝa kaj laŭta voĉo legis jene:

«Hodiaŭ, la baptonoma festo de mia estimata patrino, mi tutkore ŝin gratulas, dezirante milon da feliĉaĵoj por ŝi, por mia kara patro (la malfeliĉa Jako restis malkviete sur sia seĝo, mirigita, rigardante sian filon; Mario havis fiksitaĵn siajn okulojn al sia edzo), por la progreso de nia hejmo, sekvadis parolante Jaĉjo, kaj fine por ke venontan tagon mi povus danki, kiel ili meritas, la bonfarojn kiujn mi al miaj gepatroj ŝuldas, donante al ili trankvilan kaj ĝojoplenan maljunecon.» La mieno de Jako iĝis tute aliformita kaj du larmoj kiel du aveloj faladis malrapide sur liaj vangoj.

Ĝelkaj sekundoj okazis silente. Jako kaŝis per siaj du manoj sian vizaĝon. Mario karese metis dolĉe sian dekstran manon sur la ŝultron de sia edzo kaj direktinte la maldekstran al la infano, kiu kiel statuo restis sur la seĝo, tiel parolis: Rigardu, kara edzo, nian belan amon. Faru por li tion kion por mi neniam fari volis kaj por li, forpelu ĉiajn malvirtojn, laborante kaj returnante al nia senĉanca hejmo la perditan gajecon. Ĉirkaŭprenu lin kiu pli bonan sorton meritas. Tiu fileto, kiu nun lasis senkonsole, certe atestos cian bonan fakton.

Jes, ci estas prava Mario, diris decide Jako, mi estas krimulo, abomena estaĵo, levigante kaj malfermante siajn brakojn, venu ambaŭ al mia brusto, kien, pasinte de la diro al la fakto, li forte premadis Marion kaj Jaĉjon kisanter pasie ilian kapojn. Danku Dion kaj niajn anĝelojn, ekĝemis Mario, redonante la edzajn kisojn kaj ĉirkaŭprenojn.

La amaso de la tri personoj ŝajnis tiam skulptaĵon lumigitan per ero de Dia helo...

— Bonan tagon! — diris per raŭka voĉo *Karaĵo* kiu malfermante la pardonon per malĝentila puŝo eniradis balanciĝante. Mario ekstremis kaj forte premis sian edzon.

— Bonfartu, — respondas ĝenita Jako.

Karaĵo rigardadis atente tian familian amason kaj fleksigante sian senforman korpon kaj ridaĉante ironie ekkriis :

— Jako, Jako, vi kortuŝadas min.

La infano ĉirkaŭpremis la patran kolon timante ke lia patro cedus. La vizaĝo de la edzino ŝajnis tiam tiu de ĵaluza leonino.

La mokata edzo sentas sangan alfluon al sia vizaĝo kaj montrante per la fingro la ĉambreliron, li diris kolere al la enirinta *Karaĵo* .

— Foriru malbona besto... foriru malproksimen. Mi deziras iĝi alia homo. De nun restos por vi fermata la pordo de mia domo.

Karaĵo direktis mokan rigardon al la parolinto kaj salutante lin komike, foriris malrapide kantante sian propran kanton :

Manĝi bone,
ne labori,
ĉiam trinki
jen la viv'.

Pasis dek jaroj. Ĉe la granda laborejo de la mastro Jako estas festa tago. Oni solenigas kune du gajajn okazintaĵojn : la patronan daton de la mastrino Mario kaj la premion kiun gajnis studema Jaĉjo, kiu nun lernadas profite la inĝenierajn studojn. La sankta paco kaj ĝojo plenigis ĉie tiun ĉi feliĉan hejmon: Je tiu momento la juna studento adiaŭis apud la pordo de la ŝtuparo la laboristojn de la patra laborejo kiuj partoprenis en la ĵusokazinta festeno. La geedzoj restas solaj en la neluksa sed komforta manĝoĉambro.

— Ĉu vi estas feliĉa mia kara edzo? — diris Mario.

— Ne feliĉa, feliĉega, — respondis Jako.

— Kiel ŝanĝis la aferoj!

— Certe Manjo dankon al ciam klopodoj.

— Ne Jako, dankon al niaj filoj, dankon al la patra amo.

Tiam oni aŭdas konatan kanton kiu venis de la strato.

La geedzoj tuj malfermas kune la balkonajn pordojn, kaj, ek montriĝante ekstere, povis elvidi malagrablan scenon.

La malfeliĉa *Karaĵo* maljuniginta, sin apogante per bastono kaj trenante siajn piedojn, persekutis la knabaron kiu mokas lin.

Malriĉa kaj senzorga, ĉar lia filo estas en malliberejo kaj lia filino rondiris la mondon lasante poste erojn el sia honoro, li estis sola.

La sensorta *Karaĵo* atendis ke la morto lin kaptu sur la strato, ian ajn nokton, kiel mizeran hundon.

J. M.^o TERRICABRES

ĈIELA PECO

Hodiaŭ mi eniris en la ĉambron de mia amatino. Ho! kiel bela ĝi estas! Kian odoron tiom ravantan en ĝi oni spiras! La balkono estis duonfermita, permesante ke en ĝin eniru freŝa aero.

Zorge, paŝante tre malrapide kaj eĉ ne spirante por ne fari bruon, mi, ekstazie, rigardadis ĉiujn mirindaĵojn kiujn ĝi enhavas. Mi ne bone scias kiel, mi genufleksiĝis kaj malkovris mian kapon kvazaŭ mi estus enirinta en preĝejon. Sed, jes, vere ĝi estas preĝejo, ĉar tie mia amatino preĝas la amon...!

La punkuseneto staris sur seĝo, kun peceto da bela punto sur ĝi, farita per tiaj tiom delikataj manoj, kaj kun ĝiaj puntfariloj malaranĝitaj. Sur komodo staris du kruĉoj el bela fajanco plenigitaj da belaj kaj diverskoloraj floroj, kiuj samtempe staras antaŭ vitrameblo enhavanta statuon de Virgulino Mariö. Kaj portreto de mi, kuŝis sur la meblo, apud la floroj.

Mi demetis tirkeston el la komodo (Dio pardonu al mi tion!) kaj en ĝi mi vidis la vestolaĵojn de la festaj tagoj atentege gladitaj kaj fleksitaj. En malgranda bela kesteto, ŝi gardas miajn amemajn leterojn. Mi ekkomencis legi iujn el ili: «Amindega amatino mia», la unua diris, kaj la sekvanta «Mia koro»; kaj alia «Mia amata estonta edzino»... Ho!... Kiel mi rugiĝis!...

Aliflanke, mi vidis la liton ŝian, tiel belega, tiel blanka ke ĝi ŝajnis esti farita el lilioj, kaj dum mi rigardadis ĝin, mirigita, mi aŭdis kantadi najtingalon enfermitan en kaĝeto, kaj ĝiajn kantojn, jen kia strangecol, mi komprenis. Li diris:

«Junulo: mi bone vin konas. La buŝeto kiu ĉiutage metas en tiun mian, la piniojn, ĉiam diras al mi ke ŝi vin amas. Jen mi ja vin konas!».

Kaj poste dianoj parolis:

«Fraŭlo: se vi scius kion al ni diras ĉiufoje kiam nin surverŝas via amatino!... Ho! Kiel ĝojega vi estus aŭdante tiajn belajn amvortojn!...»

Kaj la puntfariletoj respondis:

«Kiom da fojoj ni dancadas inter la manoj de via amatino dum ŝi kantas belajn kantojn! De tiuj kantoj, la sopiroj por vi, estas la respondkantoj.»

Kaj la kuseno el ŝia lito, balbutis:

«Kiam ekdormas ĉiunokte kaj matene kiam ŝi vekigas, ŝiaj lipoj el koralo malfermiĝas dirante vian nomon.»

La portreto tiam diris:

«Estas la nomo mia, kompreneble, ĉar preskaŭ ĉiam, mi estas inter ŝiaj manoj el smeraldo, kontraŭ ŝiaj ruĝaj lipoj per kiuj plenigas min je amkisoj.»

Kaj eĉ la Virgulino, ridetante, malfermis sian buŝon por diri:

«Kiam ŝi preĝas antaŭ mi, tre ofte haltas elparolante vian nomon. Jen, vi ja devas esti feliĉa!...»

Subite la plej alta diano, kiu staris kvazaŭ viglisto, ekkriis: «Silentu ĉiuj: ŝi alvenas».

Tiam la tuta ĉambro, ĝojega pro la enhavo de tia mirindeco, ektemis de feliĉo, dum la najtingalo, honorante ŝin, senĉese kantadis siajn plej belajn kantetojn...

Miaj amegaj lipoj ŝin kunigis kaj amkiso supren perdiĝis...

Peco el ĉielo, nesto el naŭveco kaj Amo : via memoro pasigas dolĉe mian vivadon!...

JOHANO AUBÉYZON LLOPIS



LA SPIONA INFANO

Li estis nomata Stenne, la malgranda Stenne, estis infano de Parizo, malfortika kaj pala kiu havis proksimume dek jarojn, eble kvin!

Lia patrino mortis. Lia patro, eksmarsoldato, gardis skvaron en la kvartalo de la Templo. La infanetoj, la vartistinoj, la maljunaj sinjorinoj kun faldseĝoj, la malriĉaj patrinoj kiuj venis en tiujn ĝardenetojn por serĉi ŝirmon kontraŭ venturiloj konis bone la patron Stenne kaj estimegis lin. Oni sciis ke, bona, kortuŝa preskaŭ patrino, rideto kaŝiĝis sub lia kruta lipharo, kaj por vidi tiun rideton estis nur necese diri : «Kiel fartas via knabeto?» Li tiom amis sian filon, la patro Stenne! Li estis tiom feliĉa post la klaso kiam la malgrandulo venis por serĉi lin kaj ambaŭ ĉirkaŭiris la aleojn, haltante antaŭ ia benko por saluti la kutimajn vizitantojn kaj respondi iliajn bonajn vortojn. Bedaŭrinde ĉio ŝanĝis dum la sieĝo. La skvaro de la patro Stenne estis fermita; oni metis tie petrolon kaj la malfeliĉa homo, kiu estis devigata fari observon senĉese, vivis en la senhomaj boskoj, sola, nefumante, havante sian knabon nur vespere, tre malfrue, en la domo. Ankaŭ, lia liphararo estis terura kiam li parolis pri Prusoj! La malgranda Stenne ne plendis pri tiu nova vivo.

Sieĝo! Tio estas tiel amuza por la buboj! Ne plu lernejo, libertempo ĉiam kaj la strato estas kiel foira kampo. La infano restis ekstere ĝis vespero, kurante. Li akompanis kvartalajn batalionojn, kiuj iris al la remparo, elektante prefero tiujn, kiuj havis bonan muzikistaron.

Aliajn fojojn li rigardis la mobilizatojn kiuj ekzerciĝis. Plie li ŝatis laŭvice atendi antaŭ la pordoj de la vendejoj kun sia korbo sub sia brako. Li enŝovis sin en tiujn longajn vicojn kiuj formiĝis en la mallumo de la vintraj matenoj sen gaso antaŭ la pordo de buĉistoj kaj panistoj. Tie la piedoj en akvo, oni konatiĝis, oni parolis pri politiko. Sed la afero plej amuzanta estis la ludo nomita : korko. Kiam la malgranda Stenne ne estis apud la remparo, nek antaŭ la panbutikoj, vi lin certe povis trovi ĉe la korkludo en la placo de la Akvujego. Li ne ludis kompreneble, multe da mono li bezonus por tio. Li nur rigardis la ludantojn per grandaj, enviaj okuloj! Unu

ludanto precipe kiu estis blue vestita kaj kiu metis en la ludon nur kvin-frankajn monerojn ekcitis lian admiron. Kiam tiu ĉi kuris oni aŭdis la orajn monerojn kiuj sonoris en la fundo de lia poŝo. Foje relevante unu moneron kiu estis rulinta ĝis la piedoj de Steneĉjo, la Grandulo diris al li mallaŭte: «Ci deziregas tion, nu! Se ci volas mi diros al ci kie oni trovas tion.» La ludon fininte li kondukis lin flanken kaj proponis al li ke li venu kun li por vendi ĵurnalojn al Prusoj. Oni ricevis tridek frankojn po unu vojaĝo. Komence Stenne rifuzis tre indigne kaj li restis tri tagojn ne reirinte al la ludo. Tri terurajn tagojn! Li ne plu manĝis, li ne plu dormis. Nokte li vidis amasojn da korkoj starantaj apud sia lito kaj monerojn kvin-frankajn brilajn kiuj preterpasis. La tento estis tro forta. La kvaran tagon li reiris al la Akvuĝejo kaj revidis la Grandulon; li tuj estis delogata! Ili foriris dum neĝmateno kun tolsako sur la ŝultro kaj ĵurnaloj kaŝitaj sub siaj kiteloj. Kiam ili alvenis al la pordo de Flandro, tagiĝis apenaŭ. La Grandulo ĉirkaŭprenis la manon de Stenne kaj proksimiĝante al la gardanto, bravulo kiu havis ruĝan nazon kaj bonan ŝajnon, li diris per voĉo de malriculo: «Permesu nin pasi, mia bona sinjoro; nia patrino estas malsana, paĉjo mortis. Mi iras kun mia frateto por kolekti terpomojn en la kampo.» Li ploris.

Stenne honte mallevis la kapon. La gardostaranto rigardis ilin dum momento, ĵetis rapidan rigardon al la senhoma kaj blanka strato. «Pasu rapide», li diris al ali, flankiĝante, kaj jen ili sur la vojo de Aubervilliers. Estas la grandulo kiu ridis! Konfuze kiel en songo Steneĉjo vidis fabrikejojn aliformigitajn en soldatejoj, senhomajn barikadojn garnitajn per malsekaj ĉifonoj, longajn kamentubojn kiuj penetris la nebulojn kaj malplenajn, breĉigitajn supreniris al la ĉielo.

De loko al loko li vidis unu gardstaranton; oficirojn enkapuĉitajn, kiuj rigardis tie per lorneto, kaj malgrandajn tendojn starantajn sur fluidiĝinta neĝo antaŭ mortintaj fajroj. La Grandulo konis la vojojn, li iris trakampe por eviti la postenojn. Tamen ili alvenis, ne povante fari alie al posteno de *francs-tireurs* (liberaj pafistoj). La *francs-tireurs* estis tie kun siaj malgrandaj kapuĉmanteloj, kaŭrantaj en la fundo de plenakvafoŝaĵo. Tiu foje la Grandulo rediris sian historion vane, oni ne volis ke ili pasu; tiam, dum li plorgemadis, maljuna serĝento tute blanka, tute sulkoplena kaj kiu similis la patron Stenne eliris el la domo de la barilgardisto. «Nu! infanetoj, ne ploru plu, — li diris, — oni permesos vin iri por serĉi viajn terpomojn, sed antaŭe eniru por varmigi vin iom, tiu bubo ŝajnas tute frostita.» Vel Ne estis pro malvarmo ke la malgranda Stenne tremis, estis pro honto. En la posteno ili trovis kelkajn soldatojn kaŭrantajn ĉirkaŭ maldika fajro. Per la varmo de tiu fajro ili degeligis biskvitojn sur la ekstremaĵo de siaj bajonetoj. Oni densigis la liniojn por fari lokon por la infanoj. Oni donis al ili iom da kafo. Dum ili trinkis, ia oficiro venis sur la sojlon, vokis la serĝenton parolis al li mallaŭte kaj toriris rapide. «Kunuloj!, — diris la serĝento reenirante ĝojradia, — oni batalos hodiaŭ nokte. Oni aŭdis okaze la *vorton* de la Prusoj. Mi kredas ke tiufoje ni reprenos *le Bourget*.» Estis eksplodo de

aplaŭdoj kaj de ridoj. Oni dancis, oni kantis, oni purigis la bajonetojn kaj profitante tiun tumulton la infanoj malaperis.

Ili aliris al muro haltante ĉiupaŝe por similigigi kolektadon de terpomoj «Reeniru ni... ne iru ni tien», diris senĉese la malgranda Stenne. La alia levis la ŝultrojn kaj ĉiam antaŭeniris.

Subite ili aŭdis la pafpretigon de pafilo kiun oni streĉis. «Kuŝigu», diris la Grandulo sin ĵetante teren. Poste li fajfis, alia fajfo respondis. Ili antaŭeniris rampante. Antaŭ la muro aperis du flavaj lipharoj sub malpura platĉapo. La grandulo saltis en la sulkon apud la Pruso. «Estas mia frato», li diris montrante sian kunulon. Stenne estis tiel malgranda ke, vidante lin, la Pruso ekridis kaj devis preni lin en siajn brakojn por lin pasigi trans la muro. Baldaŭ, la infanoj alvenis al domo. La teretaĝo estis plena je germanaj soldatoj kiuj ludis por ludkartoj kaj faris la supon sur granda brila tajro. Kiel tiu supo bonodoris je brasiko kaj lardo!! Kia diferenco inter la supo de la *Francs-tireurs*!

La oficiroj loĝis en la unua etaĝo. Oni aŭdis ke ili ludas fortepianon kaj malŝtopis la botelojn de ĉampanvino. Kiam la Parizanoj eniris, ili estis salutataj hure pro ĝojo. Ili donis siajn ĵurnalojn, poste oni verŝis ion por trinki kaj oni babiladigis ilin.

Ĉiuj oficiroj ŝajnis fieraj kaj malbonkoraj sed la Grandulo amuzegis ilin per sia urba vervo kaj sia stratbuba vortareto. Ili ridis kaj ripetis liajn vortojn post li. La malgranda Stenne estus bonvolanta paroli ankaŭ sed iu ĝenis lin; kontraŭ li staris Pruso pli aĝa, pli serioza ol la aliaj, kiu legis, aŭ pli bone, kiu ŝajnis legi ĉar liaj okuloj ne forlasis lin.

En tiu rigardo estis amemo kaj riproĉoj tute kvazaŭ tiu homo havus en sia lando infanon samaĝan kiel Stenne kaj ke li diris al li interne. «Mi preferus morti ol vidi ke mia infano faras tian metion.» De tiu tempo ŝajnis al Steneĵo kvazaŭ mano premas lian koron kaj malhelpas ĝian batadon. Por forigi tiun premdoloron li ekdrinkis. Baldaŭ ĉio turniĝis ĉirkaŭ li. Li aŭdis konfuzo inter ridegoj sian kunulon kiu mokis «naciajn gardojn» (*gardes nationaux*). Poste la Grandulo ekparolis mallaŭte kaj la vizaĝoj fariĝis seriozaj. Tiujfoje Steneĵo starigis furioza tute elebriigita. «Ne, tion, Grandulo, mi ne volas.» La alia ridis kaj daŭrigis. La oficiroj tuj ekstarigis, unu el ili montris la pordon al la infanoj «Eliraĉu» kaj la oficiroj ekparolis kune tre rapide germane. La Grandulo eliris kiel dogo, sonigante sian monon. Stenne sekvis lin mallevante la kapon, kaj kiam li pasis proksime la Pruson kies rigardo tiom estis embarasinta lin, li aŭdis malgajan voĉon kiu diris: *Bas choli ĉat!*¹ (Tio ne estas bela!). Larmoj aperis en liaj okuloj. Kiam la infanoj estis en ebenaĵo, ili ekkuris kaj reiris rapide. Ilia sako estis plena je terpomoj kiujn la Prusoj estis donintaj al ili. Pro tio ili pasis facile antaŭ la *Francs-tireurs*. Tiuj ĉi preparis sin por la nokta atako: soldataroj alvenis silente, amasiĝante post la muroj. La maljuna serĝento

1) *Bas choli* (elparolu ba ŝoli) signifas france *Pas joli* kaj estas skribite laŭ la elparolmaniero de la prusoj.

estis tie okupita, lokante siajn soldatojn. Li ŝajnis feliĉa. Kiam la infanoj alproksimiĝis, li rekonis ilin kaj sendis al ili bonan rideton. Ho! kiel tiu rideto faris doloron al la malgranda Stenne. Momente li volis krii: «Ne iru tien, ni perfidis vin.» Sed la alia estis dirinta: «Se ci parolas, ni estos pafmortigataj.» Kaj li silentis pro timo.

Alvenante je la *Courneuve* ili eniris en forlasitan domon por dividi la monon. La divido estis farata honeste kaj aŭdante la belajn monerojn kiuj sonoris sub lia kitelo, pensante pri la korkludoj estontaj, la malgranda Stenne ne plu juĝis sian krimon tiel malbelega. Sed kiam li estis sola, la malfeliĉa infano!, kiam enirinte en la urban pordon la Grandulo forlasis lin, liaj poŝoj fariĝis pezaj kaj la mano kiu premis lian koron ankoraŭ premis ĝin pli forte. Parizo ne ŝajnis plu la sama urbo de antaŭe. La personoj kiuj pasis, ŝajnis rigardi lin severe kvazaŭ ili estis sciintaj de kie li venis. La vorton *spionanto* li aŭdis en la bruo de la radoj, en la batado de la tamburoj. Fine li alvenis ĉe li kaj li estis tre feliĉa vidi ke lia avo ne estis ankoraŭ reirinta. Li supreniris rapide en la dormoĉambron por kaŝi sub sia kapkuseno tiujn monerojn kiuj tiel pezis al li.

Neniaĵo patro Stenne estis tiel bona, tiel gaja kiel en tiu ĉi vespero. Oni ĵus estis ricevinta bonajn novaĵojn de la provinco.

Manĝante, la maljuna soldato rigardis sian pafilon pendigitan sur la muro, kaj li diris al la infano kun bona rido: «He! infano! Kiel rapide ci irus al la Prusoj se ci estus granda!» Proksimume je la oka oni aŭdis la kanonon, «Ĝi estas Aubervilliers, onj batalas al *Bourget*», diris la patro kiu konis ĉiujn fortifikaĵojn.

La malgranda Stenne fariĝis pala kaj pretekste ke li estis lacega, li kuŝiĝis sed ne dormis. La kanono ankoraŭ tondris. Li imagis la *Franco-tireurs* kiuj alvenis nokte por ataki ne atendinte kaj kiuj falis en embuskon. Li memoris la serĝenton kiu estis ridinta je li.

Li vidis lin kuŝantan, tie, en la neĝo kaj multe da aliaj kun li. La prezo de tiu sango kaŝiĝis sub lia kapkuseno kaj estis li, la filo de sinjoro Stenne, de soldato...

Larmoj sufokis lin.

En la ĉambro apuda, li aŭdis sian patron kiu marŝis, kiu malfermis la fenestron.

Sur la placo, bataliono de mobilizatoj estis preta por foriri. Efektive estis vera batalado.

La malfeliĉuleto ne povis haltigi plorĝemon. «Kion do ci havas?», diris la patro Stenne enirante. La infano ne plu povis konservi sian sekreton. Li saltis el la lito kaj jetis sin al la piedoj de sia patro. Pro tiu movo la moneroj rulis teren. «Kio estas tio?», diris la maljunulo tremante. Tiam, senhalte, Steneĉjo rakontis ke li estis irinta ĉe la Prusoj kaj kion li estis farinta tie.

Laŭ tio ke li parolis li sentis sian koron pli libera, tio kvietigis lin. La patro Stenne aŭskultis kun terura vizaĝo, Kiam estis fininta li kaŝis sian kapon en siajn manojn kaj ploris. La infano provis paroli: «Patro! Patro!»,

sed la maljunulo forpuŝis lin ne respondante kaj relevis la monon. «Ĉu estas ĉio?», li demandis. Steneĉjo faris jesan signon. La maljunulo mal-kroĉis sian pafilon, sian kartoĉujon kaj metante la monon en sian poŝon li diris: «Estas bone, mi iras por redoni ĝin al ili.» Kaj ne aldonante unu vorton li malsupreniris kaj enŝovis sin inter la mobilizatoj kiuj foriris en la nokto.

De tiu tempo neniam oni vidis lin!

El «Lundaj Rakontoj», de ALPH. DAUDET
Tradukis: BENJAMINE KAJ YVONNE MIGNON



NOVEMBRO

Jam alvenis aŭtuno; jam venis tiu ĉi melankolia sezono kiu senfoliigas la arbojn, kaj trapasas la terglobo io kvazaŭ senfruktiga bloveto ĉion sekiganta. Jam alvenis la tagoj rememorigantaj nekoniatajn malgajaĵojn, la tagoj malegalaj de la barometraj balanciĝoj, tiuj de flavaj krepuskoj...

Jam la suno el ĝia flameljeta ĉaro direktas la lastajn kaj maloftajn rigardojn sur la mortigantan Naturon...

Jam levigas la nebulo lasante en la branĉplenaj arboj pecoj da sia flirtanta gaso; la melankolia lumo de l' vintra krepusko proksimiĝas rapide, kaj la nigra silueto de la Morto avidege aperas, sendante siajn mortigajn eĥojn sur la florojn, bestojn kaj kreskaĵojn.

La vivo fermas siajn okulojn kiam sin sentas vundita de la novembra ventblovado, kaj restas silenta kaj dormiganta.

Ornamigas la montoj per blankaj tavoloj el neĝo, le verdeco de l' kampoj pereas, la aŭtunaj floroj velkas kaj la birdoj ĉesigas siajn belajn kaj amajn kantaĵojn.

Jam oni ne aŭdas la murmuradon de l' rivereto; ĉio estas envolvita en la mistero, nur resonas la brueto kaŭzita de la sekaj arbaj folioj falantaj sur la malvarman teron kaj similantaj larmoj de l' Naturo.

Tiel estas la Novembra monato ĉe nia klimato. Krepuska vetero, vespera, inter la bela tago de l' somero kaj la malgaja nokto de l' vintro. Monato vere funebra kaj mallumega. Ĝi komenciĝas per tiuj tagoj de animoj en kiuj ĉiuj turnas la rigardon posten por vidi en la vojo de la pasinta tempo la vicon da amataj ombroj kiuj laciĝis vivi, kaj finiĝas, penetrante la malvarmon eĉ en la poŝojn.

Persistega konkuranto de Majo kies floran produktadon ĝi detruas per sia mortiga kiso.

Mi timas ĝin kaj ektremas kaj...

Mi foriras... Tien... Funden...

ARTURO TORNÉ



ANEKDOTO

Viro preterkuras antaŭ Sokrato persekutante iun kaj kriegante :

— Kaptu lin ! Kaptu lin !

La instruanto de Platono restas senmove.

— Ĉu vi estas surda ? Kial vi ne haltigis la mortiginton ?

— Mortiginto ? Kio estas mortiginto, laŭ via opinio ?

— Nu, kia demando ! Mortiginto estas homo, kiu mortigis !

— Buĉisto, do.

— Ĉu vi estas freneza ? Homo, kiu mortigis... alian homon.

— Ha, mi komprenas ! Soldato.

— Ignoranto ! Homo, kiu mortigis iun dum paca tempo.

— Do, mi ja, scias. Ekzekutisto.

— Idioto ! Homo, kiu mortigis iun ĉe li.

— Mi komprenas !... Kuracisto.

Ĉi tion aŭdinte, la alparolanto ne insistas plu kaj foriras malbenante Sokraton.

A. NOVEJARQUE



PROFESORO DRO. SIEGFRIED LEDERER

L'esperantisme, en cosa d'un any, ha sofert greus perdues en les seves rengleres ; i han sigut, els buits que han quedat, d'aquells difícils d'omplir.

Ad els noms de Meray, Foerster, Berthelot, J. W. van der Val, Serdá, Muixí, i altres, avui hem d'afegir-hi 'l prestigiós de Lederer, mort el dia 8 del prop-passat Setembre.

Vegi-s com ne fa la biografia 'l nostre comfrare *Germana Esperantisto*, que es qui toca més de prop la perdua d'aquest cap davanter de la nostra causa.

« El professor Dr. Lederer va néixer, el 30 de Juny de 1861, a Prag. Va estudiar la filologia classica, i 's va llicenciar de professor a la seva ciutat natal ; carrec que ha vingut desempenyant fins a la seva mort.

Apart d'això, era director científic de la *Prager Deutsche Urania* i redactor del *Stereoskopisches Museum*. Feia molts anys que s'ocupava de llengües modernes : a la coneguda « Biblioteca Universal de Reclam », avia publicat diferents traduccions (Castelnuova, Neera, Marc Monnier, etc., etc.)

També, com escriptor original, avia publicat algunes interessants obres, amb bastant d'èxit.

Emperò feia més de vint anys que venia dedicant-se a les llengües artificials. Ell fou un dels primers *volapükistes*, i edità durant quatre anys (1889-1892), en alemany i volapük, la revista *Zi vol lölik* (*Al voltant del món*), la qual havia assolit el nombre de quatre mil subscriptors. Apart d'algunes obres referents al volapük, avia publicat també algunes traduccions en aquesta llengua, entre elles la de la gran obra del príncep austriac Rodolf *Eine Orientreise*. Emperò, veient que 'l volapük no tenia èxit, va deixar les llengües artificials i col·laborà, per indicació del ministre d'Instrucció pública d'Austria, en el gran diccionari *Thesaurus linguae latinae*, el qual durant molts anys va absorbir totes les seves energies.

Després de complert tant gran treball, estudià l'Esperanto, i desseguida es convencé, com ell deia, que la genial creació de Zamenhof obtindria lo que 'l volapük no conseguí. Per això ell se decidí, amb totes les seves forces i la seva experiència, guanyada durant un feix d'anys, a la propaganda i evolució de l'Esperanto. Això 'u féu amb una gran persistència, i molts són els fruits del seu treball per a la nostra llengua. Féu discursos, fundà societats esperantistes, i, sobre tot, la seva ploma sempre va estar disposta a favor de l'Esperanto. Va treballar en el *Diccionari alemany-esperanto* i en el *Diccionari científic esperantista*. A més, traduí de la llengua danesa l'obra d'Andersen *Bildolibro sen bildoj*, que després edità. La seva última obra es *Sufero*, de Carmen Sylva, que, traduïda desde l'original alemany, publicà junt amb sis altres traduccions en diverses llengües fetes de la seva traducció esperanto.

Desde 'l començament de l'any 1909 col·laborà a la revista *Universo*, i pel Novembre del mateix any va fundar, junt amb el Dr. A. Schram, de Dresde, la revista alemanya-esperantista *Rund um die Welt* (*Al voltant del món*), la qual es molt agradable com instrument de propaganda.

Molt treball ha dedicat, principalment, a traduccions desde diverses llengües a l'Esperanto, les quals publicava a la secció *Esperanto kiel interpretilo*.

Altre gran treball portà a cap, durant els dos últims anys, en la confecció i redacció de l'*Esperantista Poŝkalendaro*, esforçant-se sempre en que 'l contingut fos interessant i fidel.

Actualment ja no existeix aquest home que féu a l'esperantisme inoblidables serveis. La seva última i gran idea fou la creació d'un fons monetari de 100.000 marcs per a la propaganda de l'Esperanto a Alemanya...»

Rebin els nostres companys de causa alemanys, i l'esperantisme en general, les nostres més sinceres condolences.



ENLANDA MOVADO

BARCELONO

Jurnala propagando. — Rekomencinte la tagon 21^{an} de Septembro, *La Publicidad*, denove enhavas ĉiujfaŭde Esperantan fakon. En la granda ĉiutaga ĵurnalo el Barcelono, *Las Noticias*, aperis ses artikoloj, pri la *Sepa*, verkitaj de Delfi Dalmau, kiuj estis gravaj propagandiloj por nia kara celo. La numeroj de *Las Noticias* enhavantaj tiujn artikolojn estas la datitaj 22^a kaj 25^a Aŭgusto kaj 3^a, 7^a, 16^a kaj 25^a Septembro. Ankaŭ publikigis samspecajn artikolojn *El Poble Català*, *La Actualidad* kaj *Diario del Comercio*, kiujn verkis J. B. M. (Jacinte Bremón Masgrau).

Ĉu ne estus bone ke vi ĉiuj, karaj gesamideanoj, sendu, tia okaze, letaron aŭ poŝtkarton al la respektiva direkcio de tiuj ĵurnaloj, dirante, por ekzemplo, ke ĉar Esperanto estas hodiaŭ tre interese, vi esperas ke tia ĵurnalo ofte publikigos Esperantajn notojn kaj informojn kaj ke en tiu espero vi restas al la ĵurnalo tre dankema pro la ĵus publikigitaj tiaj informoj, sciigojn, notoj aŭ artikoloj? Do, faru tion ĉiam!

Ekskursoj. — La 3^{an} Septembro, la grupo «Supren!» okazigis ekskurson, kiu vere sukcesis la pitoreska kaj historia kastelo d'Aramprunyà.

La sama grupo organizis alian ekskurson al kastelo de Sant Pere, kie ili lokis memorajon. Tiu ĉi estis, por solenigi la duan datrevenon de la «Kvina» kaj tial kelkaj geekskursanoj faris paroladojn. Ili revenis Barcelonon kun vera kontento pro sia ĵusa altcela, kaj amuza ago.

Festuo ĉe «Barcelona Stelo». — La ĵus pasintan 16^{an} okazigis tiu grupo, belan feston kiel inauguracion de bela nova Flago. Tre bone Esperante ornamita estis la granda salono, kie ĝi havis lokon kaj tre multe ĝi estis ĉeestata.

Legis poeziojn aŭ ludis fortepiane gefraŭloj J. Rey, M. Reig, D. Sulé, A. Delclos, M. Rey, R. Cortés, N. Reig, A. Cruz, J. Delclós kaj C. Puig. Oni alligis sur la flagon, bele broditan banton donacitan de Fino. Marina Reig. Sro. J. Gili legis dankan paroladon, kaj Sro. J. Grau eldiris elokventan paroladon, pri la simboleco de la flago, en Esperanto, kaj en Kataluna lingvo li faris konvinkan paroladon pri nia kara afero. Ĉiuj gepartoprenintoj estis ege aplaŭdataj.

Tiu ĉarma festo finiĝis per granda balo kiu multe amuzis la gefraŭlojn.

Projekto. — La 29^{an} Septembro kunvenis ĉe «Semo» (Ateneu Enciclopedic Popular) gesamideanoj kelkaj.

Nombre pli-malpli 30 ili kunsidis kaj laboris fruktodone, kaj tiel ili laboris ĉar ili ĉiuj estis sufiĉe fortaj venki ĉian individualismon — i aŭesta forĉa ja savem tots lo miraculosa que es entre 'ls catalans. — Ĉio estis interkonsentata unuanime. Tial la entuziasmo fariĝis plena konvinkigo pri la sukceso de granda projekto.

Jen, do, kiel bona estis la komenco, la unua paŝo. la plej malfacila paŝo! Nur mankas, nun, konstanta bonvolo por trairi la vojeton, kaj, ĉar jam estas vidata bonegaĵo ĉe la fino, tia vidaĵo ja havigos ĉiam pli intensa la konstantan bonvolon.

Unuigo. — Niaj gesamideanoj en la kvartalo Barceloneta grupiĝis ĉiuj en apartan solan grupon Esperantistan. — Bona ekzemplo!

Ili jam anoncas propagandan spektaklon kiel inaŭguracion. — Ĉiam antaŭen!

Novaj kursoj. — La grupoj «La Rondo», «Supren!», «Barcelona Stelo», «Verda Studejo», «Semo», «Geesperantistaro», k. a. jam komencis novajn kursojn de nia kara internacia lingvo, kiuj estas tre ĉeestataj.

Bona propagando. — La konstante laboranta grupo «Semo» de l'«Ateneu Enciclopedic Popular» (strato Carme, 30), eldonis foliojn enhavantajn la opiniojn favorajn pri nia afero, de la eminentuloj Francisco Pi i Margall, Elisée Réclus, Tolstoj, Max Müller kaj Grafo Hayashi, en kastila lingvo.

Ni kore rekomendas la disdonadon de tiuj folioj. — *La Delegito.*

Espero Kataluna. — Tiu ĉi societo inaŭguraciis siajn esperantajn vendredojn per sercio de paroladoj pri la 7^a.

Sro. Bremón klarigis en du paroladoj al multenombra ĉeestantaro, la vojaĝon de la kataluna karavano al Antverpeno, kaj raportis tre detale pri la aktoj okazintaj dum la esperanta semajno en la urbo de la sepa.

Sro. Urbez (la trafa ludinto de Patro Knap) parolis pri la muzeoj de Belgujo kaj Holandujo, skizante la vivon kaj verkojn de la ĉefaj pentristoj de la flandra skolo, Rubens kaj Rembrant.

Sro. Sabadell preparolis la temon *Ekskurso tra Holandujo kaj vojaĝo al insulo Marken*. Ĉiu estis tre aplaŭdita, kaj la ĉeestintoj al la 7^a ĝoje rememoris okaze de tiuj paroladoj, la agrablajn momentojn pasigitajn en tiuj Nordaj Landoj.

TARRAGONA

En tiu ĉi urbo ekkomencas flori la semo de nia II^a Kongreso, ĉar Esperanto vekis grandan intereson inter la tarragonanoj, kiuj ĉiutage pretiĝas enskribis en la nomaron de niaj kunbatalantoj kaj deziras lerni nian internacian lingvon.

La tiea grupo aranĝas aktivan agadon por Esperanto en la ĉirkaŭaj vilaĝoj pere propagandaj ekskursoj, konferencoj, gazetartikoloj, k. t. p.

«Tarragono Esperanta» malfermis la 1^{an} de Oktobro du novajn kursojn klarigitajn de nia samideano Sro. Daniel Roig.

TERRASSA

Ĉe la societo «Casino del Comercio» okazis granda festo okaze la malfermo de la novaj esperantaj kursoj organizitaj de «Lumon».

Post la malferma parolado de la prezidanto de «Lumon» kiu gratulis al la multenombra ĉeestantaro pro ĝia ĉeesto, parolis Sroj. Lluis Martí, Martí Peig, Marian Solà, Josep Girona, Santandreu, Garriga, Fino: Gertrudis Cantarell, Joan Camps, Albert Oliart, Josep Casanova kaj nia senlaca amiko Delfi Dalmau.

Fine estis ludita la komedieto *Esperanto Praktika*.

SABADELL

La societoj «Lumon», el Terrasa, «Katolika Stelo», «Esperanta Semo» kaj «Aplec Esperanta Grupo», el Sabadell, invitis ĉiujn aliajn societojn esperantajn de la Valles'a regiono (comarca del Vallès) por la organizo de granda festo kiu okazos en la kamparo. La delegitoj de ĉi tiuj societoj kunvenis en Sabadell la tagon 29^{an} Oktobro por difini la daton kaj lokon en kiuj okazos la nomita festo. — *La Delegito*.

VILANOVA I GELTRU

La enketo kiu okazis inter la geanoj de nia societo dum la pasinta monato estis sukcesplena. Kvindek tri devizoj estis prezentitaj al la juĝantaro kiu decidis doni la unuan premion al la devizo

«Laboru esperante
Esperu laborante»

kiu de nun estos la devizo de nia grupo «Laboro Esperanta».

La juĝantaro tre kuraĝigis la premiitojn pro sia laboro kaj dankis al ĉiuj pro la klopodo de nia agado.

La 1^{an} de Oktobro oni ekkomencis novajn kursojn ĉe la societo «Ateneo». — *La Delegito*.

MANLLEU

La grupo «Esperantista Amikeco» varbas multe de esperantistoj, ĉar ni ĵus finis kurson per kiu oni esperantigis dekok junulojn, kaj tuje ekkomencis alian en kiu ĉeestas dudek ses lernantoj.

La nombro de kun societanoj altiĝis ĝis sepdek ok. — *E. A.*

SANT FELIU DE GUIXOLS

La Esperanta Societo «Frateco» elektis la jenan novan komitaton:

Prezidanto, Sro. Pere Campistol; Vic-prezidanto, Sro. Joaquim Casanovas; Sekretario, Sro. Josep Blanch Vendrell; Vic-sekretario, Sro. Narcís Soler; Kasisto, Sro. Rosendo Reixach; Voĉ-donantoj, Sroj. Tomàs Torruella kaj Joan Cots kaj Finoj. Dolors Garbera kaj Dolors Vilaseca.

Ankaŭ tiu Societo malfermis Esperantan kurson la 1^{an} de tiu ĉi monato.

La sama Societo gratulis, per telegramo, al la Ministro de Publika Instruado pro la Reĝa Dekreto kiu permesas la Esperantan instruadon en publikaj lernejoj. — *La Delegito*.



PALAFRUGELL. — II^a. GERONPROVINCA ASAMBLEO
GRUPOJ DE JUNAJ SAMIDEANOJ

PALAFRUGELL

En tiu ĉi urbo okazis en la tagoj 13-14^a Aŭgusto la II^a Geronprovinca Asambleo.

En ĝi partoprenis samideanoj el Girona, La Escala, Banyoles, Sant Feliu de Guixols, Santa Coloma de Farnés, kaj aliaj.

Krom la labora kunveno okazis teatra reprezentado de *Georgo Dandin* kaj *Pipamanto*, de nia kara amiko Pujulà, vizito al diversaj fabrikoj el la urbo, oficiala festeno, ekskurso al la marbordoj Llafranc kaj balo.

La entuziasmo vekita en ĉiuj estis granda, kaj la propagando por nia afero sukcesplena. — *La Delegito*.

VENDRELL

Dum la monato Aŭgusto okazis propaganda ekskurso al Vilanova i Geltrú por viziti la tieajn gesamideanojn kiuj nin akceptis korege.

Kune ni vizitis la sidejojn de la societoj «Orfeo» kaj «Ateneo» en kies salonoj nia samideano Sro. Escofet paroladis pri Esperanto. Multe plaĉis al ni la sidejoj de la nomitaj societoj ĉar ili montras al la vizitantoj ke en ili loĝas veraj kulturamantoj.

La grupo «Laboro Esperanta» nin regalis per luksa festeno, kaj en la fino oni kantis nian belan himnon *La Espero*.

En kunveno ĝenerala estis nomita la nova komitato de la grupo «Frateco» jene: Prezidanto, Salvador Urpi; Sekretario, Salvador Martorell; Kasisto, Salvador Gual; Voĉdonantoj, Anton Aymerich kaj Josep M.^a Gálvez. — *La Delegito*.

OLOT

La tagon 27^a de Aŭgusto okazis festeno pro la adiaŭo al nia karega amiko Sro. Josep Pi, kiu estis devigata vojaĝi al Germanujo.

La foriro de nia senlaca amiko ĉagrenis nin tiel, ke dum kelkaj tagoj estis la temo devigata de niaj konversacioj, ĉar ni devas rememori, ke Sro. Pi, ĉiam estis preta por propagandi nian aferon, ne nur morale sed ankaŭ materiale.

Dum la festeno regis la gajeco kaj spriteco propraj de ĉi tiuj okazoj, kaj post la toastoj de kelkaj kunmangantoj, parolis nia amiko kiu per kortuŝantaj vortoj dankis la nemerititan honoron, kaj rekomendis al ĉiuj ke neniam lasu nian aferon, ĉar ĝi estas sankta.

Ni tutkore deziras al li la necesan bonfarton kaj ŝancon por venki en sia entrepreno en la germana lando.

Dum la ĉefa festo de nia urbo, vizitis nian sidejon kelkaj samideanoj el Vic, Banyoles kaj Girona, kaj pro tio oni organizis festeton en kiu partoprenis Fino. Pratdesaba, el Vic, rekomendante al ĉiu la ĉeesto al la III^a Kongreso de K. E. F., kiu okazos en tiu urbo.



DIVERSAJ NOTOJ

ALIA URBO ESPERANTIGITA

Al ĉiuj Esperantistoj kiuj deziras ian ajn informon pri urbo Tacoma au ĝia ĉirkaŭaĵo nia komerca klubo estas nun preta respondi en Esperanto. Ni esperas ke ĉiuj interesataj prenos ĉi tiun okazon por informigi sin pri la vasta kaj mirinda Okcidento. La Okcidento estas la estonta lando; Washington estas la ŝtato de promeso, kaj senhezite ni povas rekomendi Tacoma, kiel la plej belegan kaj la plej allogan urbon en nia ŝtato. Ĝi estas moderna urbo kun pli ol 100,000 loĝantoj. Ĝia alloga ĉirkaŭaĵo, ĝia milda klimato, ĝia beleco kaj pureco igas ĝin ideala urbo por la hejmsercanto. Ke tio estas fakto atestas la ĉeesto en nia urbo de multe da progresemaj alilanduloj. Skribu hodiaŭ al «Commercial Club», Tacoma, Washington, U. S. A.

ESPERANTO EN LA OFICIALAJ LERNEJOJ DE HISPANUJO

Por ke la homoj kiuj diras ke Esperanto ne triumfos ĝis kiam la registaroj oficiale metas ĝin en la unuagradaj kaj sekve al Universitatoj, Gimnazioj, Normalaj Lernejoj, k. t. p. ekkontentiĝu, ni ĉerpas paragrafon el *Gaceta de Madrid* (15^a Aŭgusto).

«La oficiala enkonduko de tiu instruado estus tro frua; sed ne vidas la konsilantaro malfacilaĵon kontraŭstaran, por ke oni permesu la klarigadon de kursoj de tiu lingvo ĉe la oficialaj instruadaj institucioj per profesoroj montritaj de la esperantistaj societoj, kaj por ke oni konstatiĝu kiel oficialan meriton, diplomon pro sukceso ĉe ĝia lernado.

Tia permeso estas donota de la respondaj Rektoroj, al kiuj oni submetos la proponon pri profesoro.»

LETERO AL ĈIUJ INSTRUANTOJ DE ESPERANTO!

Preskaŭ ĉiu instruanto de nia lingvo bedaŭrinde spertas, ke je la fino de la kursa instruado nur restas malgranda nombro da gefervoruloj. La aliaj forlasas la lernadon tuj post apero de eĉ malgrandaj malfacilaĵoj. Ke ĉi tiu fakto ne estas bona propagandilo por ni, ĉiu devas atesti! La foririntoj kompreneble ne kulpigas sin mem, aŭ siajn proprajn malpaciencon kaj senkapablon, sed — ili riproĉas al nia lingvo malfacilegecon, eĉ maltaŭgon: Tio prokrastas kaj malhelpas la disvastigaĉon de Esperanto. Ĉi tiu plendinda vero postulas tujan kontraŭlaboron.

La unua devo estas. esplori la kaŭzon de la danĝera malbono. Jen — mia opinio, eble jam ofte dirita de aliaj samideanoj, sed ĉiam insiste repetinda.

La multenombro ne scias sufiĉe bone la gramatikan regularon de la gepatra lingvo. Pro tio ili ne ekkaptas la klarigojn donitajn de la instruanto. Ili ne povas ekzerci kaj lerni per nacilingvaj ekzemploj, ĉar ili ne konas la esencon de la rilata lingva regularo.

Estas konata fakto, ke ĝenerale dum la lerneja tempo nur escepte la fako «Gramatiko» estas ŝatata de la lernantoj. Tio kaŭzas domaĝon al la plenaĝa homo. Dum la ordinara ĉiutaga vivo li eble ne rimarkas tiel grave la efikon de la iama malatenteco, sed kiam li intencas lerni fremdan lingvon, la juneca peko ĝenas multe la bonvolon.

Malgraŭ Esperanto estas multe pli facile lernebla ol ia nacia lingvo, ĝi tamen postulas laboron kaj bonvolan fervoron. Pro tio mi proponas al la instruantoj aŭ instruistoj, kaj ankaŭ al ĉiuj ĝelernantoj, ke ili, antaŭ la komenco de la esperanta instruado ekzameni kaj ripetu la regularon de sia gepatra lingvo. Oni ja bezonas sian gepatran lingvon pro elekto de ekzemploj, pro ekzercado. Sekve — oni devas atentigi la ĝelernantaron pri la nepra graveco de la pritraktita fakto.

Mi certe kredas, ke la akcepto de la propono, ekzameni kaj perfektigi la partoprenantojn de esperantaj kursoj en la rilata gepatra lingvo je la instruada komenco, aŭ je komenco de ĉiu leciono, garantios plej intensan sukceson. Mi signifas tiun ĉi faktan kiel tre gravan faktoron, kies atentado estonte helpas la plej potencon progresadon de nia Esperanto!

Por pripensado kaj ankaŭ por plej bonaj proponoj antaŭdankema, salutas la ĝesamideanojn

Gertrude Jalobi-Chernitz



KORESPONDADO

Sro. M. S. : Bonvolu sciigi al ni la aŭtoron kaj lingvon el kiu vi tradukis *La Hirundo'n* kaj en kiu libro aŭ gazeto ĝi aperis. Ni ne opinias dece kaŝi la nomon de l' aŭtoro.

Sroj. Delegitoj kaj Subdelegitoj : Dum la Decembra monato vi ricevos oficialan skribajon kajtigantan vian delegitecon por la jaro 1912^a: se iu el vi ne ĝin ricevas bonvolu peti ĝin de ni.

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

12. strato Gracia. — SABADELL

BARCELONO-HISPANUJO

AVIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezone la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.

NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO »

ENHAVO : *Resumo*, La Redakcio de K. E. — *En honor d'en Seydà*, Varios. *Examens*, K. E. — *Penso*, *Kuriozaĵo*, *Spritaĵo*, Angel Novejarque. — *Humoraĵoj*, P. A. A. — *Funebra parolado*, Horace M. Stephens. — *Mi scias kanton...*, Joseph Ventura. — *Letra als senyors Redactors del «Kataluna Esperantisto»*, Fred. Pujulà. — *Oficiala Parto*, K. E. F. — *Enlanda Movado*, Delfi Dalmau kaj K. E. — *Bibliografio*, K. E.

RESUMO

Du jaroj pasis de post kiam, ni aperis por la unua fojo, kaj eĉ riskante ŝajni malmodestaj ni konfesas, ke ni ne estas malkontentaj por nia laboro. Paŝo post paŝo, laŭ la ritmo proponita de nia majstro, ni antaŭeniris tra la vojo de la malfacilaĵoj ofte kun ĉagreno en la koro, tamen neniam perdante la konvinkon pri la fina venko, neniam flankigante por ripozi. Ĝi ne estas persona merito nia; ĝi estas simpla rezultaĵo de la ĉies kunhelpo, de la ĉies volo, de la ĉies entuziasmo por nia morala unuiĝo.

Ĉar en nia lando oni ne tre bone komprenas la ekziston de estaĵoj, kiuj ne sin montras per korpa materia formo, la ideo de Federacio devis insiste bati kiel bormaŝino por eniĝi en la rokon de la malmoliginta kutimo. Sed la tunelo nun estas borita kaj senriska larĝa vojo permesas nun la pason de vivfluo de nia reala lando al la lando de la idealo. Ni memoras, ke antaŭ kelkaj jaroj, kiam nia Deputitaro kreis la Katalunan Universitaton, la ĵurnalistoj senditaj de Madrido por fari enketon rapidis telegrafi pri la neekzisto de tia Universitato. Ili trakuris la centrajn kaj eksterajn kvartalojn de Barcelono kaj

nenie al ili sin montris la majesta fiera konstruaĵo. Oni tre longe ŝercis pri la kataluna parademo. Tamen en Ateneo, en tiu aŭ alia pli-malpli grava societejo, en la Palaco de la Deputitaro mem, eminentaj profesoroj klarigadis la teoriojn laŭ plano tre metode antaŭdifinita. Oni ne komprenis tiam, ke Universitato ne estas arkitektura aranĝo de kuncementitaj ŝtonoj sed metoda organizado de intelektaj fortoj celanta pliperfektigon de la individuaj fakultoj kaj de la sociaj entreprenoj. Tiel la ekzisto de nia Federacio estis same neita kaj nur iom post iom oni komprenadis ke ĝi ne estas apartemento kun gardisto kaj tabloj por trinki kafon, nek flago kun aparta signo, nek marko pli-malpli bele desegnita; oni komprenadis ke ĝi ne nepre devas loĝi en certa nek en la ĉefa urbo, kaj oni bone sentadis, ke Federacio, estas la metoda, logika, natura organizado de niaj esperantistaj fortoj celanta pli grandan fratecon de niaj samlandanoj, pli facilajn internaciajn rilatojn kun alilandaj Asocioj kaj pli rapidan atingon de nia komuna venko. Kelkajn jarojn ni bezonis por la plena disvastigo de tiu kompreno, kaj estas por ni ĝojo povi konstati ĝin je la fino de la dua jaro post nia apero.

Por lanĉi ŝipon necese estas kunigi samtempe la fortojn de ĉiu maristo. Se dum unu tiras ŝnuron la alia trenas lignaĵon kaj la alia ŝultropuŝas maston, la ŝipo restos longatempe en sulko de l' sablejo klinita sur la flanko, dum la bonfara vento moke frizos kaj tremetigos la surfacon de la maro flugante malproksimen. Sed nur ili tiru kune per sama samtempa movo kaj tuj la ŝipo fendos la fluidaĵon kaj transportos la vivon kaj riĉaĵojn tra la mondo. Oni tion komprenis, kaj oni komprenis ankaŭ, ke se unu sola voĉo devas fari la inviton al la movo, tiu movo nur estos ritma, unueca, taŭga kaj profita se la akompana kanto eliĝas el la buŝo de ĉiuj ŝipanoj. Tial venis siatempe la decido de nia II^a Kongreso kreante la Konsultan Komision de Prezidantoj de Grupoj aliĝintaj al nia Asocio. Tial venos iom post iom novaj perfektaĵoj, kaj tiel nia forto povos esti utile profitita en la internacia movo iniciita en la V^a Internacia Kongreso de Barcelono kaj plene organizota en Antverpeno.

Ni ne ŝparu ian ajn aferon de nia individueco por ke la veloj de nia ŝipo ŝvelu per la favora vento kaj niaj riĉaĵoj de espero disvastiĝu tra la tuta mondo.

* * *

Esperu ni, ke la proksima jaro kiel la nuna tiel estos fruktoporta por nia afero, sed ke ne tiel multekoste ĝi pagigos la alportotajn feliĉojn. Esperu ni, ke niaj vicoj ne konstatos ankoraŭ kun doloro la mankon de fervoraj batalantoj! La morto pioĉis sur la kampon de

l' juneco. Al fraŭlino Bacardi, fratino de nia kara samnoma amiko, sekvis pastro Muixí, sekvis Domenech Serdà.

Ni ilin memoru kaj ilin honoru laboradante por nia sankta afero. Ni ĉerpu el nia ĉagreno novajn fortojn, por alkonduki al la venko la lingvon, kiun ankaŭ ili parolis!

* * *

Nia revuo, kiu estas la voĉportilo de niaj komunaj deziroj, la diskonigilo de la agado de niaj aliurbaj samideanoj, la alproksimigilo de niaj individuaj sentoj; nia komuna laborado, kiu pliefikigos per metodo kaj kunigo de fortoj la propagandadon de nia afero; niaj apartaj organizaĵoj, kiel la Havena Komisiono, kiu semos senhalte apud la fremdulojn; nia ĉiujara Literatura Konkurso, kiu incitos pli kaj pli al la ellernado de nia lingvo kaj kiu donos al ni perfektajn tradukojn de la naciaj verkoj kaj riĉigos per originaloj nian floro-plenan literaturon; la harmonio inter ni kun la konvinko per la fakto, ke ĉe la pordo de la kastleto, kiun ni defendas, ni devas lasi la armilojn per kiuj ni nin vundas reciproke en la socia vivo; ĉiuj tiuj aferoj nur estis atingebla de Federacio; neniam izolitaj en grupoj sen rilato inter ili ni estus atingintaj tiajn bonojn. Sed, eĉ kiam Federacio ne devus alporti ilin al ni, sufiĉus, por ke ni restu ĝiaj fervoraj defendantoj pensi pri la Kongreso, kiu kunigante nin ĉiujn unu fojon ĉiujare en la urboj katalunaj ebligos al ni fari grandan manifestacion de nia povo kaj altiri al ni tutan urbon, kiel okazis en Sabadell unue, poste en Tarragona kaj okazos kun pli da efiko en la Kongresurbo de la nuna jaro.

Nur per Federacio tio estis ebla. Sed Federacio ne estas abstraktaĵo; ĝi estas realaĵo; ĝi estas ĉiuj ni. Ĝia forto dependas de nia forto. Ju pli ĝi estos potenca, des pli ni valoros en la socia movado de nia lando; sed page al tiu plivalorigo ni devas doni nian personan laboron. Nia III^a Kongreso estos la multiplikita rezultaĵo de niaj penoj, sed ni devas alporti almenaŭ niajn penojn mem. Unu izolita guto povas eĉ havi la ŝajnon de riĉa stono; milionoj da izolitaj gutoj malaperos kun ilia beleco ĉe la varmo de la unuaj sunradioj tute same, kiel unu sola; sed milionoj da gutoj *grupiĝintaj* estos samtempe forto, movo, vivo kaj beleco: «maro estas gutaro».

Ni laboru, karaj kunfederacianoj; ni preparu kaj sendu jam de nun la diskutotajn projektojn por plibonigi nian organizaĵon; ni antaŭdiskutu jam ilin en la apartaj grupoj por inciti la fajron de niaj amoj; ni ne atendu la lastajn momentojn por verki la versaĵojn kaj prozaĵojn, kiuj aspiras al la premioj por originalaj verkoj de nia Literatura Konkurso; ni pretiĝu korekte traduki la tekstojn, kiujn

baldaŭ diskonigos la juĝantaro de la Konkurso, kaj la grupoj riĉaj kaj la fervoraj samideanoj, kiuj jam la lasta jaro proponis apartajn premiojn, proponu ilin de nun ne atendante la lastajn momentojn kaj permesante al la verkistoj pli seriozan laboradon, kaj al ni mem pli ĝeneralan inviton.

Ni ĉiuj estas la Federacio. Ni ne forgesu nin mem.

* * *

Ni tre dankas sinjoron R. Whitaker pro la afabla letero, kiun li sendis al ni okaze de la raporto de KATALUNA ESPERANTISTO pri la Kongreso de Tarragono.

* * *

Ni dankas la redakcion de *La Propagandisto* pro tio, ke ĝi bonvolis reprodukti nian raporton pri la laboroj de la Havena Komisiono. Certe ĝia disvastigado kontribuos al la rapida starigo de tiu organizaĵo, de kiu ni tiom multe esperas.

* * *

Kiam oni skribis per anseraj plumoj, oni povis postuli de literaturistoj konon pri ĉiu publicita verko; sed nun, kiam oni ne nur skribas per skribmaŝino, sed per maŝinoj oni kompostas, presas, bindas kaj eĉ disvendas, kaj la nombron de ĉiutage aperantaj verkoj oni kalkulas po miloj, estas tute neeble eĉ scii la titolojn de unu kvarono de libroj aperintaj en unu sola lando. Ni devas atendi por havi ĝeneralan konon pri tio, la elpenson de oportunaj legmaŝino kaj memormaŝino.

Ni diras tion, ĉar ni ricevis leteron per kiu kara kunfederaciano nia rimarkigas nin, ke la artikolo *Ĉiela peco* aperinta en K. E. (paĝo 323^a) similas, kiel ovo ovon, la versaĵon *Dins sa cambra*, de nia fama poeto Maragall, aperinta en la verko *Les Disperses* (paĝo 7^a, Biblioteko *Joventut*), kaj nia korespondinto iom kulpigas nin pri tiu malatento.

Efektive, krom tio, ke *Ĉiela peco* estas proze verkita, ĝi estas preskaŭ laŭvorta traduko de la bela juneca verspeco de l' aŭtoro de *La Vaca Cega*, kiun niaj alilandaj legantoj konas per la majstra traduko de nia samideano Sro. Inglada. Ni respondas pri la beleco de la temo, sed, ĉu ni povas respondi pri la delikateco de ĉiuj? Cetere, la verkaĵojn subskribitajn de samideanoj, kiujn ni konas, ni publicas lasante al ili la respondecon pri la originaleco; kaj ni estas certaj, ke en la nuna okazo, nur estas simpla forgeso de la tradukinto citi la veran aŭtoron.

Ni profitas la okazon por peti niajn afablajn kunlaborantojn ne fali en tiajn forgesojn.

* * *

Akceptinte la deziron de la Komitato de «K. E. F.» kiu en kunsido de la 6^a Aŭgusto decidis proponi al Sro. Fred. Pujulà la direktan lokon de KATALUNA ESPERANTISTO, nia kara amiko zorgos oficiale de post la venonta numero pri la redaktado de nia revuo.

LA REDAKCIO DE K. E.



EN HONOR D'EN SERDÀ

EL dia 29 de Juny tinguerem la dissort de perdre per a sempre més el nostre fervorós amic, i propagador esperantista, Dome-nech Serdà Simó. A l'amic que amb fe creixent esmerçà tots els seus entusiasmes per a l'avenç i divulgació de la llengua internacional; a l'apostol que inicià i, mercès a la seva activitat, portà a terme la constitució i organització de la cada dia més floreixent «Federació Catalana d'Esperantistes»; es precis onorar-lo amb quelcom que perpetui la seva memoria i sigui a l'ensems una prova de la seva activitat.

Per a realitzar-ho, els seus nombrosos amics han pensat en recollir curiosament els treballs ineditats que deixà (ja traduccions, ja originals) per a fer-ne un llibre que, si l'autor visqués, seria per a ell un repic de glòria, i que avui nosaltres llegirem i guardarem com un piadós record i un merescut omenatge.

Cridem, doncs, a tots els que desitgin contribuir-hi amb l'adquisició del llibre, per a que se serveixin donar-ne coneixement, per postal, a l'administrador de «K. E. F.», a fi de començar els treballs necessaris, puix s'ha d'entendre que dit llibre no serà posat a la venda pública, sinó que solament serà per als lectors que per endavant l'agin encarregat.

Dels detalls de preu, format, sumari, i demés ne donarem compte en números successius: avui solament podem dir que el recull serà fet amb tota cura, encarregant-sen un dels nostres millors literats; i també que anirà avalat amb la firma de prestigiosos esperantistes.

No dubtem que la nostra intenció serà ben compresa, i que tot-om procurarà portar el seu obol ad aquesta obra, per a que així l'omenatge sigui de tots,

J. Amades, J. Bremón Masgrau, D. Dalmau, A. Martí, S. Mas, E. Pellicer, J. Piferrer, J. Planas Sadurní, pbr., S. Puigbonet, F. Pujulà, J. Rosals, P. Ustrell.



EXAMENS

S'HA rebut en la secretaria de la Federació la petició de varis esperantistes, qui atenentse al Reglament aprobat en el 2.^{on} Congrés de Tarragona, desitjen examinar-se pera adquirir el títol de professor de Esperanto. Com que 'l tribunal d'examens, constituït pels senyors Bremón, Pujulà y Rosals, no podrà reunir-se fins que 'ls candidats sien al menys en nombre de 10, ho fem avinent a tots els qui 'l passat istiu volien examinar-se, pera que s'apressin a fer la petició y contribueixin a la prompta organització del nostre professorat, qui ha de començar nous cursos per Janer, y fer factible la aplicació de la darrera Real ordre, concernent al Esperanto, en els establiments oficials d'ensenyança.

Véginse les decisions del Congrés de Tarragona referentes a les condicions de matricula. S'adressin les peticions, a la Secretaria de la K. E. F. — Sabadell, Carrer Gracia, 12.

Els senyors qui professaren cursos l'any passat son pregats d'aconcillar a llurs exdeixebles l'adquisició del diploma de *lernado* donan los les instruccions necessaries pera 'l mellor exit de llurs examens. Sembla que s tracta d'instituir premis otorgats per concurs entre 'ls deixebles qui hagin obtingut aquest diploma.

K. E.



PENSO
el Trueba

«La floro el la fruktarboj estas tre feliĉa patrino, ĉar ĝi ne mortas, ĝis kiam siaj *idoj* ne estas grandetaj.»

* * *

KURIOZAĴO

Triono de la mondanoj parolas la finan lingvon.

* * *

SPRITAĴO

FILOSOFIA OPINIO

Oni parolas pri la edziĝeco kaj unu el la interparolantoj estas demandita pri la kialo de lia needziĝemo.

Li respondas:

— Ĉar se la virino, kiu kun mi devos kunvivi estas bona, mi devas ŝin peti; se ŝi estas malbona, ŝin suferi; se ŝi estas malriĉa, ŝin nutradi; se ŝi estas riĉa, ŝin toleri; se ŝi estas malbela, ŝin malami, kaj se ŝi estas bela, ŝin atentgardi.

ANGEL NOVEJARQUE, el Valencio

HUMORAĴOJ

— Diru al mi, kion signifas tiu ĉi enskriko : « English spoken here » kiun oni legas sur tiu ĉi vitra meblo.

— Tio ĉi signifas : Tie ĉi oni parolas angle.

— Ni ne eniru do, ĉar neniu el ni scias paroli tiun lingvon.

* * *

Antaŭ la juĝistaro en la 2^a de Januaro :

La prezidanto : — Kiel, ĉu alia foje ĉi tie?

La procesito : — Sinjoro prezidanto : mi ne volis preterlasi la okazon gratuli vin pro la nova jaro.

* * *

Oni parolas ĉe la pordistino pri la juna deksexjara Zizi. Ĉiu esprimas sian opinion pri ŝia karaktero.

— Mi konas bone fraŭlinon Zizi, — diras la loĝanto de la unua etaĝo. — Ŝi ĉiam parolas, ne lasante paroli la aliajn. Ŝia emo estas klarega. Estas necese okupi ŝin ĉe la telefonoficejo.

* * *

Johano, kiu aspiras la gloron, vivadas melankolie.

— Kuraĝo! unu el liaj amikoj diras al li; daŭrigu la aĝadon... vi atingos esti glora homo

Jen la respondo de Johano al sia amiko:

— Glora homo! Pro mia malbona sorto, se mi atingus la gloron, neniu sciус ĝin!

* * *

Milionulo pekema, kiu estas mortante, demandas la pastron, kiu estas apud li:

— Ĉu vi opinias ke se mi donacus al la preĝejo 30,000 durojn mi resaniĝus?

La pastro respondis al li:

— Mi ne certigas al vi tion; tamen, estus bona se vi provos.

* * *

Ĉe la restoracio:

— Kia malrapideco kelnero! Kial vi ne portis al mi ankoraŭ la supon?

— Pripensu, sinjoro, ke vi petis al mi supon el testudo!

* * *

Inter amikoj:

— Ĉu ne plaĉas al vi la amikeco?

— Ne.

— Kial?

— Ĉar amikeco estas kiel pluvombreloj, kiuj turniĝas kiam la ventego plifortiĝas.

P. A. A.

FUNEBRA PAROLADO

el R. G. INGERSOLL

Mi scias ke estas vante orumi malĝojon : per vortoj, tamen mi deziras forpreni de ĉiu tombo ĝian timon. Tie ĉi en la mondo, kie vivo kaj morto estas egale reĝoj, ĉiuj devas brave renkonti tion, kion ĉiuj estas rekontintaj. La estonto estas plenigita de timo makulita kaj malpurigita de la senkora pasinto. De la nura arbo de vivo, la burgonoj kaj floroj falas kun la matura frukto kaj en la komuna lito de tero, patriarkoj kaj infanoj dormas flankon ĉe flanko. Kial ni devus timi tion, kio venos al ĉiuj, kiu ekzistas? Ni ne povas ĝin diri. Ni ne scias, kiu estas pligranda beno, ĉu vivo ĉu morto. Ni ne povas diri, ke morto ne estas bona. Ni ne scias ĉu la tombo estas la fino de tiu ĉi vivo, aŭ la pordo de alia. aŭ ĉu la nokto tie ĉi ne estas la tagiĝo. Nek povas ni diri, kiu estas pli favorata, la infaneto mortanta en brakoj de ĝia patrino antaŭ ol ĝiaj lipoj lernis paroli vorton, aŭ tiu, kiu vojaĝas la tutan longon de la malglata vojo de la vivo, farante dolore la lastajn malrapidajn paŝojn per apogilo kaj lambastono. Ĉiu lulilo pridemandas nin «El kie?», kaj ĉiu ĉerko «al kie»? La senklara sovaĝulo ploranta super sia mortinto povas respondi al la demando tiel inteligente kaj kontente, kiel la ravita oferisto de la plej aŭtentika kredo. La larmplena senklareco de unu estas ĝuste tiel konsola, kiel la kleraj nesencaj vortoj de la alia.

Neniu staranto, kie la horizonto de vivo tuŝas tombon, havas ian rajton profeti pri estonteco plenigita je doloro kaj larnoj. Eble morto donas ĉion, kio estas valora en vivo. Se tiuj, kiuj enbrakigas nin, koron ĉe koro, neniam povus morti, estas eble ke amo forlasus la terglobon. Estas eble ke komuna kredo forigus el niaj vojetoj la malbonajn kreskaĵojn de memamo, kaj mi preferus vivi kaj ami, kie morto estas reĝo, ol havi eternan vivon, kie amo ne estas. Alia vivo estus nenio, se ni ne konas kaj amas denove tiujn, kiuj amas nin tie ĉi. Ili staras ĉirkaŭ tiu ĉi tombo kun rompantaj koroj, havas nenion por timi. La pligranda kaj plinobela kredo pri ĉio, kio estas kaj estos diras al ni, ke morto ne povas esti io pli malbona ol perfekta ripozo. Ni scias ke pro la komunaj deziroj de vivo, la bezonoj kaj devoj de ĉiu horo, ilia malĝojo malpliigos tagon post tago ĝis fine tiu ĉi tombo estos por ili loko de ripozo kaj paco, preskaŭ de ĝojo. Por ili estas tiu ĉi konsolo! la mortintoj ne suferas. Se ili vivas denove ilia vivado certe estos tiel bona kiel la nia. Ni havas nenian timon; ne estas ĉiuj infanoj de la sama patrino, kaj la sama sorto atendas nin ĉiujn. Ni ankaŭ havas nian religion, kaj ĝi estas helpo por la vivantoj, espero por la mortintoj.»

El angla originalo tradukis,
HORACE M. STEPHENS



MI SCIAS KANTON...

Mi scias kanton tiel dolĉan sed por mi tiel malgajan kaj tamen belan, ke, mi ŝatas ĝin rememori dum mia kvietsoleco. Ĝi estas ama kanto. Ĝiaj vortoj havas mi ne scias kion plendan. kio volas transcendi gaje inter la sonoj. Kaj tiu gajeco sendecida kaj nedifinita kiun ili disigas, vibradas lume inter ĉagrena larmo kaj mizerplendo...

Mi estas ĝin sciinta de sesjara knabino, kiu ĝin kantadis tra la neĝaj stratoj, ĉe la sojlo de l' kafejoj. El tiu dolĉa buŝo elfluadis senkomprenaj vortoj kun la sama malforteco kaj pleneco kiel tiuj de la neĝeroj. Ili elfluadis iafoje nefinitaj, kvazaŭ la spirito de la knabino ilin ŝirus pro malĝojo, kvazaŭ, vortoj ne apartenantaj al ŝi, ribeliĝus pro eliro el lipoj kiuj ilin ne komprenis... Kaj tiu kanto, mi preskaŭ ĝin ne komprenante kiel ŝi, iafoje liveras al mi melankolian enŝorĉon; fiksigas mian rigardon, nenion vidante, kvazaŭ miaj okuloj estus hipnotizitaj de aliaj nevideblaj...

Estas la okuloj apenaŭ malfermitaj de la etulino, de la dolĉa knabino, kiu malplektadis ĉirkaŭ si, aron da ignoritaj melodioj... Kaj tra tiuj naivaj okuloj, okuloj de feino revivigita, kiuj estas nenio el la mirinda enŝorĉo de la sonĝo... vivadas kaj transcendas nur la imago de la vivo vaganta, de la vivo nekontentigita, de la deziroj forprenitaj, de la vivo de la dolĉaj malkvietecoj kaj de la mizeroj vagabondaj...

Tra tiu rigardo, pasadas la grizaj, vintraj tagoj, similaj al grizeco de ĉefvojo, de tombo, de bulvaroj..., la neĝaj tagoj, de la neĝo rajdanta sur la tegmentoj kaptantaj la brulaĵon el la fajrujoj.

Mi scias kanton, kiu estas ama... kiu estis lerniginta al tiu etulino ĉi tiujn sonojn de deziro, kiuj ne povas vibrigi ŝian animon? Kaj tra la frostaj noktoj, noktoj palaj kaj akraj de la lunhelecoj bonanimaj, kiuj elĝemas sur la neĝo de l' izolitaj stratoj, de kia amstelo kaj de kia amo ŝi transcendas?

Venu, venu kun viaj sesjaraj mondvagadoj kaj kun via griza kanto... Venu, ĉar la amojn, kiuj ne apartenas al ni, ni kantos... kaj mi ĉin akompanos tra la neĝaj stratoj, sekvante ciajn paŝojn kaj kun fiksitaj okuloj rigardantaj nenien, ni elvokos ĉiujn aĵojn je l' kredo de rigardo... kaj ni kantas la kanton kaj ridos en la mizeroj, serĉante tra la mondo amon nekonatan, kiu restos super niaj lipoj por ĝin ni atingi dum la horoj de kvieto kaj soleco.

JOSEPH VENTURA



LLETRA ALS SENYORS REDACTORS DEL «KATALUNA ESPERANTISTO»

VOSTES me pregunten que 'ls faci dos mots pera 'l numero de Desembre ab motiu d'haver acceptat el carrech de Director de la Revista que 'ls senyors de la Junta del K. E. F. me conferiren.

Jo entenia dir aquests mots en el numero de Janer y crèguintme que si ab plaer els complasch satisfent el seu prech, ab sentiment me privo, avençantlo, d'assumpto, de material, del qual tant escassos anèm pera compaginar un numero.

No se m'escapa, que 'l carrech ab que m'han crucificat els bons amichs del Comitè es d'aquells qui porten menos goigs que maldecaps. Conech l'humor dels anonims autors d'articles inpublicables y la prohija literaria que dona l'estrella de cinch puntes. Prohija literaria y per afegiment poètica. Apendre les 16 regles y sentirse poeta es tot hù. Jo mateix, qui may he fet versos, lo primer que vaig fer en Esperanto fou una poesia. Y quina *poesia*! No m'en avergonyeixo no obstant. Tot bon esperantista passa pels mateixos graus de febre. Pero com la propria experiència me demostra, que si jo hagués enviat la *pooesia* a una revista y 'l director me l'hagués publicada, ara jo rellegintla li guardaria una rencunia profunda, y vull evitar que me la guardin semblant a mi, penso no publicar cap vers qui no vagi firmat per l'autor d'almenys tres articles en prosa ja publicats qualque part.

Com a reformes materials, publicarem la revista en paper de més cos, més escayent al desenrotllo que va prenent la Federació. Potser n'aumentarem el nombre de pàgines: això dependrà del major nombre de federats; de la riquesa de la Federació ne dependrà la del periodich.

Com a reforma moral, hi ha la promesa d'alguns dels nostres més distingits *pionirs* de colaborarhi assiduament. Jo espero que cap d'ells restarà sòrt al nostre prech y que tots comprendrà que 'l nostre bon nom al extranger depend de la qualitat dels treballs que 's publiquin en la nostra revista.

Penso publicar la historia del Esperanto a Catalunya, redactada pels mellors esperantistes de cada vila; les efemerides del moviment català; el mapa esperantista de nostra terra; el planol de Barcelona, ab indicació de totes les cases ahont hi ha un *samideano*, y 'ls d'altres viles si cal; polemiques sobre qüestions gramaticals esperanto-catalanes; una amplia informació del moviment català, *tot en Esperanto*;

y tractant de tant en tant lleugerament algun qu'altre aveniment del nostre moviment y de la nostra vida pera cercar l'amenitat necessaria en tota tasca llorda, com la de la propaganda d'una idea desinteressada en un poble massa interessat.

Pero fot això no passarà de proposits y de bonés intencions sense l'ajuda de tots. Ab tots els companys compto y espero.

Pera termenar, jo entench que la revista es dels federats, y per lo tant, ab el més ample esperit de tolerancia en ella, s'hi acullirà la veu dels nostres companys, espressa en bon esperanto, y respectuosa pera les persones y pera la declaració Fundamentista de Boulogne.

Acceptin, estimats senyors y companys, ma afectuosa salutació.

FRED. PUJULÁ



OFICIALA PARTO

El Comitè de «K. E. F.» recomana als senyors delegats i particulars que encara no tinguin llurs comptes saldats amb l'Administració que tinguin a bé fer-ho abans del 25 del corrent; puix, avent-se de presentar en el prop-venient número de janer l'estat de caixa de 1911, forçosament aurién d'apareixer dits senyors com a deutors, amb llurs respectius noms.

Novament recordem que poden enviar l'import de quotes i demés en sagells de correu de 15 centims ad aquesta Administració (Gracia, 23; Sabadell).

De l'administrador als delegats. — Durant els primers dies de Janer de 1912 rebran les *membrokartoj* pera al nou any. Se 'ls prega que les cobrin desseguida, o que almenys 'ls interessats hi donin llur conformitat, puix després succeeix que al cap de mesos hi ha qui desitja no continuar a les nostres files quan ja s'han fet envius de revista i altres despeses. Per lo tant, abans d'acabar el Janer, enviin tots els detalls possible a l'Administració, com són baixes de soci, nous socis entrants i tot allò que pugui fer referencia a la bona marxa de l'Administració. S'adverteix que tot federat del qual no 's rebi dintre 'l mes de Febrer la corresponent nota de continuació, ja sigui que agi adquirit la corresponent *membrokarto*, ja que agi donat la seva conformitat, deixarà de rebre K. E.

De la Direcció de K. E. als delegats. — La Direcció prega als senyors delegats que abans del 15 de cada mes tinguin la bondat d'enviar la nota corresponent al moviment de la llur localitat, a fi i efecte que la secció d'«Enlanda Movado» surti lo més completa possible.

Els originals han de remetre-s franquejats amb sagells de quart de centim, posant en el sobre : «Originals per a impremta»; i no, com alguns fan, enviant-los com a cartes.

Del Comitè de «K. E. F.» als senyors presidents i secretaris dels grups o societats aderits. — El Comitè de «K. E. F.» 'ls prega que enviïn els noms i adresses dels actuals presidents i secretaris; com també, si saben l'existència d'algun grup o societat no aderida que tinguin a bé comunicar-ho, a fi de poder fer els treballs amb rapidesa, quan sigui necessari, i tenir un registre ben format.

No passa mes sense que l'Administració tingui queixes de subscriptors que diuen no aver rebut el número corresponent de K. E., arribant alguns a suposar que no se 'ls envia; per lo qual el senyor administrador (boi fent constar que sense excepció, són expeditos tots els exemplars) recomana a tot-om que deixi de rebre algun número que de primer el reclami al corresponent repartidor de correspondència, i, en el cas que no l'hi donin, aleshores envii una postal a la nostra Administració per a que pugui posar-hi remei.

Els que escriuen al Comitè o a l'administrador i no reben contesta particularment, no creguin que es que no se 'ls té l'atenció deguda; ans al contrari: o que y ha es que, degut a l'excés de treball que cau damunt nostre, no es possible fer-ho. Ademés, d'avui endavant, trobaran a la secció *Korespondado*, de K. E., la corresponent resposta, sempre i quan l'asumpte no urgeixi, per lo qual recomanem una mica de paciència.

També hem de recomanar, que s'escrigui, sempre en postal, a fi d'evitar despeses.



ENLANDA MOVADO

BARCELONO

Nova Societo. — En la kvartalo Barceloneta estis fondata de niaj tieaj fervoraj gesamideanoj nova Societo monata «Geesperantistaro».

La 3^{an} Oktobro okazis la inaŭguracio, kiu konsistis en propaganda publika parolado de Sro. Delfi Dalmau.

Lertaj gesamideanoj en «Geesperantistaro» nun instruas Esperanton. Ĉiuj kursoj estas tre ĉeestataj. Ĉiam antaŭen!

Parolado. — La 12^{an} Oktobro, ĉe la grava Barcelona Societo «Dependencia Mercantil», Sro. Delfi Dalmau faris propagandan paroladon per kiu li klarigis

kial Esperanto estas la plej facillernebla lingvo, kaj tia same per ĉiuj homoj. Li ankaŭ komparis la vivon de nacia lingvo kun tiu de Esperanto; kaj fine li klarigis kial la latina lingvo logike malsukcesis kaj kial Esperanto nepre sukcesos.

Nia samideano estis aplaŭdata de la tuta ĉeestantaro en kiu tamen estis preskaŭ neniuj esperantistoj.

Novaj kursoj. — Ankoraŭ dum la lastantaŭa monato la Barcelonaj ĵurnaloj enhavis sciigojn pri novaj kursoj de Esperanto farigitaj de la grupoj «Semo», «Espero Kataluna», «Supren», «Barcelona Stelo», k. a., «Esperanto kaj Patriujo» farigis ankaŭ novajn kursojn kun la plia propagando de inaŭguracio, kiu konsistis en publika parolado de Sro. J. B. Albiñana.

Reveno. — En la lastpasinta monato revenis nia agema pioniro Sr. Frederich Pujulà.

Estu li plej feliĉe bonreveninta kaj lia restado en Katalunujo plej longa. Tion petegas la Kataluna gesamideanaro kaj tion postulas nia sankta afero en nia lando.

* * *

Així quan quelcom dubtós de vida llarga, presenta aspectes de força vital, diem que són les revifalles de sa mort, podem avui dir que 'l' moviment esperantista barceloní es troba ara en l'esmortuïment-sintoma d'una definitiva revivificació, d'un resurgiment esplendorós, sintoma, en fi, d'una reorganització forta, base d'una solida actuació avassalladora, definitivament vencedora.

Els cursos que 'ls nostrés grupus obren avui, són migrats; els mateixos grupus es desmembren, s'enfebleixen i fins alguns moren. Els *samideanoj* més abnegats i forts, es veuen impotents per a lluitar en tal estat. I es precisament i unicament això lo que farà sentir a tots, prou intensament, la conveniència i necessitat de l'unió i de la organització. Si cada un dels elements de nostre moviment barceloní se sentís fort, això es, apte o en estat propici per a obrar y lluitar tot sol, poc sentiria la necessitat de l'unió: es, doncs, un enfebliment general, un esmortuïment ben general lo qu'ha de fer possible l'aplegament i unió de tots els elements abnegats i valiosos.

Per això creiem que l'actual estat de nostre moviment a Barcelona es un ermós sintoma.

I quan per aquest camí aurem arrivat a l'unió i organització, cada un tornarà a sentir-se fort, però com que alesores ja serà tot-om dintre l'unió, i tant sols dintre l'unió se sentirà tot-om fort, com més fort sigui cada ú, tant més forts seran tots plegats. — *Delfi Dalmau.*

SABADELL

En la tago 5^{an} de Novembro okazis en la «Teatre Principal» tre grava esperanta festo, organizita de la societo «Aplech Esperanta Grupo».

Ĝi estis prezidita de Sro. A. Sabadell, partoprenante Sroj. Ll. Mas, de «Katolika Stelo»; M. Sola kaj A. Oliart, de «Lumon» kaj R. Graupere, prezidanto de la ĵus naskita grupo de la societo «C. de D. del C. y la I.» el Sabadell.

Ankaŭ partoprenis Finoj. P. Bertrand, J. Figuerola, E. Elias, E. Durán, M. Plana, T. Torra kaj C. Llubet, kiu ludis tre lerte muzikajojn el Mendelshon, Wagner kaj nian himnon.

LLEIDA

Esperantista grupo «Ilerda Espero». Tia estas la nomo de nova kunbatalanto por nia celo, ĵus fondiĝinta ĉe Ilerdo (Lleida) dank'al la kuraĝa propagando de la infanteria kapitano Sro. Johano Melons, kiu varbis al nia celo tridekon da gelernantoj, kiuj ceestas la kursojn de Esperanto donatajn ciutage de la 7^a ĝis la 8^a vespere, de Sroj. Melons kaj Grau Casas.

La entuziasmo de la novaj samcelanoj promesas kaj antaŭvidigas fruktoportan rezultaton kaj estas plej agrable konstati la fondiĝon de tiu ĉi societo, tial ke en la aludita cefurbo ekzistis ankoraŭ nenia esperantista kunvenejo, kvankam en du privataj lernejoj la infanoj estis, de kelka tempo, instruataj pri Esperanto.

Por altiri ĉies atenton sur nian lingvon oni preparas esperantajn festojn, kiuj sendube atingos grandan sukceson, kaj serio da poresperantaj artikoloj estos baldaŭ publikigata ĉe la lokaj ĵurnaloj.

Kuraĝe antaŭen, ilerdaĵ samideanoj!



BIBLIOGRAFIO

Ni nur raportos pri verkoj duope senditaj al la Redakcio.

Dresden kaj la Esperantistaro. Gvidlibro kaj propagandilo kun ilustraĵoj. Friedrich Ader, Esperanto-Verlag. Dresden, A. 1, Hansahauss (Zahusgasse, 12). Prezo : 2 respondkuponoj.

Jen bonega libro por konvinkigi niajn kontraŭulojn, kiuj bezonas vidi agojn por fermi la buŝon kaj klini la kapon antaŭ nia afero. Ĝi estas bele prezentita, kaj ne devas manki en la biblioteko de niaj samideanoj.

Disrompu ni la intermurojn, respondo de Teosofianino al parolado farita de Dro. A. H. de Hartog en la Wauhana Logio de la Theosofia Societo, kun kontraŭparolado de Dro. A. H. de Hartog, holanda pastro protestanta. Eldonita de P. Dz. Neen, Amersfoort. Nederlando. Oni ĝin ricevos kontraŭ la sendo de poŝtmandato da 0'20 sm.

La krimoj de Dio, de Sébastien Faure, tradukis Luis Carlos kaj F. Boukin. Kolekto «Paco-Libereco». Prezo : 25 centimoj afrankite.

Esperanto kaj Ido, n^o 4 de la 10-spesdeka Biblioteko Esperantista; laŭ G. Gautherot, tradukis L. E. Meier. Eldonita de «Esperanto-Propaganda Instituto. Kaiser-Wilhem-sts. 15. Leipzig». 16 paĝoj. Prezo : sm. 0'100.

Grava estas la verko de Gautherot *La Question de la Langue Internationale* kaj bona la traduko, kiun faris nia samideano Meier de tiu ĉi verko, kiu estas la plej bona kaj efika propagandilo franclingva. La broŝureto profite legos ĉiuj, kiuj deziras senpartian informiĝon pri la Idisto skismo.

Vidaĵoj de Senlimo. Originala traktato de Prof. Marcel Finot, n^o 5 el la sama Biblioteko. 24 paĝoj. Prezo : kiel la antaŭa.

Prof. Finot, kiu jam verkis tiom da popolesciencaj artikoloj originalaj en Esperanto, prezentas al ni en ĉi tiu verketo facile kompreneblajn klarigojn pri la konsisto de ĉielo, pri la mirinda evoluado de la steloj kaj pri la mirindaĵoj de la vivodona suno. Ĉiu kun kreskanta intereso legos la libreton, kiu ankaŭ tre taugas por legado en kursoj kaj dum grupaj kunvenoj.

La plej bonaj spritaĵoj el «Munĥenaj flugantaj folioj». Esperanto Propaganda Instituto Leipzig, 157. 64 paĝoj. Prezo : sm. 0'600.

Ĉiusemajne mi tralegas la konatan humorajan gazeton *Fliegende Blätter* sed kelkfoje mi ne ĝuas plene la spritaĵojn, kiujn enhavas ĉar miaj konoj de la germana lingvo ne estas sufiĉaj por tio, sed nun kiam mi renkontis la samajn spritaĵojn, kaj en nia internacia lingvo, mi ne dubis eĉ unu momento, rekomendi ĉi tiun amuzan libron, kiu estas, tre bele presita, ornamo por biblioteko.

Signiĝo de akciaj societoj por la Esperanta movado, de A. A. Saĥarov. Moskva Librejo «Esperanto». 26, Tverskaja, Moskou. Prezo : sm. 0'05.

En ĉi tiu libreto la aŭtoro proponas la starigon de firmo por eldoni librojn, ĉu esperante, ĉu ruse.

La Popolsumigo en Aŭstrio en 1911, de Jindrich Hantich, eldonita de «Bohema Nacia Konsilantaro», en Praha. I. 331.

Ĉi tiu broŝureto estas sendata senpage al ĉiuj esperantistoj, kiuj ĝin petas al la supra adreso, kun la celo diskonigi la monstran sistemon kian uzas la aŭstria registaro por premi la Slavojn kaj forigi lian lingvon.

Venĝo Vengita. Humora bilda rakonteto, verkita de Dro. A. Rudy. Raleigh, N. C. Usono. Prezo : sm. 0'25.

La bildoj enhavas la klarigojn necesajn por kompreni bone la rakonton lernante ankaŭ grandan kvanto da vortojn sen nenia peno.

Réponses a quelques objections, par M. Rollet de L'Isle. Paris. Esperantista Centra Oficejo. 51, rue de Clichy. Prezo : ne montrita.

Tre grava verketo por la esperantaj propagandistoj, kiuj trovos en ĝi bonan materialon por kontraŭstari niajn kontraŭlojn, kaj ankaŭ por tiu eltiri kelkajn notojn kiu deziras fari paroladon pri nia lingvo.

Bedaŭrinde ĝi estas eldonita franclingve kaj ne ĉiuj konas tiun lingvon.

L'Échec de la Délégation, pour l'adoption d'une langue auxiliaire internationale. Recueil de Documents. Paris. Esperantista Centra Oficejo. 51, rue de Clichy. Prezo : ne montrita.

Tiu Kajero enhavas serion de dokumentoj kaj leteroj pri la akcepto de internacia lingvo.

Elektio el «Germano Kantrezoro», de Erk. Ricevebla per Esperanto Propaganda Instituto. Leipzig, 157. Prezo : sm. 1,000.

Bonan ideon havis la firmo C. F. Peters eldoninte tiun belegan libron. Ĝi enhavas la plej konatajn popolajn kantojn germanajn kun la traduko esperanta, farita per la zorgo de G. E. A. kaj provizita per notoj por kanto kun fortepiana akompano.

Ni rekomendas al ĉiuj muzikamantoj tiun ampleksan kantaron kaj gojkore salutas ĝian aperon.

Portreto gravuraĵo, de Dro. L. L. Zamenhof. ekstera grandeco 22 : 31. Ricevebla nur per la Esperanto Propaganda Instituto. Leipzig. Prezo afrankite : sm. 0'850.

Arta portreto de nia Majstro, kiu tute indas troviĝi en ĉiu grupejo aŭ kunvenejo kiel ornamaĵo, ĉar ni kredas ke ĝis nun ĝi estas la plej vera kaj bela el ĉiuj.

Kondukanto al belega Skotlando. Higgie y K.^{nie} Printers y Plublishers. Rothcsay. Prezo : sd. 4.

Broŝureto, kiu priskribas morojn, tradiciojn, industrion, klimaton, k. t. p. pri la belega Skotlando. Ĝi estas uzebla por koni sufiĉe la landon de Charles Douglas, William Drummond, Robert Balfour, John Holybush kaj William Ballinden.